


La unua jarcento de la Esperanto-vivo en Munkeno

1891 -1991

skribita de Karl-Ernst Paech en 1991

La originala titolo estis:

100 jarojn Esperanto en Munkeno



Enhavo

Antaŭparolo

La unuaj paŝoj

Nova komenco

La jaroj inter la mondmilitoj

Nova komenco (1945 - 1948)

1949 - 36a UEA-kongreso 1951

1951 - 1953

1954 - 1960

1961 - 1968, inkluzive de la 46a GEA-kongreso

1969 - 1977

1978 - 1991

Postparolo

Kelkaj malgrandaj antaŭrimarkoj.

Jam je komenco mi konstati, ke tiuĉi verketo ne estas aŭ valoras kiel propagandilo, ĝi estas nur rakonto/informo pri la Esperantovivo en Munĥ/keno ek de jaro 1891. Ne estis facile, trovi nun ankoraŭ sufiĉajn detalojn, ĉar multaj dokumentoj perdiĝis per/dum 2 mondmilitoj kaj Tria Regno. Miaj fontoj pri la tempo ĝis 1935 estis, ĉar la tiam aktivaj samideanoj ne plu vivas inter ni, krom la klubaj aktoj kaj tre interesa protokola ĵurnalo de la E.-laboristoj pri 1915 - 1925 precipe La Esperantisto kaj La Germana Esperantisto -sed nature tie oni ne ĉiam ĉion sciis aŭ publikigis. Ankaŭ rilate unuajn 15 - 20 jarojn post la 2a Mondmilito, eĉ pri 1970 - 1975 ne ekzistas kompleta kolekto de rondleteroj kaj informiloj, kiujn Munkena Esperanto-grupo certe forsendis. Do, mi estas tial konvinkita, ke bedaŭrinde ankoraŭ mankas en mia libreto multaj priskribendaj faktoj, -sed, ĉar mi ne scias pri ili kaj ne povis trovi/legi ilin, mi devis ellasi ilin. Tial mi estus tre dankema pri informoj, se iu el la legantoj scias pri taŭgaj kompletigoj por planita dua eldono (kiu certe ankaŭ tial necesas, ĉar tiu verketo estas skribita per komputilo, kio devigis kelkfoje malbonan stilon). Aliflanke mi nature ne povis/povos noti ĉiujn detalojn, por ke la verko ne tro grandiĝu.

Malgraŭ sufiĉe multaj truoj, mi trovis tiom da materialo kaj informoj, ke la kolekto kaj aperigo nun dum la 100-jara jubileo certe estas pravigata, -jam por ke ne ankoraŭ pli multe da informoj perdiĝu! Cetere mi esperas, ke la legado pri la bonaj kaj malbonaj tempoj, kiujn Esperanto kaj la esperantistoj en Munkeno travivis, ankaŭ iom kuraĝigu tiujn gesamideanojn, kiuj eble pensas, ke ili devus rezigni kiel nuntempaj Eŭropanoj pro stulteco de la ministeriaj burokratoj/oficistoj rilate Esperanton, precipe en Germanujo! Kaj tiu rezigno povus pligrandiĝi, se oni vidas la faktajn progresojn de angla lingvo, ne nur sur tereno de Eŭropa Komunumo, sed ankaŭ rilate kelkajn gravajn sciencajn fakojn (kiel ekz. informatikon). Aliflanke, pro malfermo de la Orient-Eŭropaj landoj certe la momente estra rolo de angla lingvo pli malgrandiĝos, kaj ni esperu kaj ankaŭ ĉiuj kunlaboru, ke poste eĉ la plej letargia burokrato fine ekkonu la superecon de nia kara lingvo **Esperanto!**

Karl-Ernst Paech



L. E. Meier L. K.
MÜNCHEN
Esperantisto de L'unuaj tagoj
Aŭtoro de lernolibro

L a u n u a j p a ŝ o j

La pligrandigita trafiko same kiel la homa emo, ĉefe en la Eŭropaj ŝtatoj, strebis je la fino de la pasinta jarcento al la ebleco de komuna kontakto sen la malfacilaĵo de diversaj lingvoj. Tial la de Schleyer eltrovita kaj 1880 publikigita Volapük trafis ĝuste tiun strebadon kaj sukcesis ankaŭ unue atingi sufiĉe grandan eĥon. Sed tiam aperis en 1887 Esperanto; komparo kun Volapük montris/pruvis la superecon de la nova lingvo kaj tial multaj antaŭaj Volapükistoj fariĝis esperantistoj. Tiel ankaŭ la ĝis tiam Volapŭstista grupo en Nürnberg jam 1888 fariĝis la unua Esperanto-grupo, kaj tiu grupo ekaperigis tiam jam unu jaron poste la unuan Esperanto-gazeton de la mondo, nome La Esperantisto. Ankaŭ en Munkeno ekzistis Volapükistoj, kaj ili organizis tie (ankaŭ dum 1889) la 2an mondkongreson de Volapük. Sed kiel en Nürnberg, ankaŭ en Munkeno oni interesiĝis por Esperanto, kontaktis kaj je la 3a de Januaro 1891 jena letero estis skribita al la redaktoro de La Esperantisto (tie paĝo 12):

Tre estimata Sinjoro!

Per tio ĉi mi Vin sciigas, ke hodiaŭ vespere 3 sinjoroj de nia urbo, kunvenintaĵ en la loĝejo de l' sinjoro subskribita sub No.2, fondis klubon esperantistan, la unuan en tiu ĉi urbo. La societano No.4 ne povis alesti kaŭze de aliasocieta farado. La kvar societanoj esperas, ke baldaŭ la nombro de la membroj estos

multe grandigita. La societanoj alprenis la nomon "Societo Esperantista Münhen" kaj komencos senpage instrui publike, korespondi kun aliaj kaj ali landaj Esperantistoj, simple diri: vastigadi la lingvon internacian kun fortoj unuigitaj. Ĉar la nombro de la societanoj hodiaŭ estas nur tre malgranda, ili ne povas fari jam grandajn paŝojn, tial ili tre multe Vin dankos, se Vi, tre estimata Sinjoro, povas alsendi al ili kolekton da verkoj esperantistaj ĝis nun elirintaj - por fondi kluban libron. Esperante, ke Vi baldaŭ al ni faros la honoron skribi al ni, la subskribitaj Esperantistoj Vin salutas!

Via tre aldonita

1) Ludwig Meier

(ekskapitano, verkisto) Augustenstrasse 89/III, I.

2) Franz Müller, Barerstrasse 70/P r.

3) Ludwig Kahn, Frühlingstrasse 14a/I.

4) Herman Ermold, Frauenhoferstrasse 31/I


La unua, Ludwig Meier (poste ankaŭ ofte kiel L.E.Meier), naskita je la 16a de Februaro 1847 en Munkeno, estis jam almenaŭ depost 1883 Volapükisto, sed nun fariĝis vere grava germana aktivisto por Esperanto, ne nur en Munkeno. Jam de Februaro 1891 li ne nur kunlaboris per artikoloj en La Esperantisto, zorgis, ke tiu gazeto troviĝis en kelkaj publikaj legadĉambroj de Munkeno, sed ankaŭ varbe parolis ĉiam denove. En Marta numero de La Esperantisto tiam krome aperis varbanonco por La Lingvo Internacia Esperanto. "Vollständige methodische Grammatik, Formenlehre und Syntax der internationalen Sprache Esperanto" von Ludwig Meier, k.b. Hauptmann a.D., geprüfter Lehrer der modernen Sprachen, Vorstand der Societo Esperantistoja Münhen. München 1891 (Im Selbstverlag des Verfassers) Augustenstr.89/III, kio en la Aprila numero ankaŭ estis tre bone recenzita. Antaŭe ankoraŭ dum Marto varbparolis Meier tiom sukcese publike en la societo komercista Merkur en Munkeno, ke oni decidis baldaŭ komenci instruan Esperanto-kurson en tiu ĉi societo, kaj fakte aperis poste en Lokal-Anzeiger der Münchener Neuesten Nachrichten No. 189 anonco pri senpaga instruado de Esperanto en la societo Merkur. Varbado laŭŝajne ankaŭ estis iom sukcesa, ĉar Februara numero 1892 de La Esperantisto montras kiel personojn, kiuj ellernis la lingvon Esperanton, krom la 4 supre cititajn nomojn de la Societo Esperantista Münhen 3 novajn nomojn (stud.phil.Konold, H., stud.teĥnol.Kriechbaum, Friedrich kaj Wieser, B.). Aliflanke la vivo de la 1891 fondita societo laŭŝajne ne tro bone funkciis, ĉar en Aprila numero 1892 (paĝo 53) de La Esperantisto ni legas:

La klubo Esperantista en Munĥeno, kiu en la pasinta jaro disfalis baldaŭ post sia naskiĝo, nun denove formiĝis. Ĝia nuna estro estas s-ro Kurt Wagner (Dachauerstrasse 25/II r. R.G. München.Bayern). La unua kunveno de la klubo estis la 9-an de Marto en la loĝejo de s-ro Wagner. La kunvenoj estos ĉiusemajnaj. La klubo komencis jam korespondadon kun diversaj Esperantistoj.

Kaj poste sekvis kiel korespondemuloj la nomoj de 4 novuloj (Karl Wagner, Bautechniker; Hermann Deprosse, Eisenbahnaspirant; Georg Schnapp, Bauzeichner und Walter Zwicky, Kaufmann), ĉiuj en Munkeno. Tiuj nomoj aperis en la Novembra numero ankaŭ kiel gazet-abonantoj, sed 1893 r/estis nur ankoraŭ la nomoj Wagner kaj de iu nove nomita stud.mech.Arn Olschwang kiel abonantoj de La Esperantisto. Dum 1892 mankis la nomo de Meier kiel abonanto, li 1893 nomiĝis kiel "Hauptmann a.D. und Chefredakteur" en Nürnberg, -laŭŝajne de la General-Anzeiger, ĉar en tiu ĉi gazeto aperis poste ĉiam denove varbartikoloj por Esperanto. Sed L.E.Meier nun ankaŭ kelkfoje varbis en La Esperantisto por iom da ŝanĝoj rilate Esperanto, -strebado, kiu poste ankoraŭ intensiviĝis.

Pri la Munkena Esperanto-vivo ni nun dum 10 jaroj preskaŭ nenion plu aŭdas: 1894 ni unue nur denove

povas legi la nomojn Wagner kaj Olschwang kiel abonantoj de La Esperantisto- L.E.Meier estis ĉiam ankoraŭ en Nürnberg- sed sekvis dum la jaro ankoraŭ la nomo de iu ne pli precize karakterizita Seldeŝ, München. Krome en la Septembra numero de La Esperantisto ni povas legi pri ankoraŭ ekzistanta Esperanto-klubo en München. Sed 1895 la gazeto devis fini sian aperadon, ĉar en Rusujo, kie vivis 3/4 de la abonintoj, la akiro de la gazeto estis malpermesita per la cenzuro, kaj la malmultaj abonintoj en la aliaj landoj ne sufiĉis finance. Do, verŝajne ankaŭ pro manko de gazeto kiel ligilo inter la samideanoj nun la Munkena Esperantogrupo baldaŭ denove disfalis; ĉar almenaŭ en la Jarlibro Esperantista 1897, kiun la Nürnberg-a Esperanto-grupo eldonis pro la 10-jara ekzistado de Esperanto, ni legas pri la 1891 fonditaj Esperanto-grupoj en Munkeno kaj Freiburg, ke ili ...jam ne plu ekzistas..



N o v a k o m e n c o

13 jarojn post la unua fondiĝo denove L.E.Meier, kiu laŭŝajne intertempe revenis al la Bavara ĉefurbo, zorgis pri kuniĝo de la esperantistoj en Munkeno: Je la 21a de Marto 1904 de li kaj 9 aliaj verduloj la Esperantista Grupo Munĥena estas fondita. Apud Meier kiel prezidanto aperas 2 novaj nomoj: Wulkow kiel sekretario, krome von Stroessner kiel kasisto. La entuziasmo estis sufiĉe granda, - vidu la antaŭe kopiitajn unuajn paĝojn de l'unua-sed verŝajne ankaŭ sola-numero de la Munĥena Esperantisto. Sed kiel ofte en vivo realeco zorgis pri nur malgrandaj paŝoj; escepte de diversaj tradukitaj poemoj de Meier en Lingvo Internacia (el Upsala) ni nenion plu povas legi/aŭdi 1904 pri Munkeno. En la 1904 unue noveldonita Germana Esperantisto oni bedaŭras en Februaro 1905, de niaj Munĥenaj samideanoj ni bedaŭrinde de tre longe nenion aŭdiŝ, kaj 2 numerojn poste la gazeto informas, ke Munkeno plendas pli gravaj malfacilaĵoj pro renkontiĝejo, - problemo, kun kiu verŝajne ne nur la Munkenaj esperantistoj ĉiam ankaŭ ankoraŭ hodiaŭ batalas! Cetere ni povas legi pri kursoj, sed aliflanke ankaŭ konstati, ke Munkeno mankis en listo de la plej gravaj Esperanto-grupoj, kiun Germana Esperantisto aperigis. Tamen certe (kiel

ĉie en la mondo, ankaŭ kiel bona eĥo pri la tiom sukcesa Unua Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer dum 05a ĝis 13a de aŭgusto 1905) la Munkena Esperanto vivo ankaŭ progresis, ĉar 1906 ni jam aŭdas pri varbparoladoj de s-ro Pitschi en Stenotachygraphenverein kaj de stud.jur.Landsberg, pri kiu informis eĉ Münchener Post! Sed ankaŭ en Münchener Neuesten Nachrichten, Allgemeine Zeitung kaj en Neues Münchener Tageblatt aperis nun parte sufiĉe objektivaj artikoloj pri Esperanto, el kiuj kelkaj estis skribitaj de s-ano L.E.Meier.

La jaro 1907 helpis por kroma disvastigado/konatiĝo de Esperanto en Munkeno. Germana Esperantisto informas en la Januara numero, ke la sekretario de Esperantista Grupo Munĥena, s-ano Hans Wulkow fariĝis komitatano de 1 jaron antaŭe novfondita Germana Esperanto Societo - ek de Majo Germana Esperanto Asocio=GEA. Kvankam iu Dr. Molenaar propagandis por sia nova lingvo Universal, la 16a Internacia Pacifista Kongreso en München akceptis je la ferma kunsido tre fervorajn proponojn por Esperanto, kaj pri ĉio ekzistis sufiĉe granda eĥo en diversaj Munkenaj gazetoj. El tio rezultis ne nur, ke s-ro Meier povis kursestri en sufiĉe famkonata Munkena restoracio Humpelmayr, sed ke Munkena Esperanto-klubo sukcesis, je la 10a de Oktobro aranĝi publikan propagandan kunvenon kun ekspozicio. 1908 kelkrilate fariĝis problema jaro. Unuflanke sukcesis laŭ Germana Esperantisto pli bona disvastigado de la movado en la Bavara ĉefurbo kun eĉ kelkaj regulaj/semajnaj renkontiĝoj kaj inter diversaj Esperanto-kursoj ankaŭ studenta kurso. Krome venis post la fino de la 4a Universala Esperanto-Mondkongreso (16.-22.08.1908) en Dresden s-ro Leopold Schlaf, bonega lingvisto, al München kaj varbis precipe inter la ĉi-tiea laboristaro tre sukcese por Esperanto. Sed aliflanke komencis la Ido-skismo kaj ĝis jarfino/komenco de la nova jaro multaj estraj klubmembroj fariĝis Idistoj, inter ili ankaŭ la klubfondinto L.E.Meier, - kiu ja antaŭe estis estinta Volapükisto kaj ankaŭ ek de komenco kiel esperantisto iom subtenis lingvajn ŝanĝojn.

Esperantujo. Fine ni povas legi en la Decembronumero de l'Germana Esperantisto pri multnombre vizitita parolado pri la problemoj de internacia lingvo kaj la historia evoluo de la Esperanto-movado de la grupa prezidanto Strössner, post kio partiano de Ido provis pruvi la superecon de sia lingvo, s-ro Heydweiller tiom trafe kaj konvinke korektis liajn asertojn, ke multaj el la ĉeestantaro estis varbitaj por Esperanto. Plie iu ĉeestanta s-ro Eisenberg el Tiflis/Kaŭkazio montris je granda intereso de la ĉeestantoj la gravan utilon kaj profitigon de Esperanto-organizaĵoj por li dum lia vojaĝo tra Germanujon. Plie estas en redaktejo de Münchener Neueste Nachrichten elmontrita poŝtkarta kolekto, kio la jam atingitan disvastiĝon de Esperanto same pruvis. Post tiu varba sukceso s-ro Meiler de l'burĝa grupo kursestris en laborista grupo kun 91 partoprenintoj- la tiea membraro atingis jam la nombron 42!- kaj en aliaj medioj. Fondiĝis ankaŭ Esperanto-sekcio de l'liberstudentaro, kiu baldaŭ denove organizis Esperanto-kurson. Dum la jaro 1910 la Munkenaj esperantistoj aktive kaj sukcesplene laboris: Fondiĝis nova grupo, kiu speciale celis la propagandon en kleraj rondoj, kaj novaj societoj (la unua estis Stenografia Esperanto-Societo, la dua nomiĝis Internacia Esperanto-Societo, kiu celis kunligi izolitajn esperantistojn kaj progresigi ilin per korespondado). Cetere la diversaj grup(et)oj kolektiĝis en nova unuiĝo kun la nomo Esperanto Klub München, la estraranoj estis i.a. s-roj d-ro Stuhlberger kiel prezidanto kaj d-ro Geist kiel vicprezidanto, klubejo estis Parkhotel, Maximilianspl.21, kie oni renkontiĝis regule marde. Sed la grupoj plue laboris, ĉiu sur sia kampo; ekz. la tiea laborista grupo sukcesis, ke de la kursoj restis 50 personoj ĝis la fino.- La klubo decidis sendi 2 delegitojn al ĉi-jara GEA-kongreso en Augsburg, kaj cetere ili fondis specialan informejon kaj propagandejon, kiu troviĝis en Türkenstr. 96 kaj estis malfermata ĉiutage de la 9a ĝis 12a! Tre pozitiva estis ankaŭ la reveno de la iama grupfondinto, ekskapitano L.E.Meier de Ido al Esperantujo, kiu tuj denove diligente varbparolis, - ekz. je postkongreso en Munkeno post la GEA-kongreso en Augsburg antaŭ 250 aŭskultantoj! La Munkenaj esperantistoj partoprenis ankaŭ per Esperanto-oficejo ekspozicion de mahometana arto kaj dum jaro okazis ne nur sufiĉe multaj aliaj, sukcesplenaj, publikaj paroloj kaj kursoj, kiuj kaŭzis multajn novajn membrojn en ĉiuj sekcioj kaj grupoj, sed oni ankaŭ sukcesis enpenetri en gravajn cirklojn. Ekz., en la plej influhava komerca unuiĝo de Bavarujo Kaufmännischer Verein von 1873 ekestis lingvaj kursoj, same en Arbeiterbildungsverein. kaj precipe bone: De la plej alta turo de Oktobrafesto sur la Theresienwiese, nome de la Löwenbräu, flirtis

dum daŭro de festo 15-m2-granda Esperanto-flago, kaj sur ĉiuj enirejoj de tiu budo estis sub girlandoj Esperanto-steloj, kaj en budo atentigis granda tabulo kun surskribo Lernt Esperanto (= lernu Esperanton) al giĉetejo de la esperantistoj. Kompreneble tiel Esperanto atingis ne nur plian konatecon, sed krome tio kaŭzis multajn novajn amikojn.

Inter studentoj anaro denove kreskis, sole sekcio de libera studentaro jam posedis pli ol 30 membrojn, kaj okazis diversaj kursoj, ankaŭ por progresintoj. Entute ŝajnas korekte konstati, ke 1910 estis la ĝis nun plej sukcesplena jaro por la Munkenaj esperantistoj. Malgraŭ ĉi tiuj progresoj ni ne povas multe legi en Germana Esperantisto 1911 pri la Munkena Esperanto-vivo. Ni aŭdas dum Majo, ke en Bavarujo ekzistas 22 Esperanto-grupoj kun 960 membroj, kaj poste, ke dum aŭtuno fondiĝis Bavara Esperanta landa asocio, sed la sidejo estis en Augsburg, kie ja ankaŭ ekzistis forta verda grupo. Pri Munkeno informas Germana Esperantisto en aŭtuno pri 4 burĝaj grupoj, nome Esperanto-grupo de 1904, Esperanto-klubo de Decembro 1909, Freie Vereinigung d.Freunde der Esperanto-Sprache de Januaro 1910 kaj de Esperanto-sekcio de Münchner Freien Studentenschaft de Novembro 1909, kaj poste pri ĉefkunveno de Bavara Esperantoligo dum Oktobro en Munkeno, krome ankaŭ pri propagandaj paroladoj kaj novaj kursoj. Sed kiel mi jam en mia antaŭparolo rimarkis, Germana Esperantisto ne ĉiam ĉion rakontis, kaj ekz. pri jena sufiĉe interesa afero ne estis informita: Hans Koch, tiam ankoraŭ tre juna samideano, kiu ankaŭ unue 1909 estis veninta al Esperantujo (pli malfrue vic-delegito de UEA kaj pli ol 50 jarojn treege influanta Munkenan Esperanto-vivon), montris sian aktivecon kaj jam eldonis kiel redaktisto (alia nomo pri eldoninto almenaŭ nenie estas legebla) ek de 1a de Januaro 1911 manskribitan 4-paĝan folieton Samcelano, kiu monate aperis; de ĝi aperis almenaŭ 9 numeroj ĝis Septembro- vidu la postan kopion de la 2 unuaj paĝoj de tiu numero - pli poste aperintaj numeroj bedaŭrinde ĉi-tie ne ekzistas. Pri la eldonkvanto ni nenion povas legi, sed laŭ la nomoj de la kunlaborintoj ŝajnas, ke ĉiu grupo partoprenis kaj verŝajne tial ankaŭ ĉiu grupano ricevis ekzempleron. Fine de 1910/komence de 1911 ekzistis en Munkeno:

a) la Esperanto-grupo kun 28 membroj, 3 kursoj kun 55 lernantoj

b) la laborista	"	40	"	3	"	80	"
-----------------	---	----	---	---	---	----	---

c) Esperanto-Klubo		17	"	2	"	41	"
--------------------	--	----	---	---	---	----	---

d) studenta grupo		11	"	2	"	17	"
-------------------	--	----	---	---	---	----	---

e) Esperanto-Societo I		60	"	3	"	96	"
------------------------	--	----	---	---	---	----	---

f) " " II		34	"	1	"	34	
-----------	--	----	---	---	---	----	--

do, entute 190 organizitaj membroj kun 14 kursoj kaj 223 lernantoj, certe nombroj, kiujn ni hodiaŭ legas kun iom da envio! Rakontenda estas ankoraŭ, ke Paske 1911 fondiĝis en Leipzig - kien ankaŭ Munkena laborista grupo estis sendinta k-don Vöpel kiel delegiton kun 45 voĉoj - en konflikto kun s-ro Schlaf (ties rolo en laboristaj rondoj tiel finiĝis) Germana Laborista Esperantista Asocio =GLEA, kiu tiam reprezentis ĉirkaŭ 800 membrojn kaj je jarfino jam estis ĉirkaŭ 60 grupoj kun 1000 membroj.

★ 9. Samojedano. ★ 9.

Monate, dian muna Jimanlon.

Redaktisto: L. Koch.

Dimançon, la 3^{ro} de Septembro.

191^o

Ehavo: Progreso! — Vilagana ruzeco. —
Matematike kalkuli la aĝon de homo. —

== Progreso! ==
— Kviristo. —

Senĉese oni aŭdas pri kongresoj, kunvenoj
ktp.; ĉu internaciuj ĉu naciuj, esperantaj aŭ neesper-
antaj. Ĉe preskaŭ ĉiu alia, internacia aŭ nacia, kon-
greso Esperanto estis reprezentata per oficejo aŭ eks-
pozicio. Ekzemplu estas la «Nigra Ekspozicio»
en Gredon. Sendube ĉi tiu estas la plej granda
intereso je tiuj okazantaĵoj, ĉar ĝi montras

JUBILÄUMS-FEST

anlässlich des
25 jährigen Bestehens der Esperanto-Sprache
unter gefl. Mitwirkung der Kapelle des 3. Feld-Art.-Regiments
Herrn Obermusikmeister Georg Walter.

PROGRAMM.

I. TEIL:

1. Musikvorträge.
2. Begrüssung durch den Vorsitzenden Herrn Dr. Proelss.
(Esperanto.)
3. Festvortrag. „25 Jahre Esperanto“ von Herrn Hauptmann a. D. Meier. (Deutsch.)
4. Esperanto-Hymne. (Esperanto.)
5. Liedervorträge von Frl. Naumann.
6. Esperanto-Vortrag des Herrn Poncet aus Lyon. (Esperanto.)
7. Gemeinsame Gesänge. [s. Text.] (Esperanto.)
8. a) Liedervorträge von Frl. Miehle.
Am Klavier Herr Lehrer Hochhäussler.
b) Liedervorträge (Tenor) von Herrn Lehrer Maihäusler.

II. TEIL:

Beginn des Tanzes 11 Uhr.

<i>Polonaise</i>	<i>Walzer</i>
<i>Walzer</i>	<i>Mazurka</i>
<i>Schottisch</i>	<i>Française</i>
<i>Française</i>	<i>Walzer</i>
<i>Walzer</i>	<i>Rheinländer</i>
<i>Schottisch</i>	<i>Française</i>
<i>Française</i>	

SCHLUSS:

Gis baldaua Revido.

Änderungen im Programm vorbehalten!

1912 okazis la kutimaj varbaj paroladoj kaj ankaŭ sufiĉe da novaj lingvaj kursoj. En la laborista Esperanto-gazeto Antaŭen kelkfoje aperis informoj pri aranĝoj de l'Munkena Esperanto-laboristaro, i. a. ankaŭ kune kun la Bavara Esperanto-ligo kaj la burĝaj grupoj, - do, tiam same kiel poste la klasbatalo


inter la esperantistaro en Munkeno neniam estis tre grandskribita! Tiele la 6 supre cititaj grupoj festis kune kaj harmonie la 25-jaran Esperanto-jubileon, kaj en Mathäser-Bräu sam-ano L.E. Meier festparoladis kun bona eĥo. Aliflanke nature tio ne malhelpis la varbadon kaj agadon unu apud la alia, pro kio ekz. la laborista grupo aranĝis sian grupan someran feston en Solln ĉe München por interesigi la gelaboristojn por E. kaj propagandi la komencantajn kursojn. Tie prezidanto Maier parolis pri la valoro kaj progresoj de Esperanto, kaj post kroma varbvespero je 7a de Septembro oni konstatis 48 anoncojn por la novaj kursoj, - la komentario: Ni estas kontentaj malgraŭ la iomete malrapida progreso, se gxi nur estas certa! Sed ankaŭ la burgxaj grupoj denove progresis: Urbo Munĥeno donacis je jubilea Esperanto-Woche en Bayer.Gewerbe-Ausstellung 500.- Markojn (kio tiam estis sufiĉe multa mono!). Malfermiĝis restoracio Esperanto por vegetaranoj kun verda stelo je la enirejo kaj je la muro kun bildo kaj la himno de Dro Zamenhof. Krom multaj varbparoladoj kaj kursoj en Munkeno mem Munkenanoj ankaŭ en Pasing, kio tiam estis propra komunumo, tiele agis. Sed ĉefe interese nun nova projekto, nome (la 8an de Junio) 1912 fondiĝo de Propaganda Ligo "**Parkurbo Esperanto**", Gräfelfing-München (rigardu la iamajn prospektojn). Fakte la projekto (kies komitato enhavis tiom konatajn nomojn kiel d-ro Stuhlberger, 1a prezidanton, Leopold Schlaf, sekretarion kaj kiel kasiston Hans Tressel, kiun mi ja menciis kiel UEA-ĉefdelegiton jam 1909, -kaj precipe grave d-ro Zamenhof mem, kiu akceptis la Honoran Membrecon) malgraŭ subteno de miloj da aktivaj, monposedintaj esperantistoj en tuta mondo bedaŭrinde ne sukcesis, - verŝajne sekve de komenco de unua mondmilito, kiu malhelpis la fluon kaj ricevon de mono el la malamikaj landoj (kie la esperantistoj antaŭ la Mondmilito almenaŭ samforte ekzistis kiel en Germanujo).



Propaganda Ligo
Parkurbo
Esperanto
GRÄFELFING-
- MÜNCHEN -
(Germanujo)

8 Pfandhausstrasse 8.

Bankakontoj:
:: Ĉekbanko Esperantista ::
Bayer. Vereinsbank München.



Parkurbo Esperanto apud München. — La konstruota Kazono.

Karaj gefratoj,
antaŭen sen timo!
Gardu kuraĝon
en via animo!
Nia smeralda
standardo kun stelo
Nin alkondukos
sendube al celo!



Parkurbo Esperanto.

Nun la tuta mondo, eĉ ĉiuj niaj malamikoj — skeptikuloj, kiuj iam ne kredis eĉ la eblecon de ekzistado de ia internacia lingvo, vole — nevole devas akcepti, ke nia kara Esperanto ne nur ekzistas, sed efektive vivas.

Niaj multnombraj por-Esperantaj kaj per-Esperantaj organizaĵoj, niaj societoj kaj grupoj, dissemataj en ĉiuj landoj de la tuta terglobo, niaj ĉiujaraj Universalaj Kongresoj, — unuverte la tuta tiu ĉi senhaltanta tiel nomata „Esperanta movado“ ĉiam pli kaj pli proksimigas nin al tiu tempo, kiam fine „la bela sonĝo de l'homaro por eterna ben' efektiviĝos“.

Sed oni devas memori, ke tiu ĉi kultura movado komenciĝis nur antaŭ 25 jaroj, kaj tial estas tute nature, ke ni bezonas ankoraŭ multajn perfektigojn, multajn novajn utilajn organizaĵojn en diversaj fakoj de nia kara Esperantujo.

Kaj jen, por laŭforte akceli nian speciale Esperantan civilizacion kaj kulturon, ni fondis „Propagandan Ligon“, kiu prenis sur sin la taskon solvi tre malfacilan problemon: krei Esperantan urbon.

Kompreneble, tiu ĉi grandioza problemo estus por ni absolute neplenumbla sen mono. Sed feliĉe nia kara Esperanto nun estas jam tiel potenca, ke la mondo kredas ĝian proksiman brilantan estontecon. Kun helpo de konata München'a bankiero, kiu tre favore rilatas al Esperanto, la Propaganda Ligo akiris en Gräffeling apud München pli ol 1.000.000 kv. metrojn da tero (sed tiu ĉi tero povas esti facile pligrandigita), kiu valoras 2.000.000 markojn, kaj tiamaniere ni nun estas tute pretaj, por efektiviĝi nian ideon pri konstruo de Esperanta urbo.

Ni invitis kelkajn geoficistojn specialistojn, kaj inter ili konatan Münchenan arĥitekturon ^{Sc}on Sievers, kiu ellaboris bonegan planon de la estonta urbo, — kaj nun ni ĉiuj senlace laboradas, por efektiviĝi nian belan ideon, kaj ni firme kredas, ke niaj gesamideanoj unuanime subtenos nin morale, t. e. sen monferoj, sed nur per sia helpo varbi novajn anojn por la Propaganda Ligo.

Jen kelkaj detalajoj pri la konstruota Esperanta urbo.

Parkurbo-Esperanto kuŝos sur la dekstra bordo de rivero Würm, en 5 kilometroj de la urblimo de München.

La nomo Parkurbo ĝi ricevis pro tio, ke ĉiuj domoj en ĝi estos tute apartigitaj unu de la alia per ĝardenoj kaj parkoj, kiuj tute ŝirmos ilin kontraŭ vento kaj polvo kaj donos agrablan ombron dum somera varmego.

Ni volas, ke nia Parkurbo estu dezirinda pilgrimloko ne nur por la geesperantistaro, sed ankaŭ por ne-esperantistoj, kaj tial ni intencas samtempe prepari en ĝi allogan kuraclokon klimatan, aeran k. t. p., en kiu konstante povus trovi por si resanigon, refreŝigon kaj agrablan ripozon multaj alilanduloj, kiuj sendube dum sia restado inter niaj samideanoj ellernos nian lingvon kaj aliĝos al nia Esperanta movado.

Ĉiuj loĝantoj en nia urbo estos absolute egalrajtaj urbanoj kaj ne diferencigos unu de la alia per naciaj, religiaj, aŭ politikaj konvinkoj, sed ili ĉiuj devas esti esperantistoj, ĉar laŭ nia regularo ni povas vendi la domojn en nia urbo nur al esperantistoj, aŭ al amikoj de Esperantismo, t. e. al tiuj personoj, en kies familioj almenaŭ po unu ano devas ellerni Esperanton.

Ni, entreprenantoj, estas nun en tia feliĉa situacio, ke ni havas la eblecon subteni tiujn metiistojn, malgrandajn komercistojn kaj aliajn personojn, kiuj volus fondi iajn metiejojn, butikojn, hotelojn k. t. p. Ankaŭ personoj, kiuj deziras kaj kapablas esti komizoj, vendistoj, librotenistoj k. t. p., povas trovi por si oficojn en la Parkurbo.

Tiamaniere, por multaj centoj da nunaj kaj estontaj geesperantistoj nuntempe aperas tre malofta okazo fondi en sia propra Esperanta hejmo tre bonan kaj feliĉan ekzistadon.

Krom tio, ni projektas konstrui en nia urbo grandan rifuĝejon por geknaboj de lerneja aĝo, kiuj interesigas pri Esperanto kaj ekvolos ĝin ellerni dum somera libertempo, kaj ni estas certaj, ke tiuj geknaboj, post agrable pasigita somero, reveninte hejmen, propagandos nian lingvon inter siaj kamaradoj kaj samaĝuloj, kaj tiamaniere altiros ilin al nia movado.

Sed ni ne havas rajton klopodi kaj zorgi nur pri fizika bonstato de nia urbo, — ni devas memori ankaŭ pri spiritaj postuloj de nia estonta loĝantaro, kaj por laŭforte plenumi tiujn naturajn postulojn, ni, kune kun la loĝdomoj, intencas ankaŭ konstrui preĝejon, teatron, kazonon, klubon, lernejon, monumenton de nia Majstro; ni intencas fondi internacian bibliotekon, eldonadi nian propran ĵurnalon k. t. n.

Tiuj ĉi novaj entreprenoj, memkompreneble, postulas novajn elspezojn, kaj ni ne havas par tio sufiĉe da kapitalo. Kaj jen, por plenumi ĉiujn niajn, sendube, necesajn entreprenojn, ni decidis fondi grandam Internacian Loterion.

Sed ĉar, laŭ leĝoj, tia loterio estas permesata nur inter geanoj de la sama societo kaj pro tio ni estas liberigitaj de ĉiaj impostoj, kaj ni ne bezonas apartan regnan permeson, ni insiste petas ĉiujn niajn gesamideanojn aliĝi al nia Propaganda Ligo kaj aliĝi al ĝi ankaŭ siajn amikojn kaj konatojn, — tio estas facile farebla por vi, ĉar, aliĝante, vi prenas sur vin nenian devon kaj nenian riskon, krom la devoj de ĉiuj esperantistoj propagandistoj, ĉar la Propaganda Ligo apartenas al la societoj, laŭleĝe enskribitaj en la reĝan societ-registron, kaj pro tio aliĝantoj per la leĝo mem estas absolute garantiitaj kontraŭ ia ajn risko.

La esenco de la Internacia Loterio estas jena.

I. La tuta kvanto da biletoj estas dividita je dek serioj po 100.000 biletoj en ĉiu serio.


II. Ĉiu aparta serio enhavas 9000 gajninojn de 3 ĝis 1000 markoj; la ĉefa gajno de la tuta loterio estas belega domo en Parkurbo kun granda ĝardeno kaj kun ĉiuj necesaj mastrumaj konstruaĵoj.

III. Ĉiuj biletoj en ĉiuj dek serioj havas do 90.000 gajninojn, kles la tuta sumo egalas al 400.000 markoj kaj 25.000 markoj — la prezo de la lotumota domo.


IV. Ĉiuj gajnaj kaj malgajnaj biletoj estas metitaj en intence preparitaj maŝinfermitaj kovertoj, tute egalaj laŭ sia eksteraĵo, kiujn oni povas malfermi nur distrancinte per tondilo, aŭ tranĉilo.

V. La gajnoj estas pagataj de la Propaganda Ligo senprokraste, tuj mem post la prezento de la gajninta bileto.

VI. Post la disvendo de la biletoj de ĉiuj dek serioj kaj post disdono de gajnoj, okazos ankoraŭ ĝenerala loterio inter ĉiuj gajnintoj, dum kiu estos lotumita la ĉefa gajno — domo en Parkurbo, valoranta 25.000 markojn, aŭ 20.000 markojn per mono. Tial ĉiuj, gajnintaj eĉ malgrandan sumon, estas invitataj konservi siajn biletojn ĝis la okazonta ĝenerala loterio.



Restoracio kaj banejo, sur r. Würm.



PLANO DE LA PARKURBO
ESPERANTO
— EN —
MÜNCHEN — GAREFELANG
LAŭ LA PROJEKTO DE LA PARITENTURISTO
— FRITZ SIEVERS —

X. La rezultato de l' loterio estos publikigita en ĉiuj Esperantaj gazetoj.

Kiel vi mem vidas, karaj gesamideanoj, nia loterio ne estas simila al multaj aliaj loterioj, kiuj havas laŭordajn numerojn de biletoj gajnantaj kaj malgajnantaj dum ia antaŭe difinita tempo, kiam oni anoncas, kiaj numeroj gajnis. Ne!


Nia loterio konsistas el gajnantaj aŭ malgajnantaj biletoj, enmetitaj en apartaj zorgeme preparitaj kovertoj, kaj la posedanto de l' bileto, post malfermo de la koverto, tuj povas scii, ĉu li gajnis ion kaj kiom, kaj se li gajnis, li tuj povas ricevi monon, ne atendente ian antaŭe difinitan tempon.

Ĉiuj gajnoj de nia loterio egalas al 40% de la tuta sumo; por ĉiuj dek biletoj oni havas proksimume unu gajninojn, — kion donas nenialia loterio.

La dismetado de la gajnoj po 1000, 600, 500, 400, 300,

200, 100, 60, 50, 40, 25, 20, 10, 5 kaj 3 markoj en la lotlerioj, fermado kaj mikado de tiuj lotlerioj estis faritaj de la aparte elektita absolute konfidinda komisiono de la Propaganda Ligo, — kaj nuntempe nek la membroj de tiu komisiono, nek iu alia persono povas scii, en kiuj kovertoj estas gajnoj, aŭ malgajnoj. Malfermo aŭ sekreta esplorado de la lotlerioj per lumo estas tute ne ebla, pro tio, ke la kovertoj, estas faritaj maŝine el papero nepenetrebla por lumo.

Ni esperas, karaj gesamideanoj, ke, post tralego de tiu ĉi nia alvoko, vi multnombre aliĝos al la Propaganda Ligo kaj akiras kiel eble plej multe da lotlerioj de nia Loterio. Per tio vi montros vian plenan aldonitecon al nia sankta afero, subtenos nian gravan kaj malfacilan entreprenon, kiu antaŭ ĉio celas la bonstaton kaj luksan disfloron de la konstruota urbo, la estonta ĉefurbo de nia karega Esperantujo, —



Villa.

VII. Esperantaj societoj kaj grupoj, aliĝantaj al la Propaganda Ligo kaj samtempe aĉetantaj 500 (kaj pli) biletojn, ricevas por ĉiuj 100 po ses biletoj senpage.

VIII. La prezo de ĉiu lotlerio, enhavanta unu bileton, estas 50 sd. (1 Mk.); por ĉiuj 20 aĉetitaj lotlerioj unu lotlerio estas aldodata senpage.

IX. La biletoj povas esti vendataj nur al personoj, aliĝintaj al la Propaganda Ligo.

Konkurso!

360 premioj en la sumo de 50,000 markoj,

kaj, krom tio, domo en Parkurbo, valoranta

18,000 markojn, aŭ 15,000 markojn per mono al tiuj, kiuj varbos

la plej grandan nombron da aĉetantoj de la lotletero.

Por rekompenci tiujn el niaj gesamideanoj, kiuj ekvolos laŭforte helpi al nia tre grava, serioza kaj mallacila entrepreno, kaj kune por plirapidigi la disvendadon de la lotletero de nia Internacia Loterio, ni decidis doni en ĉiu serio po 36 premioj al tiuj, kiuj varbos por ni la plej grandan nombron da aĉetantoj, laŭ jena kalkulo: unu premio — 1000, unu — 600, unu — 500, unu — 400, unu — 300, unu — 200 markojn, 10 premioj po 100 kaj 20 — po 50 markoj. Tiamaniere ni donos en ĉiu aparta serio po 5000 markoj da premioj, kaj sekve en ĉiuj dek serioj ni disdonos 360 premiojn en la sumo de 50,000 markoj.

Krom tio, post disvendo de ĉiuj dek serioj kaj post disdono de la premioj al la varbantoj, ni donos ankoraŭ unu ĉefpremion — la domon en Parkurbo, valorantan

18,000 Mk. al tiu el niaj kunlaborantoj, kiu varbos por ni la plej grandan nombron da aĉetantoj de la lotletero en ĉiuj dek serioj kune; anstataŭ la domo, la gajninto de la premio povas ricevi 15,000 Mk. per mono.

Do, kiu volas preni sur sin la varbadon de la aĉetantoj kaj kune de la anoj de la Propaganda Ligo (ĉar ni povas vendi la biletojn de nia loterio nur al personoj, aliĝintaj al nia Ligo), tiu bonvolu tuj skribi pri tio al ni, petante la necesan kvanton da libretoj kun kontrolkuponoj (en ĉiu libreto estas 25 kuponoj), por ke li povu noti kaj numerigi en tiu libreto la nomojn kaj la adresojn de l'varbitoj, — kaj poste laŭ tiuj kuponoj ni kontrolos kaj kalkulos la nombron de ĉiuj venditaj biletoj, por difini, kian premion devas ricevi la varbanto.

Karaj Kunlaborantoj! Pro la nomo de la sankta afero kaj pro la granda kultura ideo, ni kore petas ĉiujn niajn gesamideanojn aliĝi al la „Propaganda Ligo“ kaj kiel eble plej larĝe disvastigi la sciigojn pri Parkurbo-Esperanto inter siaj amikoj kaj gekonatoj, proponante ankaŭ al ili aliĝi al la Ligo, des pli, ke la aliĝo estas tute senpaga kaj absolute senriska, ĉar la Propaganda Ligo estas laŭleĝe enskribita en la regnan societregistron (E. S.)



Teil-Ansicht eines Geschäftsviertels in der Parkstadt Esperanto.

Der Preis eines jeden Losbriefes beträgt M. 1.—.
Bei Bestellung von 20 Losbriefen 1 Losbrief gratis.

Esperantovereine und -Gruppen, welche dem Propagandabund angeschlossen sind und gleichzeitig 500 und mehr Losbriefe kaufen, erhalten auf 100 Briefe 6 Losbriefe gratis.

Auf Losbriefe, welche auf Grund der Werbehelfchen mit Prämiensanspruch (siehe letzte Seite) vermittelt werden, können selbstredend keine Gratis-Losbriefe gewährt werden.

Die Lose dürfen nur an solche Personen verkauft werden, welche dem Propagandabund angeschlossen sind.

Wir hoffen, karaj Gesamideanoj, daß Sie sich in großer Zahl unserem Propagandabund anschließen und sich so

viele Lose als möglich anschaffen werden, um unser wichtiges und gewiß auch schwieriges Unternehmen zu unterstützen.

Erstreben wir doch nichts anderes, als dem Esperantismus ein trautes Heim zu schaffen. Unsere Freunde werden also auch mit Freuden bereit sein, einige Losbriefe zu bestellen, die Entwicklung der künftigen Hauptstadt von Esperantujo zu fördern und wer kann es wissen, — außer ansehnlichen Bargewinnen auch noch ein prächtiges Heim in der Parkstadt selbst, oder das Geld zu einem solchen, zu gewinnen.

Wir bringen einige Illustrationen, welche Umfang und Gestaltung unserer Parkstadt darstellen und zeigen sollen, wie die Hochburg von Esperantujo geplant ist.

Die Vorstandschaft des Propagandabundes:

J. Stuhlberger, prakt. Arzt, I. Vorsitzender. O. Aigner, II. Vorsitzender. L. Schlaf, Schriftführer. Hans Tressel, Kassier.


Beiräte: Dr. Wilh. Floßmann, Rechtsanwalt. Ig. Geyer, Architekt. Alois Guggenberger, Rechtsanwalt. Dr. Hans Schuler, Kgl. Staatsanwalt. Dr. Rud. Seidl, Rechtsanwalt. Fritz Sievers, Architekt. Robert Zeller, Ingenieur.

Ehrenkomitee: Generalleutnant von Belli de Pino, K. Kämmerer. Freiherr Karl v. Branca. Freifrau Rosa v. Karg-Bebenburg. Kommerzienrat Lud. Parcus. Graf Joseph Pestalozza. Gräfin Elsa Pestalozza. Ludwig du Jarrys, Freiherr von la Roche, Kgl. Kämmerer und Major z. D. Fanny du Jarrys, Freifrau von la Roche. Adolf Graf Westarp.



Hauptgewinn der internationalen Vereinslotterie.

Unsere Vereinslotterie bietet:
90000 Gewinne
im Gesamtbetrage von
M. 400000.—
bar Geld ohne Abzug,
außerdem eine Villa im Wert
von 25000 Mk. oder
20000 Mk. bar Geld.



Freistehende Villa,

in schönem Garten gelegen, mit Diele, 6 Zimmern, Küche, Kammer, Bad, Loggia, Veranda, Spelse, Garderobe, W. Cl., Waschküche, Keller, Zentralheizung.

Komence de 1913 ni legas en Germana Esperanisto, ke s-ro Schlaf ne plu laboras en Propaganda Ligo

"Parkurbo Esperanto", sed tie agas nun arkitekto Sievers kaj bankisto Schuler. Laŭ Antaŭen ankaŭ okazis ŝanĝo en la laborista grupo: Nova prezidanto fariĝis k-do Wagenleithner, kaj propaganda komitato sub k-do Fleschutz estis elektita. K-do Fleschutz estis ankaŭ elektita kiel delegito por la 2a Kongreso de Germana Laborista E.-Asocio en Frankfurt/M dum paskaj tagoj (kie poste inter pli ol 130 ĉeestantoj partoprenis 47 delegitoj de 70 grupoj kun minimume 1300 geanoj). En München-oriento fondiĝis (per s-ano Hans Koch) senĝena Esperanto-unuiĝo La verda Stelo. La loka ligo decidis partopreni per Esperanto-ekspozicio en la ekspozicio München 1913 Oficeja kaj komerceja domo en la fako X: komerca instruado kaj invitis ĉiujn grupanojn al ekskurso al Starnberg, por viziti la tiean grupon kaj aranĝi propagandan kunvenon.

Germana Esperantisto informas dum Junio pri renkontiĝo de Propaganda Ligo de Oberbayern, kies prezidanto estis s-ro Strössner el München, por pritrakti propagandajn demandojn, kaj ke la gazeto de la München'aj tramoj uzas grandan parton de sia loko por Esperanto-propagando. Gravaj okazaĵoj dum la jaro estis ankoraŭ

a) la fondiĝo de Bavara Esperanto-Instituto laŭ la modelo de la Saksa kaj Virtemberga institutoj en München, Pfandhausstr. (kiu jam por 1913 publikigis kondiĉojn por vojaĝstipendiuloj), kaj
b) vizito de tiam princregento de Bavarujo (poste reĝo Ludwig IIIa) kaj de princido Rupprecht je supre menciita ekspozicio München 1913, kie ili ankaŭ estis je Esperanto-ekspozicio, interparolis kun d-ro Proelß kaj ekskapitano L.E.Meier kaj deziris al la movado pluan progreson, - do, oni rajtas fakte konstati, ke tiam Esperanto estis bone aprobita en plej altaj tavoloj! Ankoraŭ kelkaj informetoj: Intertempe ĉiuj grupoj en Munkeno - escepte de supre menciita unuiĝo Verda Stelo- apartenis al loka ligo; fondiĝis E.-Künstler-Runde; okazis multaj novaj kursoj, i.a. 42 partoprenintoj je instruado inter pioniroj! La Esperanto-Societo festis je 8a de Novembro sian 4-jaran jubileon; Propaganda Ligo Parkurbo, kiu estis ĝis tiam enregistrita asocio, ŝanĝis la strukturon kaj fariĝis akcia asocio. GEA tiam ĉirkaŭis 181 grupojn kun 4660 membroj. Fine ankoraŭ malbona, sed por ni hodiaŭ ne fremda sperto: Kvankam filo de fama supera studkonsilanto Kerschensteiner, estro de ĉiuj Munkenaj popollernejoj, dum somero ankaŭ fariĝis esperantisto, la loka lerneja komitato rifuzis la peton pri permeso de E.-instruado al popol-lernejoj en lernejoj! Tamen Munkenanoj nature esperis estonte pli sukceson.

Jaro 1914 komenciĝis kun la kutimaj jarkunvenoj. Nova prezidanto de grupo de 1904, kiu dum Marto festis 10-jaran jubileon, fariĝis s-ano Meiler, vicprezidanto Heinrichs. Sed en Munkeno oni ankaŭ festis/stas karnavalon, kaj cetere ĉio bone progresis. Multaj lingvaj kursoj ankaŭ en novaj medioj, E.-laboristoj propagandis je 1a de Majo, la tramistoj portis sur brusto etiketon, kiu montris la E.-lingvo-kapablecon de la portanto, - kaj subite ekestis Unua Mondmilito! Fakte ĝi grandparte detruis la ĝis tiam atingitajn sukcesojn. De la laborista grupo, kiu je komenco de jaro posedis ĉirkaŭ 80 membrojn, preskaŭ 2/3 devis militservi, precipe ankaŭ la estraranoj, kaj tial la kunvenoj finiĝis meze de 1915.

En la aliaj, burĝaj, grupoj estis iom sama situacio, oni provis, sed nur parte sukcese, daŭrigi regulajn renkontiĝojn. 1915 Dr. A. Baumann iama Idisto, eltroviŝ kaj propagandis Wede, Germanan mondlingvon, - sed tio ne tro ĝenis. Aliflanke s-ano H.Koch daŭrigis propagandon por Esperanto kaj ankaŭ kursestris, -sed nature venis nur tre malmultaj lernantoj. La esperantistoj tiam, ankaŭ en Munkeno, provis (parte ankaŭ sukcese) per Esperanto kontaktigi inter militkaptitoj (germanaj kaj ne-germanaj) kaj la patrolando, helpis kelkfoje UEA-centro en Svislando; cetere tiam multaj homoj, kiuj kuŝis vundite en hospitalo, aŭ estis (kvazaŭ) senlaboraj (kiel militkaptitoj), lernis fervore Esperanton, - sed tio rilatis ne nur la esperantistojn en Munkeno! Kaj ju pli longe la milito daŭris, des pli ĉiuj atendis kaj sopiris pacon, la preskaŭ devigan bazon por ideo de Esperanto (ties patro, d-ro Zamenhof, jam mortis la 14an de Aprilo 1917, kaj do ne plu povis ĝisvivi la deziritan pacon). 1918 d-ro Proelß nun kunigis kaj vigligis la restintajn esperantistojn, kaj vere sukcesis atingi en novaj kursoj 30 partoprenintojn. Oni renkontiĝis denove ĉiun sabaton kaj s-ano Hechtl sukcesis, ke Esperanto estis akceptita en Münchner Sprachenverein. S-ano Koch sukcesplene kursestris en Internationaler Handels- und Verkehrsverein München, kies prezidanto s-ano Hechtl ankaŭ fariĝis, kaj La Germana Esperantisto informis, ke en Munkeno nun ekzistis 9 grup(et)oj.



ESPERANTO

Karnavala-
Gazeto

de
LA VERDA STELO

München-Ost

21 Febr 1914.

Preis 20 g

!!! Übertragbar !!!

La jaroj inter la mondmilitoj

La milito estis finita, la posteuloj kolektiĝis por konstati, kiom grandaj estis la vundoj kaj perdoj. La Munkena grupo de la laboristaj esperantistoj rememorigis per anonco je pro milito 10 mortitaj membroj kaj same atentigis pri sia ekzistado kun la volo, denove batali por la venko de la ideo de Zamenhof. Laŭ protokolibro ili renkontiĝis la unuan fojon post la milito la 20an de Februaro 1919, (r)estis ankoraŭ 54 membroj. Je la baloto k-do Wagenleither denove fariĝis 1a prezidanto, kiel revizoro aperas nun unuan fojon la nomo Deubler, - li poste restis ĝis Tria Regno kaj post 2a mondmilito en la Munkena E.-grupo Laboro por longaj jaroj unu de plej gravaj apogiloj de nia movado. Jam antaŭe, je 6a de Februaro 5 burĝaj grupoj interkonsentis fondi Esperanto-Ligon Munkenan; la fondo okazis je 7a de Marto, 1a prezidanto Hans Koch, vicprezidanto Karl Meyer, sekretario G. Strößner; aliĝis poste nun ankaŭ Verda Stelo kaj la 1910 fondita propaganda grupo. La laborista grupo interkonsentis post letero de Koch kunlabori rilate Esperanton. Proklamo de respubliko de sovetoj komence de Aprilo ankoraŭfoje malhelpis pacan evoluon, sed tiu respubliko ne daŭris longe, kaj je la 20a de Junio okazis unua ĝenerala kunveno de Ligo, aranĝita en altnivela restoracio Humpelmayr kaj ankaŭ kun posta amuza vespero. Ekskursoj al Solln kaj Grünwald por renkonti la tieajn samideanojn sekvis same kiel granda propaganda vespero, -la ĵurnalo de laborista grupo konstatas, ke la elspezojn de 400.--M pagis la Ligo! E.-kursoj sekvis, komuna Zamenhofa festo bone sukcesis, do, evidente Munkena E.-vivo denove komencis flori. Sed ankaŭ la Bavara E.-Ligo denove aktiviĝis; oni renkontiĝis en Augsburg kaj sendis leteron al la Bavara Kultura Ministerio, ke oni akceptu enkondukon de Esperanto je popol= kaj pli altnivelaj lernejoj, kiu restis bedaŭrinde ankoraŭ sen sukceso. Tamen, ni ne forgesu: Antaŭ 1a mondmilito ekzistis en Germanujo 162 burĝaj grupoj kun 3345 ordaj kaj 532 eksterordinaraj membroj, nun 1919 restis ankoraŭ nur 49 grupoj kun 935 ordaj kaj 197 eksterordinaraj membroj!

1920 komencis kun la kutimaj jaraj kunvenoj. Je 5a de Januaro jam laborista grupo kunvenis en nova restoracio Westermühle; post rezigno de k-do Wagenleither unue fariĝis k-do Wendler prezidanto, - sed li jam dum Aŭgusto rezignis kaj k-do Deubler nun fine prenis la oficon (kiun li retenis ĝis Januaro 1933, kiam la faŝistoj disbatis la laboristajn grupojn, ankaŭ la laboristan Esperanto-grupon). Dum 10a de Januaro fondiĝis nun Katolika grupo, grupestro sam-ano Sappl, kaj 1 tagon poste grupo Nymphenburg. Dum Marto la katolika grupo jam posedis 50 membrojn, aŭtune estis 85 kaj oni interkonsentis tial eldoni propran informilon! Dum vintro ŝanĝiĝis estraro: Nova prezidanto: kooperatoro Lucas, sekretario Joh. Bernhard. Same la Munkena Esperanto-Ligo ricevis post morto de vicprezidanto Meyer tute novan estraron: Prezidanto Dr. Theilhaber, vicprezidanto Gustav Ziegler- Bernhard kaj li estis post 2a mondmilito fidelaj membroj de supre menciita grupo Laboro. La Ligo kaj la katolika grupo strebis nun E.-instituton sole por komerco, kaj ili iom sukcesis. Alia sukceso estis fina akcepto de Esperanto kiel laŭvola fako je popollernejoj. Laborista grupo tiam interne okupis sin pri statutoj de intencita internacia ligo, -sed oni same aranĝis someran feston en Solln, disdonis tiom sukcesplene 4.000 flugfoliojn por aŭtuna varbado, ke ekz. Deubler povis estri 2 kursojn kun po 20 gejunuloj kaj Stölzl 120 de li varbitajn kursanojn en Isaria-Zäbler-fabriko. En ĵurnalo de laborista grupo aperis nun ankaŭ unuan fojon nomo de k-do Winter, kiu same poste estis kaj restis dum jardekoj grava apogilo de Munkena E.-vivo. Malbone jam tiam la plendo, ke oni malpurigis la varbafiŝojn por Esperanto per svastikoj kaj fiskribaĵoj kiel juda trompo. Proteston kontraŭ tiu agado en gazetoj Ligo rifuzis, - kio nun laboristojn ĉagrenis. Ili atendis venontjaran Internacian Kongreson en Prag, kie estu fondota Internacia E.-Laborista Ligo; kaj kiam dum Decembro Germana Laborista Esperanto-Ligo (kiu dum Aprilo 1919 oficiale estis komencinta sian laboron) malpermesis kunlaboron kun burĝaj grupoj, Munkena laborista E.-grupo ek de nun zorgis pri E.-kursoj je laborista akademio. En la Ligo fine de jaro s-ano Ziegler rezignis kiel vicprezidanto kaj sekvis s-ano Hechtl, kiu ankaŭ ankoraŭ dum multaj jaroj restis tre aktiva membro. La Germana Esperantisto informas nun pri bona kunlaboro de (burĝa) Ligo kaj katolika grupo, kaj en Der Bundeskamerad (eldonisto "Sammlerbund-Union"), kiu publikigis E.-rapidkurson de s-ano Koch, ni legas pri ankoraŭ 5 grupoj (Altstadt, grupestro Tressel; Ost, grupestro Wohlfahrt; Süd, grupestro Strößner; Nord, grupestro Eckl kaj Nymphenburg, grupestro Brendel, kiuj apartenas al nunnomita Esperanto-Verband München e.V.);

krome katolika grupo, gruestro Lucas, kaj laborista grupo, gruestro Deubler. En letero al GEA informas Koch, ke la 1904 novfondita Esperanto-grupo unue 1920 reaktiviĝis kaj konsistis nur el postmilitaj membroj, -entute ni devas konstati, ke la nomoj de diversaj grupoj sufiĉe ofte ŝanĝis, same kiel la membroj ŝanĝis la klubmembrecon. Tamen, kelkaj nomoj ĉiam denove aperas dum jaroj kaj tiele zorgas por iom da kontinueco.

La jaro 1921 alportis pluan progreson. Je 15a de Januaro aperis en Bayer. Verkehrsblätter (Organ der bayer. Verkehrsbeamten) publikigo de referato de Oberpostverwalter Jacob pri Esperanto je 5a de Februaro, kaj, ĉar altranga poŝtisto Dr. Reindl subtenis ĝin, venis tiom da interesuloj, ke Jacob devis ripeti la referaton 2 semajnojn poste. Car nun en Bayer. Verkehrsblätter de 9a kaj 12a de Februaro la atentigoj pri tiuj referatoj estis tre pozitivaj, ekestis je poŝt- kaj fervojaj administracioj multaj E.-kursoj kun ĉirkaŭ 340 partoprenintoj! Varbcele la Ligo aranĝis ankaŭ ekspozicion je la paroladoj de Jacob, kiujn ĉirkaŭ 1500 homoj vidis, - sed bedaŭrinde la membraro de Ligo tial ne vere pligrandiĝis. En grupo Altstadt, kiu komence 1921 posedis 48 membrojn kaj kies estro antaŭe estis s-ano Tressel, nun fariĝis estro la supre menciita Josef Jacob, - kiu cetere ankaŭ antaŭe estis Volapükisto kaj kiu nur 1919 konvertiĝis. Dum aŭtuno oni decidis malfondi la ĝisnunan enregistritan E.-asocion kaj nove fondi iun pli malfirman E.-kartelon de diversaj grupoj, sed ankaŭ kiel enregistrita asocio. Aliĝis tuj grupo Altstadt, grupo Nord (= iama grupo de 1904!), grupo Ost (= iama grupo Verda Stelo) kaj katolika grupo. 1a prezidanto fariĝis Dro Francke, 2a prezidanto Koch. De laborista grupo ni aŭdas, ke novfondita Internacia Laborista Esperanto-Ligo -kies nomo post Prago ŝanĝiĝis al Sennacieca Asocio Tutmonda (mallongigo SAT)- eldonis propran gazeton Esperantista Laboristo, kaj ke Munkeno posedis plej multe da abonantoj. Interese ankaŭ komencanta korespondado kaj Esperantokursoj je politikaj malliberuloj. La grupo estis maldekstra, preskaŭ ĉiuj membroj apartenis al iu tia partio aŭ/kaj al sindikato, -kaj eble tial ili estis tiam ankaŭ iom sukcesaj: Oni nun eĉ fondis subgrupojn, unue en Schwabing, poste ankaŭ en Neuhausen, Sendling, Giesing kaj Haidhausen, disdonis ĉi-foje eĉ 10.000 flugfoliojn, kaj en kursoj je supre menciita Laborista Akademio estis 34 kaj je komunista junularo de Bayerische Motoren-Werke 21 partoprenintoj. La laborista grupo nun posedis 65 membrojn, kaj tiu forteco ankaŭ donis memfidon: Kvankam oficiale ja ne estis dezirite, la grupo ŝatis la kunlaboron kun Ligo, kaj decidis dum Novembro nun ankaŭ aliĝon al la Kartelo (ek de Februaro Winter jam partoprenis kiel delegito ties kunsidoj). Notinde estas ankoraŭ, ke je 29a/30a de Januaro 1921 okazis per Saksa E.-Instituto - kiu tiam ankoraŭ laboris por tuta Germanujo - en Munkeno la unua oficiala E.-ekzameno en Bavarujo kun entute 14 kandidatoj; de klubo partoprenis instruan ekzamenon d-ro Francke kaj Koch, la lingvan kapablecan ekzamenon i. a. Jacob kaj Ziegler; de laborista grupo partoprenis Deubler kaj Ledl, - kaj la ekzamen-elspezojn repagis la grupo je propono kaj decido de ĉeestantaro, post kiam la kasisto (laŭ ĵurnalo kun malgaja mieno) jesis, ke en la kaso estis sufiĉe da mono. Je la ekzameno ĉeestis urba lerneja konsilisto Baier persone kaj kiel reprezentantoj de Germana Regna poŝtministerio Dr. Reindl, supre jam menciita, de Bavara Komerco ministerio iu Dr. Gilch kaj de distrikta instruista asocio distrikt-superinstruisto Meier, do, temis pri vere ceremonia afero, kiu ankaŭ taŭgis varbcele, -kaj ĉio kune helpis, ke ekz. (laŭ Germana Esperantisto) demokrata kaj pacifista gazeto Süddeutsche Presse preskaŭ ĉiutage informis pri Esperanto kaj ankaŭ ĉiujn informojn de la Munkenaj E-grupoj publikigis. Tio ebligis aranĝi multajn prelegojn kaj kursojn, i.a. 2 kun 50 partoprenintoj sole por policistoj kaj 3 (progresigaj) kun 60 partoprenintoj sole por poŝtistoj. Fakte tiam fondiĝis decembre ankaŭ poŝtista (prezidanto Jacob) kaj policista (prezidanto N. Jennuwein)-E.-grupoj, - sed ekz. poŝtista grupo rifuzis aliĝon al alia esperantistaro, ankaŭ al laborista grupo, kaj post iom da tempo ĝi ne plu ekzistis. Sed momente ankoraŭ ĉiu grupo prosperis, kaj ekz. je jarfino la katolika grupo povis informi pri granda varbvespero en Kolping-domo, kiu kaŭzis 8 kursojn kun ĉirkaŭ 100 partoprenintoj kaj bonege vizititan (pli ol 200 personoj!) Kristnaskan feston, kie i.a. ankaŭ UEA-delegito Tressel parolis pri Esperanto kaj UEA. Laborista grupo povis konstati ĉirkaŭ 230 partoprenintojn je diversaj kursoj, sed ankaŭ ĉefe sukcesplenan laboron eksteren; per ĝia helpo ekestis aliaj E.-laboristaj grupoj i.a. en Garmisch, Miesbach, Traunstein kaj eĉ en Linz/Donau! Ili skribis 550 leterojn kaj 1922 fondis ankaŭ propran distriktan asocion, prezidanto fariĝis Deubler, sekretario Winter, kasisto Hauber

(kiu ankaŭ post la 2a mondmilito dum jardekoj kunlaboris en la sama funkcio en Munkena E.-grupo Laboro!). Cetere ne estas multe rakontinde pri E.-vivo en Munkeno dum tiu jaro. Interese, ke komence de 1922 grupo Altstadt (denove) ŝanĝis nomon kaj kiel Esperanto-Klubo Munkeno aliĝis al GEA. Germana Esperanisto informas dum tiu jaro ankoraŭ 6-foje pri paroladoj, kursoj kaj ekzamenoj en Munkeno, ankaŭ de laborista grupo (ĝi informas en ĵurnalo pri kurso je Laborista Akademio kun 100 personoj). Okazis laŭ klub-aktoj kiel kutime jaraj kunvenoj (E.-Klubo posedis nur ankoraŭ 30 membrojn, laborista grupo estis duoble forta, -sed ili ankaŭ disdonis dum tiu jaro 20.000 flugfoliojn!), karnavala, Zamenhofa kaj Kristnaska aranĝoj, - sed iu vere grava afero ne okazis en Munkeno dum tiu jaro.

1923 alportis ĉiam pli grandan inflacion: Monatan kotizon oni fiksas per ekvivalento de 500 g da markbutero, -kaj tial eblis donaco de E.-Klubo al Esperanto-Instituto por Germanujo pri 20.000.--M! Cetere (denove) ne okazis gravaj ŝanĝoj en la Munkena E.-vivo: Je jaraj kunvenoj la malnovaj estraranoj estis denove elektitaj, E.Klubo atingis 45 membrojn, ĉiuj grupoj aranĝis kursojn kaj dum Majo denove efektiviĝis lingvaj ekzamenoj kun entute 39 kandidatoj, sed ĉi-foje ne nur el Munkeno, sed ankaŭ el Sud-Bavarujo). Malbona okazaĵo estis la malpermeso de Germana metia ekspozicio, tie afiŝi por Esperanto, - ni rememoras, ke 1912 la urbo Munkeno tiam donacis al la esperantistoj 500.-M por subteni propran standon, kiun poste vizitis la Bavara Princregento, bedaŭrinda ŝanĝo! Dum oktobro petis Winter eksigon kiel 2a prezidanto, ĉar li devus estri multe da E.-kursoj, anstataŭis lin k-do Heindl. Fine de jaro laborista grupo devis translokiĝi de sia longjara renkontejo al nova restoracio Schillerhof, - kie ili restis ĝis disbato 1933, kaj kie ankaŭ post 2a mondmilito la Munkenaj esperantistoj unue renkontiĝis! Je komenco de 1924 informas Germana Esperantisto pri Munkeno: Kartelanoj 8 societoj kun entute 180 membroj... Rezulto de la pasinta jaro: Malmulte da progreso ĉe ne-laboristaj rondoj, kontentige inter laboristaro. La gazetoj pli favoraj ol antaŭe. Deubler aliflanke plendis je jarakunveno komence de Januaro pri mankinta eĥo de sindikatoj kaj partioj, sed bona resonado je Bavara distrikto, kiu nun ĉirkaŭis 18 grupojn kaj preskaŭ 400 membrojn. Nova nomo kaj novelektita kiel 1. sekretario estis k-do Flatz, kiu same kiel k-do Bitzer (kiun la laborista grupo elektis kiel delegiton por ĉi-jara kongreso en Chemnitz) ankaŭ post 2a mondmilito multjare treege kunlaboris je grupo Laboro. La monatan kotizon oni plialtiĝis de 0, 2o al 0, 3o RM (kaj ek de 1a de Julio al 0, 75 RM). Fine de Januaro Klubo ankaŭ elektis ĝisnunan estraron denove, sed dum oktobro rezignis Jacob, kaj Koch, kiu fakte jam dum lastaj jaroj estis la spirito de ĉio, fariĝis 1a prezidanto. Li ankaŭ estis la instruisto, kiu en Deutsche Stunde in Bayern ek de Oktobro prizorgis radio-Esperanto-kurson; aliajn kursojn en Volkshochschule estris Dr. Francke kaj Deubler. Je filatelista ekspozicio dum Julio ricevis 1.200 vizitintoj E.-flugfoliojn. Tre grava tiam estis en Genf decido de Ligo de Nacioj dum 20an de Septembro, akcepti Esperanton kiel permesatan lingvon je telegrafio kaj telefona radio. Tiuj okazaĵoj kunhelpis denove atingi pli grandan nombron da interesitaj homoj, laboristoj informis vintre pri 6 kursoj kun 140 komencantoj; k-do Späth fariĝis 2a prezidanto, ankaŭ li poste je grupo Laboro restis longjare fidela membro.

1925 komenciĝis jam iom komplike por laboristaro, ĉar ili ne trovis k-don, kiu estis preta labori kiel 2a prezidanto, - do, oni decidis momente rezignacii. Mi ankaŭ ne scias, ĉu ili en postaj jaroj posedis 2an prezidanton, ĉar la ĵurnalo de la laboristaro finas je 2a de Decembro, kaj poste mi nur trovis malofte informojn pri ili en Germana Esperantisto. Sed cetere la grupo dum 1925 estis ankoraŭ sufiĉe vigla; laŭ la konstato de Deubler, ke Esperanto estus precipe afero de iom malaltaj popoltavoloj, laborista grupo sukcesis malfermi novan grupon Westend kaj vintre komenci novajn kursojn kun 90 komencantoj, do, ili estis iom kontentaj. En Klubo oni decidis esti kuraĝa, kaj invitis la venontjaran (15an) GEA-Kongreson al Munkeno, kaj 14a GEA-kongreso en Magdeburg akceptis tiun inviton. Antaŭe necesis garantiaĵo de 1.000.- RM, kiun la Munkenanoj devis kolekti kaj je kiu ankaŭ laborista grupo kunhelpis. Oni poste fondis Lokan Kongres-Komitaton (LKK), al kiu ĉefe apartenis Dr. Francke, Koch, Tressel, Bernhard (de la katolika grupo) kaj Schmalzl (de la Bavara distrikto). La sekvontaj bultenoj de Klubo (kiujn ili ek de 1924 neregule aperigis) nun same varbis por kursoj por pliperfektigi en Esperanto, publikaj paroladoj kaj partopreno je la kongreso 1926. Kongreskotizo estis 5.-RM. La unue planitan daton de Pasko oni poste devis ŝanĝi al Pentekosto. La programo montris i. a. Pentekostan vendredon gvidadon tra

Löwenbrauerei, Pentekostan sabaton gvidadon tra la urbo kaj Interkonatiĝan Vesperon en Augustinerkeller, Pentekostan dimanĉon solenan malfermon en la malnova urbdoma salonego - kiel reprezentanto de la urbo aperis antaŭa 1a urbestro, nuna urbkonsilisto Schmidt, kiu fervore kontraŭis furiozajn atakojn de dekstre-radikaluloj, kiuj provis identigi sovetan kaj Esperantan stelon-cetere multajn labor= kaj fak-kunsidojn, krome vizitadon de Germana Muzeo kaj Pentekostan mardon ekskurson al Garmisch-Partenkirchen kaj fine grandan varbvesperon kun propagandparolado. Dum kaj por la kongreso aperis profesia publikaĵo Das Esperanto als Kulturfaktor kun tre interesaj artikoloj (estis volumo 6 de tiu serio). Fakte partoprenis ĉirkaŭ 300 gesamideanoj, kiuj laŭ Germana Esperantisto ĉiuj estis tre kontentaj, - kio certe ankaŭ validis por la LKK kaj la aliaj Munkenanoj, kiuj vigle kunlaboris kaj preparis. Cetere dum la jaro okazis la kutimaj jaraj renkontiĝoj (Klubo ricevis novan 2an prezidanton Friedrich Hell, Koch restis 1a), ni legas, ke E.-grupo de policistoj ampleksis pli ol 70 membrojn, kaj pri sukcesplena Zamenhofa festo. Interese ankoraŭ, ke nun laŭ Germana Esperantisto en Bavarujo ekzistis 3 ekzamenkomisionoj, nome en München, Nürnberg kaj Augsburg, kaj en Munkeno apartenis al ĝi studprofesoro Lang, advokato Dr.Francke, Deubler, Koch kaj kooperatoro Lukas.

1927 ni ne multe aŭdas pri la Munkena E.-vivo. En la kartelo estas ankoraŭ 5 grupoj, estraranoj Dr.Francke kaj Koch estis denove elektitaj. Sukcesis per granda vitroafiŝo en la ĉefstacidomo milojn da ĉiutage pasantaj vojaĝantoj atentigi pri Esperanto; ĝi nomis inform= kaj la kunvenadresojn. Aperis La Esperantisto en Germanujo, gvidlibro tra la germana lingvo de Hans Koch kiel gramatiko de la Germana lingvo en Esperanto. Je eksterordinara kongreso de Laborista Esperanto-Asocio Pentekoste en Leipzig Deubler elektiĝis kiel 1a prezidanto, -kaj ankaŭ iomete tipe: Dum Oktobro ne invitis Klubo sed la Munkena laborista E.-grupo al 40 jaroj Esperanto. Krome estis dum Oktobro kapableco=, kursestra kaj instruista ekzamenoj, kie Dr.Francke, Koch kaj Deubler formis la komisionon, partoprenis 19 kandidatoj, plej multaj el Munkeno, Pasing, Dachau kaj Untermenzing. Grava komuna afero estis nun dum Decembro peticio de la E.-karteloj en Munkeno kaj Nürnberg kun subteno de GEA kaj LEA al Bavara Lando-Parlamento, ke oni, kiam ekzistus emo, permesu nedevigan E.-instruon je ĉiuj mezlernejoj en Bavarujo.

1928 la Bavara Lando-Parlamento pritraktis tiun peticion; dank'al Arbeiter-Esperantist (oficiala organo de la Laborista Esperanto-Asocio por la Germanlingvaj regionoj), kiu grandpaĝe informis, ni scias tre detale pri la diskutado: Unue la referanto de la Bavara Popolpartio iom kontraŭis, precipe pro financaj problemoj, sed la kun-referanto Dr.Hoegner de la Socialdemokrata Partio-kiu post la 2a mondmilito ankaŭ estis kelkan tempon Bavara ministroprezidanto - subtenis la peticion pro celtaŭgeco de Esperanto. Tre maliĉe tiam kontraŭis la nacisociista parlamentano, ĉar E. estus eltrovita de judo, kaj kiel konate la judoj jam ĉiam estus kontraŭ la Germana kulturo. En la saman noĉon batis la germanacia deputito, kiu krome altiris Idon por malaltigi Esperanton. La komunista parlamentano denove laŭdis Esperanton, kiu estus treege facile lernebla por multaj homoj/popoloj, -sed Bavara Kulturministro diris, ke oni devus ankoraŭ atendi, ĝis opinioj estis pli certaj. Dr.Hoegner kontraŭis tiun atendon kaj proponis pozitivan decidon, sed, ĉar la unua referanto denove substrekis la laŭdire financajn problemojn, parlamento kontraŭ la voĉoj de socialdemokratoj kaj komunistoj decidis, ne akcepti la peticion. Certe bedaŭrinda rezulto, kaj ankaŭ jam iom da averto por faŝista estonteco! Cetere dum la jaro okazis kiel kutime diversaj varbparoladoj, kursoj, aranĝoj; kartelo nun ankaŭ eldonis propran varbfolion, - malgraŭ tio membraro iom plimalgrandiĝis, unuflanke, ĉar la vigleco de multaj malnovaj anoj laciĝis, kaj aliflanke, ĉar la ekonomia situacio komencis plimalboniĝi, jam ekzistis sufiĉe multaj membroj, kiuj ne plu povis pagi la kotizon. Do, je jarfino la Klubo posedis nur ankoraŭ 28 membrojn.

Dum 1929 ankaŭ ne estis multe por rakonti. Nature okazis kiel dum antaŭaj jaroj jarkunsidoj, per informiloj Klubo atentigis al kursoj, diskutvesperoj, prelegoj ktp., tamen rilate al problemoj de novaj membroj skribis Koch je 19a de Februaro al Deubler tre interesan leteron, el kiu mi rajtas poste laŭvorte citi (kaj certe ankoraŭ hodiaŭ multaj aliaj tute konsentas):

Sie müssen denken, daß die Leute bei uns "Beamte" sind, die mit der Tatsache, daß sie nun versorgt sind, sich voll zufrieden geben und oft eine geistige Betätigung als nicht zum Dienst erforderlich für

überflüssig halten.

(Traduko: Pripensu, ke la homoj

ĉe ni estas burokratoj, kiuj estas tial, ke ili ricevas certan renton, tute kontentaj kaj ofte opinias, ke intelekta okupo kiel por la servo ne bezonata estas nenecesa.)

Dum Junio oni festis en Nürnberg 20-jaran jubileon de Bavara Landa-Ligo, kaj dum Oktobro okazis en Lindau lingvaj ekzamenoj per la Munkena ekzamenkomitato, sed, same kiel traveturon de karavano al E.-kongreso en Budapeŝto certe kelkaj Munkenanoj uzis por kontakti kaj praktiki, la plimulto ŝatis iom dormeti. Pro tiu mankinta vigleco ankaŭ ne okazis festo je 25-jara fondiĝo de grupo de 1904, - aliflanke la 5an de Oktobro la laboristoj festis sian 20-jaran jubileon! Ili ankaŭ fondis Laboristan E.-Ligon en Munkeno kaj ĉirkaŭaĵo, 1a prezidanto fariĝis Deubler, kaj ili organizis kursojn en Innere Stadt, Süden, Norden, Osten, Westen, Moosach, Allach, Dachau kaj Unter-Menzing, - do, tie Esperanto ankoraŭ iomete prosperis.

1930 komenciĝis kiel regule kun jaraj kunvenoj, -neniuj estrarŝanĝoj- kursoj kaj paroladoj. Klubo posedis ankoraŭ 27 anojn. En Germana Esperantisto ni legas pri Paska kunveno de Bavara Esperanto-Ligo (kiu inter krampoj nomiĝas: Landesverband Bayern des Deutschen Esperanto-Bundes E.V.) en Munkeno, kie oni preparolis novan statuton kaj povis konstati kontentigan evoluon de la ligo, - ŝajnas, ke oni sin mem trompis. Tamen, je jarfino ankoraŭfoje iom nova impeto: En Süddeutsche Sonntagspost aperis granda intervjuo kun s-ano Hell (kiu jam de 1926 anstataŭis Dr. Francke kiel 1a prezidanto en Munkena kartelo), en kiu li i.a. diris (tradukite):

E. estu mondhelplingvo, kiu ofertas al ĉiu, kiu posedas nek tempon nek monon, eblecon eksterlande pri ĉio kompreniĝi. Ke oni jam ekkonis tiun ĉefan celon, pruvas la fakto, ke la Munkena E.-laboristaro estas la plej forta grupo, ĉar ĝiaj membroj (ĝenerale laboristoj) ne posedas la eblecon lerni kelkajn fremdlingvojn, sed ankaŭ emas eksterlanden.

Rekompenco por tiu intervjuo estis la promeso, senkoste instrui E. 10 semajnojn al la legantaro de ĉi-gazeto, - kaj vere anoncis sin 160 partoprenontoj, de kiuj Hell post sukcesa enkonduka parolado en Teknika Altlernejo instruis mem 120, Koch 40 aliajn, kiuj jam scipovis fremdan lingvon. Certe kartelo povis esperi pri novaj membroj, des pli, ĉar pli ol 70% de partoprenintoj restis ĝis fino de kurso je 22a de Februaro 1931. Sed tiam ekestis bedaŭrinde ankaŭ personaj problemoj inter Hell (kiu estis/sentis sin profesie la pli altranga oficisto) kaj (malpli altranga oficisto) Koch; tiom pli, ĉar en Klubo estis Koch la unua kaj Hell la dua kaj en kartelo estis inverse! Ekstere oni ne trovis vere kontentigan solvon por daŭrigi la kursojn, kiuj ĝis nun ja okazis senkostaj, - sed la instruejoj kostis luprezon, kiun neniuj posedis! Koch informis en tre interesa letero al GEA pri la situacio en Munkeno, kaj i.a. konstatis, ke E.-grupo de 1904 ne plu ekzistis pro manko da membroj, same kiel katolika grupo, ĉar Lukas profesie transloĝiĝis, kaj bedaŭrinde li nun ankaŭ devis skribi malbonajn informojn rilate laborista grupo. Por laboristoj monda ekonomia bankroto-ĝi kaŭzis fine de 1932 ĉirkaŭ 30 milionojn da senlaboruloj, sole en Germanujo 7 milionojn- estis nature precipe peza, ĉar ili ja ne posedis iun kroman monon. Tial ankaŭ la kvereloj inter la laboristaj partioj pligrandiĝis, - kaj tio montris nature konsekvencojn ankaŭ je Munkena laborista E.-grupo: Ili disfalis, la malpli granda radikala parto tute neis kunlaboron kun kartelo, la pli granda, modera grupo de Deubler volonte kunlaboris, sed ne posedis monon. Do restis kvazaŭ sole Klubo, kiu konsistis el ankoraŭ nur 27 membroj; sed almenaŭ ili ĉiuj bone estris la lingvon kaj nature varbis por Esperanto ĉiam, se eblis. Tiumaniere ili povis vidi fine de Oktobro sukcesstravivaĵon: La Munkena UEA-delegito Tressel ricevis de s-ano Anton, grafo de Pestalozza, inviton paroli en Rotary-klubo pri Esperanto, kaj je tiu parolado partoprenis i.a. poeto Thomas Mann, generalmuzikmajstro Hans Knappertsbusch, intendanto de la Nacia Teatro barono de Franckenstein, rektoro de la Teknika Altlernejo sekreta konsilisto Dantscher kaj multaj aliaj eminentuloj, kiuj poste ĉiuj tre aplaŭdis; dum la diskuto grafo de Pestalozza ankoraŭ menciis, ke ĵus aperis nova gazeto de Rotary en Esperanto! Nature tio estis kuraĝiga afero, sed bedaŭrinde ekstere ne multe helpis, same kiel la aliĝo de jam tiam famkonata bavara humoristo Michel Ehbauer (kiu ankaŭ post 2a mondmilito dum multaj jaroj ĝojigis la s-anaron) ek de unua de Novembro. Jam dum Kristnaska festo kun ĉirkaŭ 60 partoprenintoj Ehbauer aktive kunlaboris per humoraj kantoj

ktp., - kaj la konsekvenco: Je jara kunveno 1932 li fariĝis 2a prezidanto de Klubo, ĉar Hell rezignis (1a prezidanto nature restis Koch). La Klubo posedis ĉiam ankoraŭ 27 membrojn, - ili konsentis deposti multjara tian varbado unuan fojon rezigni pri Esperanto-kursoj, ĉar ekstera financa situacio estus tro malbona! Tamen, inter si ili ne volis perdi la bonan humoron kaj tial ili aranĝis (ankaŭ kun bona sukceso) karnavalan feston, - kiun nature jam Ehbauer estris.

En Germana Esperantisto ni ankoraŭ povas legi pri diversaj referatoj kaj prelegoj, precipe ankaŭ pri problemoj kun latina lingvo kiel monda helplingo, cetere oni nenion plu scias pri Munkeno mem kaj nur kelkfoje informis pri renkontiĝoj de Bavara E.-Ligo en Regensburg kaj Ansbach. Sed nun komenciĝis nova kaj malfeliĉa jaro 1933.

Je 13a de Januaro okazis la kutima jara kunveno en Klubo; Koch kaj Ehbauer restis estraranoj kiel antaŭe, Klubo posedis ankoraŭ 25 membrojn. kaj nun okazis vere tre interesa evento: Por aktivigi la membrojn Klubo decidis, aranĝi komune tiel nomatan Vivantan Gazeton, kie ĉiu de la partoprenantoj skribis/aldonis iujn (plej ofte humorajn) tekstojn; tiu gazeto aperis je 2a de Februaro kaj enhavis i.a. jenan raporton de iu Jos.Greil, Dipl. Volkswirt pri - kelkmonate poste certe danĝera - (fantazia)

Intervjuo kun Adolfo Hitler.

Kiel raportisto de la "Vivanta Gazeto" en la "Brundomo".

Je la deka horo antaŭtagmeze. La bruna domo situas en vintra suno. Bluokulaj, blondharaj junuloj en bruna uniformo promenas antaŭ la brunpalaco en Briennerstrato. Mi forlasas la verdstelan aŭtomobilon de nia verdsentanta redakcio kaj supreniras la ŝtupojn. La soldato antaŭ la pordo levas la manon je la saluto "Vivu Hitler!" Mi montras mian preskarton

kaj povas pasi. Kvin minutojn poste mi iras tra la tapiŝkovrita vestiblo. La granda "tamburisto" staras je la fenestro kaj ludas kun kurtenŝnuro. Li turnas sin kaj petas sidiĝi. Tuj li komencas sian paroladon. La frazoj estas pezegaj. Estas ĝojo vidi, kiel Hitler regas la materion. Li ankaŭ scias ĉion pli bone. Pardonu --- mi demandas, -- kiel vi opinias reĝimon de la plej granda ŝparemo?

Nu, tio estas tre simpla, diras Hitler. La oficistoj kaj laboristoj ne plu ricevas monon. Do, ili estos edukataj je ŝparemo. Mia dua demando:

Ĉu vi kredas, ke Germanujo povas eksporti germanajn komercaĵojn, se ĝi ĝispremos la Ĉimporon? Hitler piedobatas. "Kiu kontraŭstaros al mi, tiun mi disĵetos". Ankoraŭ sub la ĉpordo mi demandis: Kaj la satiraj ĵurnaloj, ĉu ĉiuj ĉi estos malpermesataj en la Ĉ"tria Regno"? Ĉefe tiujn mi malpermesos en mia regno, respondis Adolfo, ĉar en mia Ĉregno neniu ridos pri io.

Rimarko de la Redakcio: Tiu ĉi raporto estis verkata jam antaŭ la 30a de januaro. Dume Fortuno donis al Hitler la tutan potencon kaj la sekvontaj tempoj montros, ĉu li savos Germanujon. La aŭspicioj estis ne tro grandaj: Je la tago de la potencakcepto estis glitvetero----- ĉu la nova kanceliero glitos?-----

Kaj jam komenciĝis la malfeliĉo: Dum Klubo ankoraŭ laboris kiel ĝis nun, GEA forsendis je 25a de Marto cirkuleron, ke la Laborista E.-Ligo estis malpermesata, oficejon fermis la polico; ĉar eblus, ke ĝisnunaj anoj de tiu malpermesita organizo provus aliĝi, GEA urĝe rekomendas atentigi ilin al senpolitika neŭtraleco de la asocio. Je 7a de Aprilo estis planita prelego de Deubler, -ĉu ĝi vere okazis, mi ne kapablis eltrovi. Mi mem rememoras, ke oni post milito rakontis, ke Deubler, Winter kaj Bitzer estis estintaj en koncentrejo Dachau, sed kiam, kiel longe ktp ne estis dirite. Sed ĝenerale oni rajtas diri, ke tiam ankoraŭ GEA kaj (ankaŭ la Munkenaj) membroj esperis, ke temis nur pri nedaŭra tendenco: Oni ja

akceptis la nacian pliboniĝon, sed nature la Interna Ideo de Esperanto, - kiun granda plimulto de aktivaj Germanaj esperantistoj ĉiam preskaŭ same atestimis kiel la lingvon mem- tute malpermesis malamikecon kontraŭ alilandanoj kaj rasan diskriminacion precipe kontraŭ judoj! Kaj nun problemoj de GEA atingis ankaŭ Munkenanojn: Dum aŭtuno GEA fariĝis samformita laŭ gvida-principo, -kaj tial je eksterordinara kunsido restintaj 22 membroj de Klubo elektis la 1an prezidanton Koch kiel Obmann = estron (kio ne multe ŝanĝis, ĉar Koch praktike jam delonge ĉiam ĉion sole decidis pro manko de aliaj samgravaj aktivuloj) kaj cetere kartelo perdis rajtkapablecon kaj estis elregistrita! Dum sekvantaj jaroj la ekstera aktiveco de Munkenaj esperantistoj ĉiam pli kaj pli plimalgrandiĝis: 1934 oni festis ankoraŭ en malgranda cirklo de Koch la 25-jaran feston de esperantistiĝo, sed je jarfino restis ankoraŭ nur 18 membroj, de kiuj kelkaj eĉ delonge ne plu pagis kotizon.

1935 Koch devis doni al politika polico liston de ĉiuj membroj kaj skribis private al iama esperantisto, ke estus pli bone, vorton Esperanto tute ne elparoli, por eviti molestiĝi; en letero al tiama GEA-estro li plendis, ke ankaŭ en Germana Muzeo la ĝis tiam troveblaj E.-gazetoj kaj =vortaroj estis forigitaj, kaj skribe opiniis, ke oni nepre devus atendi estontajn progresojn je politika kampo, antaŭe oni nun laborus por Esperanto, - aliflanke oni publike fariĝu neŝatata. Cetere Koch jam en antaŭaj leteroj kelkfoje informis, ke la Munkenanoj tute ne dezirus fariĝi membroj de Deutsche Arbeitsfront (Germana Laborfronto), kaj se leĝe tio estus devigo, tiam ĉiuj eksiĝus, -sed ili poste same kiel nun renkontiĝus en restoracio, kunsidus kaj inter si parolus Esperante! Apude dirite GEA tiam ĉiam ankoraŭ posedis pli ol 1800 pagintajn membrojn.

Sed 1936 nun fakte venis (almenaŭ por 10 jaroj) la oficiala fino. Ankoraŭfoje Koch devis doni liston de membraro dum Januaro al la polico, Klubo posedis ankoraŭ 17 membrojn. Dum Marto tiea estro Schmalzl en konsento kun Koch malfondis Bavaran Esperanto-Ligon. Ehbauer partoprenis ankoraŭ kiel reprezentanto de Munkeno kaj anstataŭanto de Koch Germanan E.-Kongreson Pentekoste en Weimar, sed kelkajn semajnojn poste sekvis rondletero de GEA pri malpermeso de E.-movado, kaj je 15a de Julio 1936 GEA kun ĉiuj grupoj inkluzive de la Munkena Klubo malfondiĝis!

Esperanto-Gruppe „Laboro“
München 23 - Postfach 47

9. 2. 1946

Kara samideano!

- 1.) Die praktische Arbeit der Gruppe beginnt. Jeder weitblickende Gesinnungsfreund wird aufgefordert, seine ganze Kraft in den Dienst der hohen Idee der Völkerverständigung als Voraussetzung eines dauernden Völkerfriedens zu stellen.
- 2.) Haben Sie schon Ihren Beitritt zur Gruppe erklärt? Wenn nicht, so senden Sie bitte die beiliegende Beitrittserklärung ausgefüllt zurück. Die Aufnahmegebühr beträgt 50 Pfg., der Mitgliedsbeitrag pro Monat 50 Pfg. Erscheint Ihnen der Beitrag zu gering, so vergessen Sie nicht, eine **Spende** beizufügen. Minderbemittelte zahlen pro Monat 30 Pfg. Nationalsozialisten können erst nach erfolgter Rehabilitierung Mitglied werden.
- 3.) Sind Sie zur aktiven Mitarbeit bereit, so schreiben Sie bitte umgehend wie Sie sich die Mitarbeit denken. (z. B. Kursleiter)
- 4.) Wer in seinem Wirkungskreis einen eigenen Kursus zusammenstellen kann oder eine örtlich abgegrenzte Sektion zu übernehmen bereit ist, mache möglichst ins Einzelne gehende **Vorschläge** über Versammlungsraum, Zahl und Zusammensetzung der Teilnehmer, Versammlungszeit usw. Jeder Kursus- und Sektionsleiter muß den **großen politischen Fragebogen** ausfüllen, der dann zur Beantragung der Genehmigung von der Gruppe an der zuständigen Stelle eingereicht wird.
- 5.) Jeder möge alle seine Kraft verwenden, um ständig neue Mitglieder zu werben. Es muß gelingen, noch vor dem Frühjahr die Zahl der Mitglieder zu verdreifachen! Nur eine einheitliche und starke Organisation kann in der Öffentlichkeit die gewünschten Erfolge erreichen.
- 6.) Die ersten regelmäßigen Versammlungen der Gruppe finden statt:
 - a) Jeden 1. und 3. Samstag im Monat von 15.00 — 17.00 Uhr in der „Seerose“, Feilitzschstr. 32. 15.00 — 16.00 Uhr sprachliche Übungen für Anfänger. (Leitung R. Bitzer) Anschließend Vorträge und Besprechungen in Esperanto und Deutsch, Organisationsfragen.
1. Zusammenkunft am Samstag, den 2. März 1946.
 - b) Jeden 2. und 4. Samstag im Monat von 17.00 — 19.00 Uhr im „Schillerhof“, Schillerstr. 28. 17.00 — 18 Uhr sprachliche Übungen für Fortgeschrittene. (Leitung L. Speth) Anschließend Vorträge u. Besprechungen in Esperanto. Organisationsfragen in Deutsch. 1. Zusammenkunft am Samstag, den 23. Februar 1946.
- 7.) Für die demnächst im großen Stil und unter Mitwirkung bekannter Münchner Künstler geplante **Werbeversammlung** für Esperanto schon jetzt in Bekanntenkreisen werben! Es müssen **mindestens** 1000 Personen anwesend sein!
- 8.) Es ist beabsichtigt, in Verbindung mit einem Esperanto-Verlag eine zweisprachige Zeitschrift „**La Ponto**“, die Brücke zwischen den Völkern herauszugeben, die allen Gruppenmitgliedern kostenlos zugestellt werden soll.
- 9.) Neubeginn von Kursen wird den Mitgliedern laufend mitgeteilt.

Mit Esperantogruß!

Der erweiterte Vorstand:

Dr. S. Ziegler

1. Vorsitzender

R. Keller

2. Vorsitzender

A. Hauber

Kellierer

K. Wurm

Schriftführer

R. Bitzer

L. Speth

H. Tresselt

} Beirat

Nova komenco (1945 - 1948)

Kvankam dum Tria Regno la E.-organizoj estis devige malfonditaj, Munkenaj esperantistoj, same kiel en aliaj germanaj urboj, ne tute rezignis. Ili renkontiĝis regule private (iom neleĝe) en diversaj restoracioj, sed dum milito ek de 1942 bombaj detruoj ĉiam denove necesigis ŝanĝojn, ĝis dum Januaro 1945 la milito interrompis ĉiun kuneston por kelkaj monatoj. Kelkajn tagojn post okupado de Munkeno per Usonaj soldatoj 2a mondmilito finiĝis. Unue nun oni devis konstati la perdojn kaj vundojn, sed ankaŭ vidi, kio restis kaj eblis. Tiel en Germanujo, nature ankaŭ en la uson-okupita regiono kaj tie ĉefe en Munkeno kolektis sin la esperantistoj, ne nur la iamaj enloĝintoj, sed ankaŭ sufiĉe multaj, kiujn la milito alportis tien. Oni renkontiĝis kiel dum la pasinteco en Schillerhof, kie ek ankoraŭ ekzistis ŝranko kun E.-aĵoj el tiama tempo, kaj post kelkaj monatoj Deubler jam provis ricevi permeson por ree fondi Esperanto-grupon, sed unue sensukcese. Tamen oni renkontis sin regule, -denove iom nelegale. Tial unue granda konsterniĝo, kiam je unu vespero usonana oficisto venis en la restoracion, - kaj des pli surprizo kaj ĝojo, kiam li alparolis la ĉeestintojn en Esperanto! Verŝajne tiu kontakto ankaŭ helpis, ke kelkajn monatojn poste al Dro Siegfried Ziegler -kiu nun longjare restis la grava persono de Esperanto en Munkeno kaj ankaŭ internacie akceptita de ĉiuj institucioj-je 2a de Decembro 1945 milita registaro permesis fondiĝon de Munkena Esperanto-grupo Laboro. Dum Januaro 1946 tiam okazis la unua Generala Kunsido kun pli ol 100 gesamideanoj. Je la baloto Dro Ziegler - kiu laŭ tiama militistaj reguloj ankoraŭ persone devis respondi por la grupo- fariĝis 1a prezidanto, 2a prezidanto Rudolf Keller, kaj inter la ceteraj estraranoj ni trovas aliajn konatajn nomojn kiel Bitzer, Hauber, Speth, Tressel kaj Wurm - vidu kopion de rondletero de 9.2.1946 - kaj ekestis nun grandega varbado: Mono antaŭ la monreformo ja ne plu estis problemo, sed multe pli malfacile estis ricevi la paperon por la varbado! Tial ankaŭ apero de Ponto, kiun la rondletero de 9.2.1946 jam notis, daŭris multe pli longe ol antaŭe pensite: La unua numero aperis dum somero 1947. Sed intertempe la membraro jam treege kreskis. Dum Marto 1946 ni legas en rondletero de E.-Gruppe "Laboro", ke grupo jam tiom pligrandiĝis, ke necesus labor-divido en sekcioj. La tiama urba lerneja konsilisto Dr. Fingerle, kiu poste ankaŭ scipovis paroli Esperanton kaj multajn jarojn subtenis ĝin laŭ eblecoj, publikigis en ĉiuj Munkenaj popollernejoj inviton al instruistaro, partopreni specialajn E.-kursojn por posta E.-instruado al la lernejoj. Eĉ radio Munkeno (tiam ja ankoraŭ sub milita registaro) sendis intervjuon pri Esperanto. Dum printempo nun ankaŭ komencis ekesti junulara grupo; la poste kelkjara ĉefo de ĝi Hermann Heiŝ raportas, ke li tiam legis en gazeto junulalvokan artikolon pri E., iris al renkontejo, - kaj konstatis, ke kun li nun estis junuloj! Tamen ili diligente varbis, kaj post 2 jaroj la junulargrupo posedis proprajn statutojn, estis tre ŝatata membro de distrikta junular-ringo, posedis ĉirkaŭ 100 membrojn, kiuj aperigis ek de Junio 1948 eĉ propran gazeton. Ni posedis mem 7 urbajn sekciojn, kaj entute montris tiaman deziron de Germana junularo, post longaj jaroj de izoleco nun aktive kontakti eksterlanden. Sed ni revenu al 1946. Grupo Laboro tiam tiom kreskis, ke la ĝisnuna renkontejo (apuda ĉambro) en Schillerhof ne plu sufiĉis!!

Per kontaktoj oni rajtis nun dum jaroj kolektiĝi en salono de urba gasfarejo Unterer Anger. Entute la Munkena grupo bedaŭrinde posedas nun nur ankoraŭ malmultajn dokumentojn pri tieaj aferoj kaj aranĝoj dum la jaroj 1946 kaj 1947. Sed mi bone scias, ke dum tiama tempo plimulto de la aktivuloj kaj estraranoj (ankaŭ d-ro Ziegler) apartenis al SAT, kaj tial komence la aliaj sentis sin iomete neagrabla. Tamen, ankaŭ se en grupo Laboro la laboristoj iom estis pli gravaj, ne estis en malamika, komunista maniero, sed ĝenerale en konsento kun la burgxoj. Same okazis en aliaj (okcident-) germanaj E.-grupoj, kaj do ili kune (re-)fondis la 12an de Aprilo 1947 GEA = Germana Esperanto-Asocio = "Deutscher Esperanto-Bund" kiel komunan kaj neŭtralan organizon por ĉiuj Germanaj esperantistoj. Dro Ziegler fariĝis 1a prezidanto; sidejo estis Munkeno, kie Engelbertstr.7 Dro Ziegler loĝis kaj laŭ licenco n-ro V 189 de 6a de Februaro 1947 ricevis la rajton, malfermi sian eldonejon (kun libroj por/en Esperanto, interalie poste aperis tie Ponto, la oficiala organo de GEA, unuan fojon dum Julio/Aŭgusto 1947). Fakte la unuaj informiloj ĝis novembro nomis tamen ankoraŭ kiel eldoniston E.-grupon Laboro. En informiloj kaj en Ponto oni urĝe

petis helpo per sendado de uzita papero kaj krome konatigis, ke verŝajne ne eblus, sendi al ĉiu membro 1 ekzempleron pro manko de papero! Tamen Munkenaj esperantistoj nun agis tre kuraĝe kaj en konsento kun GEA decidis, organizi Pentekoste 1948 la unuan postmilitan Germanan Esperanto-Kongreson kaj helpe de junularo krome postkongresan internacian Esperanto-junularan tendaron en Garmisch-Partenkirchen! Je la tiama tempo, kiam (escepte la nevalora mono) ĉio mankis, ĉefe manĝaĵoj kaj loĝejoj, tiu invito certe estis granda risko. kaj ekz. s-ano Koch (kiu kiel burgxo post militfino komence al nova grupo Laboro iom malfidis, cetere plendis, ke prezidanto ne estis skribinta kelkajn afablajn invitvortojn al li, kaj tial nur ek de 1948 denove aktive kunlaboris) skribis ankoraŭ dum oktobro 1947 al p-ro Schmalzl, ke atendo de miloj de partoprenantoj estus krima fantazio; li ankaŭ rememorigis al pasintaj Germanaj E.-kongresoj, kie partoprenis ne multe pli ol 200. Sed li subtaksis la tiaman strebadon de la esperantistoj kolektiĝi. Krome nun en Munkeno ekzistis alia, sufiĉe granda fundamento: Honora prezidanto fariĝis la tiama ĉefurbestro de Munkeno Dr. Karl Scharnagl kaj dank' al lia helpo dum Esperanto-kongreso 1948 Munkeno estis kvazaŭ fermita por ĉiuj aliaj pli grandaj aranĝoj! Ĉiuj hotelaj litoj estis rezervataj sole por esperantistaj kongresanoj, veturis por ili specialaj busoj ktp., -do, Esperanto ĝuis (denove) tiam vere grandan respekton. Sed antaŭe okazis ankaŭ ankoraŭ sufiĉe multaj rakontendaj aferoj: Dum Junio 1947 tre sukcese varbparolis por E. iama kultura ministro de Hessen p-ro Strecker el Gießen. Munkena popola altlernejo ofertis kursojn por Esperanto, Munkena fervojista direkto enkondukis je 10 fervojistaj fak-lernejoj E-kursojn - respondece s-ano Hell, kiu intertempe nun ankaŭ denove trovis kontakton kun Laboro- kaj precipe grava, unue je Ludwig-Maximilian-universitato kaj ek de Januaro 1948 ankaŭ je Munkena Teknika Altlernejo Dro Ziegler rajtis kiel universitata docento prelegi kaj instrui en Esperanto! Kaj cetere je 9a de Januaro fondiĝis Esperanto-Instituto de GEA (d-ro Ziegler, 1a prezidanto), kiu poste aliĝis al universitato Munkeno. Dum Jara Renkontiĝo la 25an de Januaro 1948 tial pro tro multe da laboro dro Ziegler rezignis kiel prezidanto de Laboro kaj fariĝis nun Deubler nova grupestro. En jara raporto ni (hodiaŭ kun envio) legas i.a. pri ĉirkaŭ 6.800 membroj de GEA, de kiuj sur papero 745 anoj apartenis al grupo Laboro, - kiu enspezis 10.000 RM kontraŭ 6.000 RM elspezoj, kaj pri katolika sekcio kun centro en Munkeno, kiu posedis sole en Okcident-Germanujo 500 anoj! Cetere la monda esperantistaro estis tiam tre okupita por kolekti petskribojn al UN enkonduki Esperanton, kaj nature ankaŭ la Munkenanoj tiele aktive helpis kaj kolektis; ili ricevis i.a. la subskribojn de Dr. Michael Horlacher (CSU), prezidanto de Bavara Parlamento-kiu poste ankaŭ estis Honora prezidanto de l' Internacia Junularkunveno post la Pentekosta kongreso-, de Waldemar von Knoeringen, landa estro de SPD, kaj de multaj aliaj Bavaraj parlamentanoj, krome de Bavara kaj Munkena Sindikataj Ligoj, Bavara-SPD (kiu ja ankaŭ jam 1928 voĉdonis por Esperanto kaj kiu 1947 same decidis) kaj Junulsocialistoj. Aliaj progresoj estis konsento de urbo Munkeno doni al sufiĉe granda placo nomon de Dro. Zamenhof kaj informo de Radio Munkeno pri regula E.-elsendado/kurso ek meze de Aprilo. Kaj nun okazis la ĝis nun plej granda Germana Esperanto Kongreso: 2.200 Germanaj, 365 Eksterlandanaj kaj 200 honoraj gastoj anoncis sin kaj je inaŭguro salutis i.a. la Honora prezidanto Dr. Scharnagl, la Bavara Kultura Ministro Dr. Dr. Hundhammer (al kiu la esperantistoj dankis la enkondukon de E. je Ludwig-Maximilian-Universitato kaj Teknika Altlernejo kaj fondo de E.-Instituto, kaj kiu post granda laŭdo por Esperanto eĉ finis esperantlingve per strofo de himno), Urba lerneja konsilisto Dr. Fingerle parolis post ega varbado (sube) sabate al 900 interesuloj en granda aŭditorio de Teknika Altlernejo pri neceseco ankaŭ por filologoj, verki por Esperanto, kaj promesis venontjare mem paroli E.-lingve. Direktoro de milita registaro en Bavarujo, M.D. van Wagoner salutis skribe: The Governor extends to you his best wishes for a most successful Congress, (t.e.: Guberniestro esprimas al vi plej bonajn dezirojn por plej sukcesa kongreso) kaj same Dr. H. Ehard, ĉefministro de Bavarujo deziris bonan aranĝon. Estis vere tre harmonia kongreso. La findecido estis peto al registaroj de ĉiuj Germanaj landoj Esperanton subteni kaj permesi instruon je lernejoj kaj universitatoj, -eĥo bedaŭrinde estis malgranda: Nur el Berlino kaj Schleswig-Holstein venis pozitivaj respondoj, cetere kaj bedaŭrinde ankaŭ el Bavario (malgraŭ la promeso de Dr. Hundhammer kaj la skriba pozitiva resonado de 2/3 de Bavaraj parlamentanoj rilate Esperanton) mankis respondo, do, la resto estas silento!

An die Bevölkerung!

Wer wirkliche **Völkerverständigung** und einen dauerhaften Frieden will, muß eine **Weltsprache** wollen. Damit die Völker sich verständigen, müssen sie zuerst eine gleiche Sprache sprechen. Der Verwirklichung dieses Ideals widmen sich heute schon Millionen in allen Völkern der Erde, in der Erkenntnis, daß **ESPERANTO** der einzige Weg aus dem babylonischen Sprachchaos ist.

Esperanto will keine 1500 Nationalsprachen verdrängen, sondern neben der Muttersprache die Brudersprache sein.

Esperanto ist die leichteste Sprache und ebenso vollkommen wie irgendeine Nationalsprache.

Esperanto verfügt über eine reiche Literatur des In- und Auslandes.

Esperanto vermittelt jedem, der es anwendet, neue Freunde und Verbindungen in aller Welt.

Als Auftakt zu dem großen

Deutschen Esperanto-Kongreß — Pfingsten 1948

in München findet am **Pfingstsamstag um 19 Uhr,**

im Hörsaal 532 der Technischen Hochschule, Eingang Gabelsbergerstr., eine öffentliche Versammlung statt, zu der wir Sie herzlich einladen.

Es sprechen Ausländer aus USA, England, Frankreich, Schweden, Holland und der Schweiz zu uns. Nach den Referaten Aussprache und Fragenbeantwortung.

Eintritt freil

Lie. V. 189

Für das Kongreßkomitee:

Dr. S. Ziegler, Dipl.-Ing. Curt Dellian.

Post la kongreso 300 junaj en- kaj eksterlandaj esperantistoj el 15 landoj, inter ili 20 Munkenanoj, veturis en tendaron je Garmisch-Partenkirchen, kie ĉiuj parolis kaj kompreniĝis per 1 lingvo, Esperanto! Efiko de tiu kongreso kun ekspozicioj, varbkunvenoj, speciala poŝtstampo, kaj informoj en gazetoj kaj radio en Munkeno estis almenaŭ momente sufiĉe granda. Al radio venis tiom da alskribaĵoj, 1362 entuziasmaj kaj nur 1 kontraŭa, ke oni nun 2-foje dum semajno sendis E.-kurson, kaj poste devis ripeti ĝin; same kiel Dr. Scharnagl (CSU) la sekvanta ĉefurbestro de Munkeno, Thomas Wimmer (SPD) subskribis la petskribon al UN, kaj (vidu supre) pli ol du trionoj de Bavaraj parlamentanoj, kiujn oni individue demandis, respondis pozitive por Esperanto. Bavara Instruista Asocio je kunsido en Munkeno Novembre unuvoĉe akceptis Esperanton kiel instrufakon, ankaŭ por popollernejoj kaj rekomendis precipe al junaj instruistoj mem lerni ĝin. Dum Decembro la Esperanto-Instituto okazigis la unuajn diplomekzamenojn en la universitato. Prezidis la anstataŭanto de l' rektoro de la Universitato München, kandidatoj estis: cand.phil. Helmut Angstl kaj dipl.ing. Curt Dellian, ambaŭ Munkeno. Cetere la 12an de Decembro Munkena junulara grupo - kiu intertempe grupiĝis al German Youth Activity (=GYA-Junulklubo Hofbräukeller) aranĝis por ĉiuj grupanoj Zamenhofan Feston kun danco, - kaj tiea salonego estis plenplena. S-ano Koch, kiu intertempe forgesis ĉiujn rezervojn kaj nun denove tute aktive kunlaboris ne nur je Laboro sed ankaŭ kiel membro de direktorio kaj de la oficiala Ekzamen-Komitato de Esperanto-Instituto, festparoladis; krome Michel Ehbauer zorgis pri ridoj ankaŭ je gazetreprezentaj gastoj. Fine, ne estu forgesate raporti pri multaj prelegoj kaj kursoj dum tuta jaro, kiuj helpis, ke pli kaj pli ne nur la SAT-anoj (laŭ membreco ĉirkaŭ kvarono, sed laŭ partopreno je la regulaj renkontiĝoj ĝenerale ĉirkaŭ du trionoj), sed ankaŭ multaj junuloj kaj anoj de la aliaj sekcioj parolis nun je renkontiĝoj nur en Esperanto. Do, entute ni rajtas dum aŭtuno de jaro 1948 konstati ne nur sufiĉe multajn esperigajn faktojn, sed entute, ke E.-movado en Munkeno tiam estis je pinto de sia 100-jara historio: Tre ŝatita kaj subtenita de ĉiuj instancoj kaj kun vere multaj viglaj membroj! Sed, ni ankaŭ ne forgesu la monreformon dum Junio, kiu kaŭzis por multaj Germanoj kaj nature ankaŭ ges-anoj gravajn ekonomiajn kaj financajn malfacilaĵojn, pro kiuj unuflanke jam/ec kotizpagado fariĝis problemo kaj aliflanke interesoj ŝanĝiĝis/reduktiĝis je la ĉiutagaj necesajoj: Fakte (ne nur en Munkeno) la membraro je jarfino plimalgrandiĝis je duono (kaj pli)!

DEUTSCHER ESPERANTO-KONGRESS

MÜNCHEN - PFINGSTEN 1948

Ehrenpräsident: Dr. Karl Scharnagl,
Oberbürgermeister der Landeshauptstadt München

*

Feierliche Eröffnung

am Pfingstsonntag, den 16. Mai 1948, 10 bis 12 Uhr
in der Kongreßhalle des Deutschen Museums

*

PROGRAMM

Präludium und Fuge von J. S. Bach (Orgel)

Es sprechen:

Vertreter der Staatsregierung, der Stadt München, der
Parteien, der Gewerkschaften, der großen Organisati-
onen, führende Persönlichkeiten der Politik, Wissenschaft
und Kunst und Esperantisten aus dem In- und Ausland.

Gemeinsamer Schlußgesang:

La Espero

*

An der Orgel: Prof. Heinrich Wismeyer, München

1949 - 36a UEA-Kongreso 1951

Pri 1949 bedaŭrinde ne ekzistas multaj dokumentoj. Ankaŭ en Ponto kaj en la depost Oktobro 1947 aperinta Esperanto-Post (Dr.Ziegler estis ankaŭ tie dum unuaj jaroj redaktoro) ni ne povas multe legi pri E.-vivo en Munkeno mem. Tamen estis nature grave, ke Munkena centra financoficejo akceptis por GEA la publikan utilecon, kaj ke Munkena distrikta tribunalo ĵurigis Dron Ziegler kiel tradukiston kaj interpretiston por Esperanto, kaj certe interese, ke nun d-ro Ziegler ankaŭ denove estis balotita kiel prezidanto de GEA kaj de la Esperanto-Instituto. Ni trovas informojn pri E.-kurso (ankaŭ inter sindikatanoj kaj nature denove je Universitato kaj Teknika Altlernejo) kaj lingvajn ekzamenojn, cetere pri donaco de 1.000.-GM de Bavara Kultura Ministerio al Esperanto-Instituto.Ekzistas ankoraŭ grupinformilo Nr.4 por Septembro, el kiu ni povas konstati, ke kiel jam delonge je 2 merkredoj de monato renkontiĝis la SAT-anoj kun raportoj de Dellian, Heiß kaj Meusel pri ĉi-jara SAT-kongreso en Parizo kaj prelego de Deubler Nia neŭtraleco;je monata kunsido prelegis s-ano Zeilhofer pri UEA-kongreso en Bornemouth kaj je 4a merkredo kursestris s-ano Koch, kaj ke ekzistis ankoraŭ kelkaj sekciaj renkontiĝoj aliloke kaj alitage. Sed ankoraŭ ekzistantaj tiamaj informiloj de la junularo raportas plie. Ankaŭ dum tiu-ĉi jaro okazis diversaj -karnavala, printempa, somera- festoj, kiujn la junularo aranĝis.Ek de Novembro anoj de Laboro ŝanĝis kunvenejon kaj renkontiĝis en restoracio Zierngibl, kie ankaŭ jam okazis Zamenhofa Festo, je kiu Laboro festis i.a. 8 jubileulojn kiel esperantistojn ek de 40 kaj pli jaroj, nomojn ni bedaŭrinde ne scias.Je jarfino Laboro posedis ankoraŭ 175 membrojn, junularo sur papero 85-sed bedaŭrinde nur 25 pagis kotizon (laŭ informo de nova junulestro K.-Paech)!Pri 1950 kaj 4 venontaj jaroj nun ekzistas grupa protokola libro, kiu pli bone kaj detale informas. Komencu ni kun jarakunveno, kiun partoprenis 55 membroj. Je baloto denove Deubler fariĝis 1a prezidanto, 2a Angstl, protokolanto Hertlein, kiu ankaŭ jam delonge regule kursestris, kaj kasisto ankaŭ jam delonge kaj estonte k-do Hauber; fervojista grupestro Hell sciigis pri bone funkcia grupo E.-vivo. Sed problemoj ekestis nun rilate Radio München;ĝi ja ĉiam ankoraŭ estis sendilo de Usona Milita Registaro, - kaj tial ĝenerale Esperanton tute ne ŝatis, kontraŭe ĉiam propagandis por Angla lingvo (praktiko, kiu ja ĝis hodiaŭ validas, malgraŭ ke nun jam delonge temas pri ĝermana sendilo), do, post fino de ripetita E.-kurso ili plej ofte rifuzis estonte por-Esperantan sendadon. Aliflanke nun venis ankaŭ pozitivaj informoj, i.a. ke sekve de alvoko de d-ro Fingerle anoncis sin 32 instruistoj por lerni Esperanton. Cetere dum Januaro GEA fariĝis je la Munkena distrikta tribunalo enskribita kiel registrita unuiĝo. Dum Februaro sacerdote kaplano Thalmaier, sekciestro de la Germanaj katolikoj, nun ankaŭ sukcesis la E.-diploman ekzamenon je la Munkena universitato.Krome en Marta protokolo ni legas sciigon pri morto de 2 pioniroj: Dr.Francke kaj s-ano Lang, kiuj post unua mondmilito ja estis tre aktivaj. Sed nun denove kuraĝa paŝo: Pro la bonaj spertoj kun la 1a postmilita GEA-kongreso 1948 dum Majo grupo Laboro decidis, nun ankaŭ inviti UEA-Kongreson al Munkeno dum Aŭgusto 1951 - interne oni atendis/esperis tiam ankoraŭ ĝis 5000 gastojn, -kaj junularo (estraro Paech/Angstl) denove estis preta, post UEA-kongreso aranĝi Internacian Junularan Kunvenon (ĉi-foje en prokzimeco de Kochel-See/=lago). Nun oni unue kontaktis kun Bavara registaro kaj urbo Munkeno kaj sukcesis, ricevi invitojn same de ĉefministro Dr.H. Ehard kaj de urbestro Th.Wimmer al UEA, kaj ankaŭ, ke UEA akceptis tiun komunan Munkenan inviton. Konsekvence GEA (kiu nature ankaŭ konsentis) je kongreso 1950 dum Pentekosto en Mainz - kie i.a. s-ano Hell nomiĝis kiel Honora Membro de GEA- decidis, aranĝi venontjare la kongreson ankaŭ en Munkeno dum Aŭgusto je tempo de UEA-kongreso; cetere oni reelektis d-ron Ziegler je liaj oficoj. Dum Junio Laboro elektis LKK (prezidantoj:d-ro Ziegler, kaplano Thalmaier kaj Deubler) kaj komencis la detalan laboron;kelkajn monatojn poste venis UEA-sekretario Nikoleisen (Bern/Svislando) por subteni LKK.Varbado eksteren intertempe montris bonajn fruktojn:ekz. je Stata Konstrulernejo en Munkeno, kie studentoj rajtis elekti por fako ĝenerala klereco germanan aŭ fremdan lingvon, pli ol 90% decidis favore

Esperanton, kaj Munkeno centre disponigis al travojaĝantaj aŭtomobilistoj ankaŭ E.-parolantajn tradukistojn kaj akompanantojn tra la urbo. Laboro sukcesis komenci 7 kursojn, kaj je Zamenhofa festo (kiun aranĝis junulara grupo) ĉeestis 200 partoprenantoj, parolis Prof.Scholze (prezidanto de l direktorio de Germana Esperanto-Instituto) kaj Dr.Ziegler, kaj kantunuiĝo Biedersinn (estro s-ano Hauzeneder) zorgis por bona humoro.Cetere por la kongreso ĝis 31a de Decembro jam pli ol 600 s-anoj el 22 landoj anoncis sin.

La jaro 1951 nature tute impresiĝis per la 36a UEA-kongreso, tamen la ĉiutagaj aferoj ankaŭ necesis. Dum jara kunveno komence de Januaro kun 59 ĉeestintoj ni aŭdas pri ankoraŭ 150 membroj, 42 SAT-anoj inter ili; junularo bedaŭrinde posedis nur ankoraŭ 18 pagintajn anojn; fervojistoj laŭ estro s-ano Hell bone laboris, ankaŭ kun nova kurso. Je baloto Deubler kaj Hauber reelektiĝis, fariĝis (ankaŭ por kelkaj estontaj jaroj) Hertlein nova 2a prezidanto kaj s-anino Gatter protokolantino. Ni legas pri pluraj kursoj (i.a. 1 en popollernejo) de la nelacigebla Honora Membro Koch kaj de d-rino Leubner (kiu ek de 1950 ankaŭ apartenis al GEA-estraro), pri partoprenado de junularo je 1a-de-Majo-Festo kun granda E.-varba rubando, kaj tre interese, ke Dr.Ziegler informis je varb-parolado en Amerika-Hauŝ (= Domo pri Usono), ke nek bavara kultura ministerio nek filologa ligo sukcesis nomi oficialan Esperanto-kontraŭulon, - ĉu mankis kuraĝo?

Interese ankaŭ, ke s-ano Hell gvidis E.-kurson por 7 gekelneroj de la Munkena ĉefstacidoma restoracio, - ĉu ili uzis ĝin? Ni ne scias. kaj nun venis Aŭgusto kaj la kongreso. LKK bone estis preparinta ĝin. I.a. ili zorgis, ke prof-ro d-ro Ivo Lapenna, unu de la plej elokventaj kaj gravaj reprezentantoj de Esperanto, venis al Germanujo kaj post rondvojaĝo finis en Munkeno por partopreni 36an UEA-kongreson kaj kunigatan (4an) Internacian Someran Universitaton (kies Honora Protektoro estis la rektoro de la Universitato Munkeno Rector Magnificus Prof.Dr. Michael Schmaus) kun prelego pri elementoj de federacia ŝtato.Kromaj prelegintoj estis i.a. p-ro d-ro Canuto, rektoro de la Parma universitato, p-ro Waringhien de l'universitato Sceaux-Paris, p-ro d-ro Edmond Privat de la universitatoGenf, d-ro Sirk de la universitato Wien kaj aliaj internacie eminentuloj. Honora protektanto estis d-ro Josef Schwalber, bavara ŝtata ministro por kulturo kaj instruo, al honora kongres-komitato apartenis i.a. Munkena ĉefurbestro Thomas Wimmer, prezidanto de la bavara senato d-ro Singer kaj prezidanto de bavara sindikato senatano Lorenz Hagen (kiu jam bone helpis je junulara postkongresa tendaro 1948 en Garmisch-Partenkirchen). La nombro de la kongresanoj -bedaŭrinde- ne estis samalta kiel 1948, estis nur 2.040 aliĝintoj; detale:kompore kun 2200 dum 1948 ĉi-foje venis nur 819 germanoj, certe konsekvenco de la monoreformo;sed aliflanke kompore kun 365 eksterlandanoj tiam estis nun 1.221, kaj 1948 partoprenis nur verduloj el 20 landoj, ĉi-foje kunestis anoj el 40 landoj! Do, LKK-organizintoj povis esti kontentaj (krome interne: fakte restis por Laboro poste financa profito de 400.--GM, de kiu ĝi aĉetis skribmaŝinon!).

Interkona Vespero (same kiel poste internacia balo kaj arta vespero) okazis en famkonata Hofbräuhauŝ, certe bona komenco! Je Solena Malfermo de la kongreso en salonego de Germana Muzeo parolis i.a. urba lerneja konsilisto Dro Fingerle flue en Esperanto (kiel 1948 promesite) kaj informis, ke la urba lerneja administracio ĉiurilate subtenus enkondukon de E. en la lernejojn. La festparoladon faris kiel ĉiam bonege Prof-ro d-ro Edmond Privat, - estis vera ĝuo aŭdi lin, kaj granda aplaŭdo dankis.Je malfermo de Internacia Somera Universitato venis pli ol 1000 partoprenintoj!Cetere, kiel regule estis Di-servoj, multaj fakkunsidoj;krome okazis samtempe en Munkeno la 23-a Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj kun ĉirkaŭ 200 partoprenintoj, kaj 21-a Kongreso de blindaj Esperantistoj kun 40 samideanoj el 14 landoj. Grave ankaŭ, ke nun dum kongreso urbo Munkeno solene inaŭguris la jam longe promesitan Esperanto-Platz.



Post la kongreso partoprenis 87 gejunuloj el 10 landoj la Intern. Junular-Kunvenon en junulargastejo Urfeld ĉe Walchensee (de 11.8. ĝis 17.8.), la tiean festvesperon vizitis 700 gastoj! Do, certe denove sukcesplena kongreso kun ĝojigaj aŭspicioj! Tamen, Ponto presis poste 2 gravajn aferojn, kiujn mi parte citu: Unue interesa impresoj de s-ano Mason Stuttard (kiu kiel delegito de UEA ankaŭ dum kelka tempo antaŭ/dum kongreso helpis en ĉitiera Centro), kiun ni bedaŭrinde ankaŭ nuntempe ne rajtas nei; li skribis pri la spertoj ĉitie: En la diversaj grupoj, kiujn mi vizitis, mi rimarkis frapantan por mi fenomenon. La plimulto -eble eĉ ĉiuj- kluboj renkontiĝas en gastejoj kaj kafejoj, kaj al mi ŝajnas, ke la ĉefa ero en la vespera programo estas pogranda konsumo de biero. Mi ne volas doni la impreson, ke mi estas fanatikulo de abstinenco, ĉar mi mem povas ĝui glason da biero; sed mi volas dokumenti, ke la sumo, efektive vasta, de la malgrandaj elspezoj por trinkaĵoj k.s. sufiĉas por solvi ĉiujn problemojn de la organizita movado kaj malfermus por la germana movado perspektivajn riĉajn je nekonjektitaj ebloj. Kaj la alia estis alvoko de Dr.Ziegler: Ni gajnis multe da novaj amikoj. Ni klopodu, ke ili fariĝu perfektaj esperantistoj kaj fidelaj samideanoj!

Ĉu la klopodoj de la Munkenanoj sukcesis? Ni vidu.

Dum aŭtuno/vintro okazis dank'al sufiĉe granda eŝo de la kongreso nun multaj E.-kursoj, i.a. kiel regule en universitato kaj teknika altlernejo, sed ankaŭ pro nova rekomendo de urba lerneja sekcio 2 instruistaj kursoj (gvidis Koch kaj d-rino Leubner en la por Munkenanoj famkonata Riemerschmid-komerca-lernejo), denove je supera poŝtdirekcio, fervojista faklernejo, popollernejo, je sindikato kaj naturamikoj, eĉ je danclernejo, kaj cetere la kutimaj grupaj kursoj en Zierngibl, Pasing kaj Schwabing. Morto de s-ano Hell dum Novembro malgajigis ĝojon pri tiuj multaj kursoj kaj interesuloj. Tamen, Zamenhofa festo dum Decembro en grupa restoracio Zierngibl estis kontentige festita de Laboro: Thalmaier prelegis kaj multaj helpis (i.a. juna s-anino Erika Gerlach, Michl Ehbauer kaj Koch). Sufiĉe interese ankaŭ du tiamaj eksperimentoj, kiujn Prof-ro Mielert en Esperanto-Post (vd. pĝ. 139) rakontis, kaj je kiuj la aŭtoro ankaŭ mem partoprenis: En universitata kurso de Dr. Ziegler unue ni igis traduki per ĉirkaŭ 20 spertuloj de aliaj universitatoj german-lingvan tekston en fremdajn lingvojn (inkluzive Esperanton!) kaj poste retraduki la tradukojn de 20 aliaj spertuloj en germanan lingvon por vidi/konстати, kiom tiele ŝanĝiĝis kompare kun la originalo; kaj krome, ni prenis alineon el Faust de Goethe, legis kaj pripensis, kion kiel la poeto esprimis tie, poste ni kolektis oficialajn tradukojn de Faust el preskaŭ ĉiuj eŭropaj lingvoj (ankaŭ ĉifoje el Esperanto), serĉis tie ĉi-alineon kaj igis denove de multaj spertuloj retraduki ĝin - escepte la 2 esperantajn tradukojn, ĉi-rilate ni sentis nin mem sufiĉe spertaj- en germanan lingvon, kaj ĉiam ni devis konstati, kiom nepravaj/nekorektaj tiuj Faust-tradukoj estis, sed ankaŭ kiom pli trafa en ĉiu kazo la (re-)traduko en Esperanton kaj reen estis. Do, konvinka pruvo pri la bonega akomodeco de Esperanto, - de kio bedaŭrinde plej multaj filologoj same kiel kompetentuloj kaj oficiuloj rifuzas preni konon!

Malgraŭ la multaj kursoj preskaŭ neniuj aliĝis al grupo, tial 1952 je regula jara renkontiĝo dum Januaro kun 60 partoprenintoj Laboro posedis nur ankoraŭ 147 membrojn, inter ili 41 SAT-anoj; je baloto restis la ĝisnuna estraro senŝanĝe. Cetere prezentis sin post morto de s-ano Hell kiel estro de fervojista sekcio s-ano Berger, kaj rilate junularan sekcion (post eksiĝo de antaŭulo pro aĝa limo) s-ano Ritterspach, kiu ankaŭ tuj invitis grupon al karnevala festo dum Februaro, -kiun bedaŭrinde poste nur tre malmultaj vizitis. Pri grupo mem dum la jaro ne okazis iuj elstaraj aferoj. Nature oni aranĝis la kutimajn kursojn ĉie, kie nur eblis. La Munkenanoj ankaŭ partoprenis sufiĉe multnombre la solenan inaŭguron de Zamenhof-Monumento en Wörgl, kie Dr. Ziegler fest-paroladis je ĉeestado de Aŭstria Federacia Kanceliero d-ro Leopold Figl. Cetere Munkena estraro pripensis kaj planis refondiĝon de dum Tria Regno iom devige malfondita Bavara Esperanto-Ligo (BELO), kaj petis jam alskribaĵojn. En Decembra numero de Ponto ni denove povas legi pri kursoj je universitato kaj teknika altlernejo, Riemerschmidt-lernejo, sindikato, E.-Centro ktp., same pri ampleksa vintra programo, ankaŭ pri Zamenhof-Festo kun festprelego de kaplano Thalmaier. Sed apude dum tuta tempo estis interna kverelo, ekstere preskaŭ ne rimarkita -kiel glacimonto, de kiu nur pintoj estis ekstere videblaj -sed kiu poste grave influis Munkenan Esperanto-vivon entute. Komenciĝis kun atakoj de Hamburga GEA-membro rilate fincan finkalkuladon post UEA-kongreso. GEA-estraro sentis sin persone ofendita per tiaj atakoj kaj je estrarkunsido dum Marto 1952, al kiu la Hamburga s-ano veturis ĉi tien, oni ne nur rifuzis akcepti lin, sed laŭ informo en Aprila-numero de Ponto eĉ tuj eksigis lin kiel GEA-membron, ĉar li akre agis kontraŭ la komuna kaj harmonia spirito inter la Esperantistoj...Krome GEA-estraro malpermesis apelacion al la arbitracia tribunalo de GEA. Kontraŭ tiu (tro rapida) agado nun tuj protestis la REVELO-estraro kaj ankoraŭ en Aprila-numero de Esperanto-Post tiu protesto estis presita. Malgraŭ tiuj disputoj je GEA-jara renkontiĝo en Düsseldorf (post SAT-kongreso) Dro Ziegler kaj la 2 aliaj Munkenaj estraranoj (d-rino Leubner, sekretariino, kaj Leo Jolliet, kasisto) unuvoĉe reelektiĝis, - sed tre bedaŭrinde, intertempe ambaŭ partioj jam uzis advokatojn kaj tribunalojn. Nature tiaj kvereloj kostis nervojn kaj tempon. Tial eble ne estis surprizo, ke 1953 Dro Ziegler anoncis en Ponto, ke li nun devus pli zorgi pri sia ekonomia estonteco (ĉar la laboro por Esperanto vere ne estis profita afero), kaj tial devus rezigni daŭrigi lektoran oficon je universitato kaj teknika altlernejo,

kaj fine, je GEA-kongreso, Pentekoste en Frankfurt/M, li eĉ ankaŭ rezignis pri reelektado kiel prezidanto de GEA! Tial nun ankaŭ la du aliaj Munkenaj estraroj rezignis, - sekvis nova GEA-estraro, tial ankaŭ Esperanto-Post fariĝis nova oficiala gazeto de GEA, kaj Ponto kaj la ĝis nun en Munkeno ekzistinta Germana Esperanto-Centro likvidiĝis. Escepte de Katolika Esperanto-Centro en Germanio- KECG, kie s-ano Bernhard jam depost multaj jaroj eldonis SEMISTOn, restis do nur Germana Esperanto-Instituto momente (ankoraŭ) ĉitie (ĉar Dr. Ziegler tie ankaŭ rezignis, Dr.Theodor Schwab fariĝis posteulo; sed aliaj membroj de direktorio, precipe kiel direktoro s-ano Koch kaj la membroj de Munkena ekzamenkomisio d-rino Leubner, Bernhard, Deubler, Leidl kaj Thalmaier restis), resume: Malgraŭ, ke GEA ankoraŭ estis en Munkeno enregistrita, postmilita centra rolo de Munkeno en la germana Esperanto-movado estis (kaj restis ĝis nun) finita! Sed mi daŭrigu ankoraŭ la raporton pri ĝenerala E.-vivo en Munkeno. Je jarkunveno de Laboro ĉeestis nur 41 membroj, kaj ni aŭdas, ke ankoraŭ ekzistis 136 grupanoj. Je baloto ĉiuj estraroj estis reelektitaj. La situacio de junulara E.-sekcio estis laŭ raporto de malnova estro s-ano Ritterspach (kiu poste forlasis Munkenon, nova estro Ernst Glaser) malkontentiga pro mankinta aktiveco, tial oni jam pripensis dissolviĝon! Ec la tradicia karnavala festo ne estis aranĝita! Aliflanke Ehbauer organizis Interkonan Vesperon en famkonata Augustiner-Keller, kiu estis bone vizitita. Cetere dum jaro okazis kiel kutime multaj kursoj, ankaŭ por instruistoj (sed laŭ informo de Koch bedaŭrinde sen novuloj) kaj partoprenis fakte denove sufiĉe multaj interesuloj, sed kiel jam dum lastaj jaroj, Laboro ne sukcesis nun vere aligi ilin al la grupo. Zamenhof-Festo okazis tradicie en grupa renkontejo Zierngibl kaj ĉifoje festparolis denove la nelacigebla s-ano Koch.

1954 - 1960

Jarkunvenon de Laboro 1954 partoprenis ankoraŭ nur 36 membroj, kaj kasisto Hauber informis pri malaltigo de anaro al 120, do, malgraŭ ĉiamaj kursoj kaj varbado 16 malpli ol jaron antaŭe! SAT-membraro (nova peranto: k-do Dittenheber) restis je 41, sed je junularo estis ankoraŭ nur 3! Por fervojista sekcio raportis k-do Hauzeneder pri regulaj renkontiĝoj kaj kursoj, gviditaj de li kaj k-do Weidacher. Je la baloto aperis nova nomo: k-do Horst Spirat, kiu poste dum jardekoj influis la grupan vivon, fariĝis 2a prezidanto, aliaj restis la samaj. En Januara numero de Esperanto-Revuo, nova nomo de antaŭa Esperanto-Post, aperis bona foto kun laŭdega artikolo de Deubler pri s-ano Koch, kiu naskiĝis antaŭ 60 jaroj kaj estis nun depost 45 jaroj esperantisto! Dum Februaro okazis denove karnavala festo en Zierngibl. Je monata kunveno dum Marto (23 ĉeestis) la grupanoj diskutis la problemon regajni la iamajn membrojn kaj decidis provi ĝin per privataj vizitoj de aktivuloj: Erika Gerlach, Hertlein, Spirat kaj Weidacher estis pretaj tiele agi, -ĉu ili sukcesis, nenie estis notite. Kaj krome? En la kursoj, ankaŭ en sindikato bedaŭrinde nur malmultaj komencantoj aperis. Laboro provis atingi helpon de ekstere: Post alvoko en Aprila numero de Esperanto-Revuo renkontiĝis 39 esperantistoj el 7 diversaj lokoj en Bavarujo sude de Danubo en Zierngibl je 15a de Majo kaj fondis Sud-Bavaran Esperanto-Ligon (Sobelo), sidejo Munkeno, kaj komence kun la samaj estraroj kiel Laboro. Dum 2a de Junio ni legas en protokol-libro pri planitaj vizitoj de multaj kongresoj (i.a. GEA, UEA, SAT, Aŭstria) per kelkaj ge-k-do, -la postaj raportoj nature pliriĉigis grupajn vesperojn. Sufiĉe grave por la Munkenaj esperantistoj estis, ke je la Pentekosta GEA-kongreso en Marburg (6a/7a de Junio) k-do Deubler estis elektita kiel 2a vicprezidanto, -do, Munkeno ne plu estis tute izolita! Dum Julio Erika Gerlach informis pri sia parolado en Internacia Junular-biblioteko en Munkeno antaŭ 56 infanoj pri la signifo de nia lingvo. Cetere Laboro jam nun komencis pripensi pri 50-jara grupa jubileo (nature kalkulite ne, kiel ĉitie, ek de 1891 sed depost 1904). Interesa ankaŭ grupa vespero kun 67 vizitintoj je 14a de Julio, kiam japana Esperanto-pioniro Prof-ro Hideo Yagi el Okayama vizitis ĝin kaj informis pri la tiame ankoraŭ tre malproksima lando Japanujo. Por

la Ora Jubileo oni intencis aranĝi ekspozicion en Sindikata Domo, pri kiu Spirat devis respondi. En la Oktobra numero de Esperanto-Revuo aperis bona fotoĵo de k-do Deubler kun indikoj, ke li 1895 naskiĝis kaj 1911 esperantistiĝis, krome peto por alskribaĵoj kaŭze de Munkena 50-jara E.-jubileo. En la protokola libro ni legas, ke unue dum Oktobro Laboro decidis, ke jubilea festo okazu en Kolping-Domo, kaj pagi kroman 0,50 GM kiel kontribuon al la elspezoj okaze de la ekspozicio. Ankoraŭ 2 punktoj: Dum Novembro mortis per tragika akcidento la juna Erika Gerlach, per ĝi perdis Laboro vere esperigan verdulinon. Kaj dum la kune kun la Zamenhof-festo festita Ora Jubileo oni honoris ĉiaman laboron kaj helpon de s-ano Koch, kiu ricevis kiel unua la Honoran Membrecon de la grupo. La festparoladon faris Deubler, cetere okazis lumbildparolado de Thalmaier kaj dum amuza parto zorgis Michl Ehbauer por bona humoro.

Bedaŭrinde dum Decembro 1954 finiĝis protokola libro, kaj ne ekzistas (plu) iu tia daŭrigo; tial ni ankaŭ ne pli scias pri la membro-movado de postaj jaroj. Fakte Laboro eldonis antaŭe kaj poste regule rondleterojn/informilojn, sed ĝuste pri venontaj jaroj ĝis 1962 inkluzive, mi trovis nur malmultajn de ili. Cetere tie ankaŭ grupo ne informis la anaron detale pri membra nombro. Do, ĉar mankis bona fonto pri la postaj jaroj, kaj nature Germana Esperanto-Revuo tute ne estis informita tiom bonege kaj pli detale pri Munkeno, ekestas nun malplenaj tempoj kaj mi petas tial pardonon!

1955 komencis per la bonega informo el Montevideo, ke UNESKO akceptis dum Decembro 1954 UEA en konsulta pozicio, kaj Germana Esperanto-Revuo (estonte mallongite nur G.E.R.) informis detale kun multaj komentarioj pri tio (bedaŭrinde aliflanke ni pli poste devis aŭdi, ke la Kulturaj Ministroj dum kunveno je 4a/5a de Novembro 1954 rifuzis enkondukon de Esperanto en la lernejoj!), tamen, en Januara numero oni ankaŭ gratulis kun fotoĵo al estro de la direktorio de la Germana Esperanto-Instituto Hans Koch pro 60a datreveno de lia naskiĝtago kaj informis krome pri lia Honora Membreco. En Februara numero ni povas legi pri novaj kursoj je sindikato kaj donaco de 1.000.--GM al la Germana Esperanto-Instituto pere de Munkena magistrata sekcio por instruaj afero (estro Dr.Fingerle). El Marta numero ni scias, ke Spirat estis anoncita por konsilanta komitato de GEA, kaj en Aprila numero Germana Esperanto-Instituto raportas tre detale. Maja numero informis pri lumbildparolado pri vojaĝo tra Turkujo je grupa vespero kaj gratulis al fidela s-ano Wendler el Pastetten, kiu kvankam 77-jarulo regule partoprenis la grupvesperojn. Pro oficiala aprobo de UEA je UNESKO GEA nun intertempe pripensis, entute aliĝi al UEA, por tiele ankaŭ profiti; tial dum Pentekosta GEA-kongreso en Neustadt/WeinstraÙe granda plimulto de la ĉeestantaro akceptis tiun aliĝon, kio ankaŭ necesigis iom da kotizaltiĝo. Sed, ĉar GEA estis fondita kiel tute neŭtrala organizo, nature ne ĉiuj membroj estis kontentaj kun tiu evoluo, ĉefe laboristoj. En Julia-numero de G.E.R. aperis tial raporto pri Maja-faka kunsido de Sekcio Laborista en GEA dum GEA-kongreso, kie Deubler (kiu denove estis elektita kiel 2a GEA-prezidanto) apogis ankaŭ la aliĝon. Tamen, ne ĉiuj volis akcepti tion kaj kelkaj fondis novan organizon Liberan Esperanto-Asocion (LEA) kaj forlasis GEA. Ankaŭ en Munkeno tial kelkaj fidelaj esperantistoj forlasis grupon (kiu ankaŭ ŝanĝis la nomon) kiel membroj, por ne membriĝi je UEA (kiu post 2a mondmilito montris al Germanaj s-anoj entute dum certa tempo malaprobos kontraŭe je SAT), sed tamen regule vizitis la grupajn aranĝojn, kaj grupo akceptis tiun agadon, kaj postulis nur iom pli malaltan kotizon. Ehbauer parolis en Bavara Radio pri sia Esperanto-entuziasmo, kaj en Decembra-numero ni legas pri novaj kursoj je sindikato kaj ankaŭ la unuan fojon je DAG (= Deutsche Angestellten-Gewerkschaft = Germana Dungita-Sindikato). Informilo dum Novembro atentigas ankaŭ al tiuj kursoj, klarigas kotizaltiĝon de 0,60 GM al 0,80 GM monate kaj samtempe invitas al Zamenhofa festo je 11a de Decembro en kluba kunsido Ziemgibl, festparolado de Prof-ro Dro.Schwab, kunlaborintoj i.a. s-anino Rabe, s-anoj Koch, Hauzeneder, Bernhard kaj Michl Ehbauer. Poste aperis en Münchner Stadtzeitung de Münchner Merkur granda artikolo kun multaj interesaj detaloj, - i.a., ke s-ano Spirat estris la junularon kaj ke ĝi bedaŭrinde posedas nur malmultajn membrojn, ke nun ankaŭ klubestro Deubler kiel 60-jarulo pro siaj meritoj por Esperanto-grupo fariĝis Honora Membro, kaj pri la ĉeesto de fama japana kuracisto Dro Shinoda, kiu eltrovis novan operacian sistemon kontraŭ kanceron de la utero kaj nun mondon traveturis parolante en Esperanto pri sia metodo.

Dum Januaro 1956 ni povas en G.E.R. sampozitive legi pri tiu festo kaj krome, kio bedaŭrinde ne ankaŭ estis anoncita en tiu gazetartikolo de Münchner Stadtzeitung, ke jam tagon poste prof.Shinoda paroladis kun lumbildoj en la ginekologia kliniko de Munkeno pri tiu operacio kaj ke interpretis s-ano Koch! Car ekzistas nun nur ek de Majo informilo de Laboro mem, mi povas pri unuaj monatoj de jaro nur doni informojn el G.E.R. Tie estis skribita en Februara numero pri Munkeno:

La Pax-Christi-Movado aplikas Esperanton. La estro de la dioceza oficejo, prof.d-ro Franz Hörhammer (patro de la famkonata P. Manfred Hörhammer) konvinkiĝis pri la taŭgeco de nia lingvo por internacia korespondado kaj la bezono de komuna lingvo por la internaciaj kongresoj de Pax Christi. Ĝis nun prof.d-ro Hörhammer estis kiel novfilologo kontraŭulo al E., sed nun li eĉ admiras Esperanton kaj invitis la Munkenajn anojn de PC partopreni E.-kursojn.S-ano Mielert (loĝante nun en Neuhaus/Schliersee.) gvidas ek de Novembro du kursojn kun ĉirkaŭ 40 partoprenantoj, ĉiuvendrede en la Munkena Kolpinghaus.... Tiu sukceso rezultigis bonajn konsekvencojn, -sed pri tio mi ankoraŭ pli malfrue informos. Dum Marto konatigis G.E.R. jaran raporton de Germana Esperanto-Instituto kaj denovan donacon per Dr.Fingerle tien je 500.-GM, kaj eldonon de 4.000 E.-lingvaj varbfolioj. Informilo de Majo montris riĉan programon por postaj 5 semajnoj, multaj raportoj (i.a.de Deubler kaj Spirat pri GEA-kongreso en Hamburgo, kie la estraro restis tute la sama kiel antaŭe), 2 ekskursoj kaj cetere atentigo al multaj E.-kursoj por komencantoj kaj progresintoj. G.E.R. Aŭgusta numero informis pri renkontiĝo en Tutzing kun E.-grupo Weilheim kaj la plano, venontjare komune vojaĝi al Italio.En Septembra numero ni aŭdas pri sukcesa fino de kursoj de Pax-Christi-movado (60 daŭrigis ĝis fino!) kaj novaj kursoj de la movado, - kaj en Novembro numero ni jam povas legi, ke 1960 Pax-Christi-movado kongresos en Munkeno, -certe neatendita sukceso!Pri 1956 ekzistas nun ankoraŭ invito al Zamenhofa Festo en kazina salonego de Financa Ministerio, kie s-ano Koch faros festparoladon, - aliaj kunhelpantoj Hauzeneder kaj nature Michl Ehbauer.

Pri 1957 mankas ĉiu informilo, kaj nur dum Junio ni legis en G.E.R. per raporto de grupo Holzkirchen pri vizitoj kaj paroladoj tie de Spirat, Koch kaj Sittl, kaj en Julio pri tuta re-elekto de GEA-estraro dum GEA-kongreso en Mainz. Poste ni legas en Aŭgusta numero inviton de SOBELO al Weilheim kaj en Septembro la programon, festparoladon per prof.Ivo Rotkvic, Zagreb (membro de la Esperanto-Akademio), krome Michl Ehbauer kontribuis programon. Fine la Decembra numero informas pri kursoj, denove je sindikato, DAG kaj popolaltlernejo krome je optika firmao Rodenstock kaj per s-ano Thalmaier en realgimnazio en Gräfelfing, distrikto de Munkeno, sed nenio pri, Zamenhofa festo, kiu certe okazis. Same certe okazis jara kunveno 1958; ekzistas rondletero de 1a de Februaro kun programo por 5 semajnoj kaj invito al jara kunveno kun raportoj kaj novelektoj je dimanĉo, la 23a de Februaro, 15a horo en Zierngibl kaj atentigoj pri kotizaltiĝo al 1.--GM monate kaj krome pri kursoj por komencantoj en Blumenschule (lunde kursestro Koch, merkrede Englert), Angerkloster (Pax-Christi-Prof.Mielert), Riemerschmid-Handelsschule (Rabe) kaj Mariahilf-Kloster (Bayer) kaj progresintoj en Riemerschmid-Handelsschule (Koch) kaj Zierngibl (ankaŭ Pax-Christi-Prof.Mielert), -sed raporto pri tiu jarkunveno mankas. Spirat forlasis certan tempon Munkenon, por labori en Italio, tial mankis lia nomo ankaŭ poste ĝis 1960 kiel kun-subskribinto sur la grupaj rondleteroj/informiloj. Aliflanke la preparoj al 4-a Eŭkaristia Esperanto-Mondkongreso 1960 en Munkeno bone progresis, Lia Kardinala Moŝto D-ro Wendel akceptis 18an de Januaro 1958 reprezentantojn de la Munkena E.-grupo Pax Christi (pastro Thalmaier, Prof-oj Hörhammer kaj Mielert, insp.Sittl), en Marta-numero informas G.E.R. detale pri tiu akcepto kun fotaĵo de'l partoprenintoj. En Maja numero denove aperis raporto de Germana Esperanto-Instituto, laŭ kiu denove urba lerneja oficejo donacis 500.-GM kaj cetere nun p-ro d-ro Hörhammer anstataŭis d-ron Schwab kiel direktoro de la instituto. En Julia numero de G.E.R. informis kiel GEA-vicprezidanto Deubler (ĉar Dro Herrmann, GEA-prezidanto ek 1953, tre malsaniĝis, li demisiis kaj posteulo fariĝis pensiita studa direktoro Schoen) tre interese pri bona kunlaboro kun E.-amikoj en Germana Demokrata Respubliko kaj kun LEA pro komuna celo, fina venko de Esperanto. Ni ankaŭ povas legi pri vizito de s-ano kortega konsilisto Hugo Steiner, direktoro kaj fondinto de la Internacia E.-Muzeo Wien je komuna kunveno de Munkena kun Pax-Christi-grupo, kaj ke li post sia interesa prelego ankaŭ

povis kunporti por Zamenhof-monumento konsiderindan kolektitan monsumon. De Septembro ekzistas kun varba letero por denove multaj E.-kursoj (ankaŭ specialaj kursoj por instruistoj) rondletero kun programo pri la venontaj 5 grupaj vesperoj. Laboro ankaŭ posedas germanlingve 12-paĝan manuskripton de enkonduka/varba parolado de s-ano Koch, - tiom konvinkaj, ke ni vere povus plori pri niaj kompetentuloj en Germanujo, kiuj sentas sin tiom orgojle, ke ili eĉ rifuzas vere pripensi kaj okupi sin pri la genia ideo de Dr. Zamenhof! Dum Oktobro ni povis legi en G.E.R. pri 50-jara jubileo esperantista de niaj s-anoj Josef Wendler kaj Bartholomäus Halbritter, kiuj ĝis Tria Regno kaj tuj post 2a Mondmilito ĉiam aktive kaj fidele kunlaboris en la grupo. Pri Zamenhoffesto je 14-12-58 ni unue 1959 (memora jaro pro naskiĝo de Dr. Zamenhof 100 jarojn antaŭe!) en Februara numero de G.E.R. povis legi, ke Munkena E.-grupo festis ĝin en kazino de Bavara Statabanko kun ĉirkaŭ 150 partoprenintoj, inter ili gastoj el tuta Bavarujo; festparoladis s-ano Walther el Burglengenfeld, ceteraj parolintoj estis serioze prof. Mielert kaj Koch kaj humore Michl Ehbauer, krome lumbild-parolado de Thalmeier. Malgaja informo el la sama numero, ke Halbritter neatendite ankoraŭ fine de Decembro mortis. Cetere dum Aprilo G.E.R. informis denove tre detale pri agado de Germana Esperanto-Instituto, kiu i.a. raportis, ke urba lerneja oficejo ĉi-jare bedaŭrinde nenion donacis (poste venis ankoraŭ donaco de almenaŭ 350.-GM), k, ankaŭ tre bedaŭrinde, ke la kurso je popolaltlernejo ne daŭris same kiel la kurso por komencantoj de Koch, kiun li aranĝis post la varbado (v. supre). Aliflanke dum Aprilo estis ankaŭ bona afero, nome, La Federacia Prezidanto Theodor Heuß dediĉis 15an de Aprilo en rekono al la speciale akiritaj meritoj por la Federacia Respubliko Germanujo al s-ro kortega konsilisto Hugo Steiner la meritkrucon de unua klaso de la meritordeno de la Federacia Respubliko Germanujo. La vojo tien estis komplika kaj interesa: La bavara ministraprezidanto Dr. von Seidel rekomendis tiun honorigon kaŭze de tiurilata petskribo de la bavaraĵ esperantistoj! Tial, post akcepto de la meritkruco dum Majo en Vieno, Steiner veturis al Munkeno por danki al bavara ministraprezidanto, kie li estis krome akceptita en Kultura Ministerio, de urba lerneja konsilisto Dro Fingerle (kun enskribo en la Honorlibron), de Bavara Radio kaj de ĉefepiskopo de Munkeno, kardinalo D-ro Wendel, -certe ĉiuj tiuj vizitoj kaj akceptoj momente helpis subteni E.-laboron en Munkeno. El G.E.R. ni scias pri vizito de Deubler en Holzkirchen, kie ja jam delonge ekzistis vigla grupo, kiu ĉiam denove kunlaboris kun la Munkenanoj, kaj kie li raportis pri vizito de ĉijara UEA-kongreso en Varsovio, - kaj certe Deubler ankaŭ informis la Munkenajn s-anojn pri tio. Sed unua trovita informilo de tiu jaro estis de 15a de Oktobro 1959, kaj ĝi ne plu raportis pri pasinteco, sed donis nur informojn pri programo de venontaj 5 semajnoj (i.a. je 80a naskiĝtago de H. Tressel, Honora Membro de GEA, esperantisto de post 50 jaroj kaj delegito de UEA de 1911) kaj krome pri posta invito al ĉijara festo je la centfoja datreveno de la naskiĝtago de Dr. Zamenhof. Cetere rondletero informis pri ŝanĝo de klubejo de Zierngibl al Markthof, Frauenstr. 4 (restoracio certe je malpli alta nivelo, sed esperantistoj estas ne tro ŝatataj gastoj pro tro malgranda konsumado). Novembra numero de G.E.R. informis pri 5 mortokazoj de fidelaj grupanoj, inter ili nun ankaŭ k-do Wendler, kiu jaron antaŭe ankoraŭ festis 50-jaran E.-jubileon, kaj s-ano Mielert, fondinto de Esperanto-grupo de Pax-Christi-movado kaj nun delonge laborinta por preparo de Eŭkaristia Mondkongreso 1960 en Munkeno, - entute vere gravaj perdoj por la grupo! Cetere ni legis tie pri kutimaj kursoj, ankaŭ denove speciale rekomenditaj de urba eduka sekcio por instruistoj.



Decembra numero de G.E.R. publikigis kun fotoĵo laŭdadon pri 50-jara E.-vivo de Munkena Honora Membro Hans Koch. Ekzistas nun rondletero de Esperanto-Kartell München, al kiu kuniĝis E.-grupo Munkeno, Katolika E.-grupo Pax-Christi Munkeno, E.-grupo de Fervojistoj, UEA-delegito Hans Tressel kaj SAT (peranto Kasimir Dittenheber) kun invito al Zamenhofa Festo, la 13a de Decembro en Kazino de Bavara Stata Ministerio de Financoj, kaj krome programo pri tiu festo. Ĝi raportis G.E.R en Januara kaj Februara numeroj pli detale pri tiu jubilea Zamenhofa Festo; ĉirkaŭ 200 personoj kunvenis, inter ili ankaŭ la amiko de Esperanto en Munkeno, urbkonsilantarkonsilisto Dr.Fingerle, kaj post festparolado de Honora prezidanto de GEA Dr.Herrmann s-ano Deubler kiel grup-prezidanto honoris grupanojn Hans Tressel, Hans Koch, August Hauber, Hans Wünschel kaj Josef Flatz per transdono de la Honora Pinglo de GEA, kaj s-anon Hans Bernhard per diplomo Honora Membro pro multjardeka (50 kaj 40) fidelo al kaj agado por Esperanto. Poste s-anoj Ehbauer per humoraĵoj, Thalmaier per lumbildparolado kaj Hauzeneder per belaj kantoj ĝojigis la festintojn.Pri tiu festo raportis ĉiuj en Munkeno kaj ankaŭ kelkaj en Augsburg eldonitaj tagaj gazetoj, eĉ Bavara Radio Munkeno atentigis ĝin jam tagon antaŭe kaj verŝajne pro la bona funkciado de la festo oni 2 tagojn poste disaŭdigis intervjuon kun s-anoj d-ro Herrmann kaj Deubler.

G.E.R. informas en Januara numero krome pri partopreno de Munkena Esperanto-junularo (iniciatita de s-ano Sittl) je karnavala procesio kun humore kaj Esperant-varbe ornamita veturilo kaj montras ankaŭ kelkajn plaĉajn fotoĵojn de ĝi.Bedaŭrinde denove mankas ĝis septembro grupinformiloj, -mi scias tial ankaŭ ne, kiom partoprenis jaran kunvenon kaj kio okazis tiam; sed almenaŭ laŭŝajne Spirat revenis, ĉar lia nomo nun estas denove sur la rondletero.Pri intertempa Munkena E.-vivo ni nur malmulte aŭdas en G.E.R. Ekestis dum Marto nova kurso organizita de E.grupo Munkeno sole por poŝtistoj kun 32 partoprenintoj.Dum Aprilo aperis kiel kutime detala raporto de Germana Esperanto-Instituto kaj Maja numero informas pri grava malsaniĝo de Koch pro tremigparalizo.Poste ni aŭdas, ke je GEA-kongreso en Berlin Deubler rifuzis proponon fariĝi prezidanto kaj estis denove elektita kiel vicprezidanto.En la G.E.R.Julia numero aperis pro la 37a Internacia Eŭkaristia Kongreso en Munkeno granda artikolo pri Esperanto kaj Katolikismo kiel enkonduko al posta raporto pri IVa Eŭkaristia Esperantista Mondkunveno, 30.7.-3.8.60, en München-Gräfelfing kaj mi posedas ankaŭ tiorilatan numeron de Semisto, laŭ kiu kunestis 180 ges-anoj el 15 landoj (inter ili 30 el Munkena regiono, sed ne ĉiuj membroj de grupo!) kaj post perdo de la antaŭa Munkena grupo de KELI ricevis novan konsekritan flagon. Iom strange estas, ke laŭ Oktobra numero de G.E.R aperis en Schwäbische Zeitung (=Svaba Gazeto) noto, ke 85-jarula ĉefepiskopo Dro Michael Buchberger de Regensburg je 6a de Aŭgusto en Munkena katedralo celebris Esperanto-Meson kaj ke poste Radio Munkeno sendis 6 kantojn pri Sankta Maria esperantlingve, sed Semisto ne menciis ĝin. Tamen en Septembra Rondletero Munkena grupo elparolis dankon al ĉiuj, kiu helpis sukcesigi la Katolikan Esperanto-Mondkongreson, kaj varbis por novaj kursoj (ankaŭ de Grupo Pax-Christi) kaj ekzamenoj dum oktobro; cetere oni invitis partopreni la regulajn grupvesperojn, ĉiam ankoraŭ en Markthof. G.E.R. informis dum Novembro, ke ses kandidatoj sukcese partoprenis la supre nomitajn ekzamenojn, kaj en Rondletero de 25.11.60 (kiun same kiel la Septembran rondleteron subskribis la kartelmembroj, kvankam kiel adreso kaj forsendinto nur estis nomita E.-grupo Munkeno) ni legas pri invito al Zamenhofa-Festo, Dimanĉon, la 11an de Decembro, en ĉambrego de la katolika studenta hejmo Newman-Haus-München. Laŭ Februara (1961) numero de G.E.R. venis ĉirkaŭ 150 al tiu festo, ankaŭ reprezentantoj de la urba administracio, festparolis prof-ro d-ro Hoerburger(Regensburg) kaj poste Prof.Dr.Kondor(Amberg);s-ano Thalmaier, kiu intertempe translokiĝis al Landshut, montris lumbildojn de sia vojaĝo tra Hispanujo, kaj i.a. Michl Ehbauer kaj Spirat zorgis pri humora parto. Je la fino oni kantis kiel kutime la Zamenhofan himnon. Rakontinda ankoraŭ, ke fine de Decembro egipta ĵurnalisto D-ro Tadros Megalli, kiu jam delonge traveturis ĉefe Germanujon kaj sufiĉe sukcese varbis per lumbildparoladoj por Esperanto, en Munkeno edziĝis kun germana instruistino f-ino Helma Graf.



maldekstre Konrad Deubler
je honorigo de Hans Koch



Michl Ehbauer laŭlegas
el sia verko *Bayer. Weltgeschichte*
(= Bavara Mondhistorio)
maldekstre malantaŭe Konr. Deubler



Hans Koch, 60-jarulo

1961 - 1968, inkluzive de la 46a GEA-Kongreso

1961 aperis komence de Februaro Munkena Esperanto-Informilo 1 de Esperantogrupo Munkeno kaj Sudbavara Ligo (Deubler, Spirat, Flatz); 3-paĝa, ĝi enhavis programon (i.a. prelego de Koch pri la unua epoko de nia literaturo) por Februaro/Marto, pripensojn pri Esperanto kaj humoraĵojn, krome inviton al karnavala aranĝo, -kaj peton, skribi liston pri la 10 plej bonaj Esperantistoj de Munkeno. Fine de Februaro jam venis (ĉifoje nur 1-paĝa) Informilo Nr.2 kun programo ĝis Aprilo, ĉefe ankaŭ invito al jara-kunveno kun novelekto, kaj rezulto de Januara rond-demando, kiun, eble ĉar Informilo 1 preskaŭ ne estis legebla, nur malmultaj respondis; tamen mi notas la (ne surprizan) rezulton: s-anoj Koch, Deubler, Bernhard, Tressel, Winter, Hauber, Spirat, Weidacher kaj s-aninoj Raabe, d-rino Leubner, - do, ĉiuj konataj nomoj! G.E.R. aperigis en Marta numero raporton de Germana E.-Instituto, el kiu ni povas ekkoni, ke i.a. urbo Munkeno donacis 250.-GM (ĉiam malpli, -tamen pli bone ol nenio!), kaj ke laŭ financoficejo Instituto nun estis akceptita kiel organizo de publika utilo, -kio signifis, ke ek de nun donacoj al Instituto estis impostpreferitaj, certe grava sukceso! La Maja numero enhavis fotoĵon, kiu montras katolikajn esperantistojn en granda procesio okaze de l'ĉi-jara festo de Korpo de Kristo kun la konsekrita flago portanta la papan kolorkrucon en la verda stelo antaŭ urba domo. Bedaŭrinde mankas Informilo 3 kaj tial ni denove nenion scias precize pri la okazaĵoj de jara kunveno. Laŭŝajne trovis sin nova junulestro Manfred Thasler, ĉar aperis en 4-paĝa Informilo 4 de Majo de li alvoko al Munkenaj E.-gejunuloj, cetere ĝi montris-kiel preskaŭ ĉiam- interesan programon ĝis fino de Junio, - kaj unuan parton de noveleto, kiun la grupanoj sub pseŭdonimo en 5-6 partoj - ĉiam laŭ komuna prijuĝo!- finskribu, certe bona afero, taŭga por plibonigi stilon kaj vortrezoron de kunlaborantoj! Denove mankas Informiloj 5 kaj 6, sed en 7 ni almenaŭ aŭdas ion pri la ĝis nun atingitaj punktoj de la diversaj pseŭdonimoj. Cetere ni legas tie pri per koratako subita morto de 58-aĝa Hans Bernhard, esperantisto ek de juneco, kiu multege helpis la novkonstruon de E.-vivo en Munkeno post 2a mondmilito, same je katolika E.-movado en Germanujo (ankaŭ G.E.R. informis detale pri tiu grava perdo). Informilo 7 krome informis pri Novembra/Decembra programo kaj atentigis jam Zamenhofan Feston la 17an de Decembro 1961. Tre bedaŭrinde estas, ke pri tiu festo, kiun G.E.R. en Februara numero 1962 nomis La plej granda germana Zamenhoffesto, ne ekzistas interna dokumento: El G.E.R. ni scias pri 130 Munkenaj kaj Suddanubaj partoprenintoj, inter ili ankaŭ d-ro Hörhammer kaj d-ro Ziegler (kiu jam delonge ne plu loĝis en Munkeno), kaj ke planita festparolanto Prof. Perrenoud, Svislando lastminute pro neantaŭviditaj obstakloj ne povis veni, kial studkonsilisto Thalmaier helpis per referato kaj posta lumbildparolado, kaj pri 19 novaj honoraj membroj! Nomoj ne estis menciitaj, nur de Hocke ekzistas diplomo. Fine de Zamenhofa Festo zorgis kiel ĉiam Ehbauer por bona humoro.

Ankaŭ pri 1962 bedaŭrinde ofte mankas detalaj informoj, - sed ŝajnas, ke ankaŭ ne okazis multaj raportindaj aferoj. G.E.R. skribis kelkfoje pri Germana E.-Instituto (urbo Munkeno nenion donacis) kaj s-ano Koch, reelekto de l'ĝisnuna estraro je GEA-Kongreso en Oberkirch, kaj cetere nur informis pri morto de prof. d-ro Hörhammer dum Junio. Grupa Informilo 1 de Januaro montras densan interesan programon por 3 unuaj monatoj, karnavalan aranĝon, multajn kursojn kaj mencias f-inon Hannelore Lukesch kiel plej junan membron, -kiu ankaŭ kuraĝis tuj gvidi kurson por poŝtistaj junuloj. 18an de Februaro grupo (per Spirat) invitis al Jara ĉefkunveno je 7a de Marto, sed tiam denove mankas protokolo! Sekvinta rondletero de Majo kun programo ĝis fino de Junio nomis kiel novan 2an prezidanton nekonatan membron Alexander Magori (kial s-ano Spirat tiam denove por kelkaj jaroj ne plu aperis, mi ne plu scias) kaj kiel prezidanton de novformita junulara sekcio H. Lukesch. Cetere oni konatigis kotizaltiĝon al 1, 50 GM monate. Posta rondletero de Julio fiksas datojn ĝis fino de Aŭgusto, rakontis, ke H. Lukesch fariĝis estraranino de Germana Studenta Esperanto-Ligo kaj informis pri supre raportita morto de d-ro Hörhammer. Fine de Septembro grupo forsendis programon por oktobro (i.a. parolis s-anino Issobe el Japanujo pri atombombo) kaj konigis 3 kursojn; grupa rondletero de 1a de Novembro informis pri nova, certe ankaŭ pli serioza ol antaŭa, kunvenejo Zum Blauen Bock, novembra programo kaj ankaŭ jam pri

Zamenhofa Festo je 16a de Decembro en Rhaetia-Haus, kaj kun Decembra programo grupo forsendis krome inviton de Esperanto-Kartell München al tiu festo, kiun 150 vizitis; festparolado de s-ano Pickel, Nürnberg, poste la jam kutima, ĉiam tre ŝatata lumbildparolado de Thalmaier kaj humoraĵoj de Ehbauer, cetere varbparolis s-ano Weidacher por antaŭ monato fondita Esperanto-Junularo Bavarujo, prezidantino H.Lukesch kaj 1a vicprezidanto Stefan Maŭl.

Ek de 1963 ĉi nun ekzistas por kelkaj jaroj verŝajne ĉiuj informiloj kaj rondleteroj, tial eblas iom kompletaj raportoj. Dum Januaro grupo invitis kun programo ĝis Marto al Februara Jara Cefkunveno, kiun (laŭ Februara rondletero kun programo ĝis Aprilo) bedaŭrinde partoprenis nur 28 personoj - sed pri nombro de la tuta membraro ni nenion aŭdis; oni reelektis la malnovajn estraranojn Deubler, Weidacher, Flatz kaj Gatter. El G.E.R. ni aŭdas pri organizaj aktivecoj de H.Lukesch kun la supre menciita junulara sekcio de la grupo, kiu dum Marto kiel Munkena Organizo de Junaj Esperantistoj = (MOJE) okazigis la unuan jarĉefkunvenon kaj krome kurson por komencantoj. Dum Marto grupo forsendis informilon 3 kun interesa programo ĝis Majo kaj alvokon por leterkampanjo pro nova E.-kurso en Bavara Radio. G.E.R. informis dum Aprilo pri salutvorto de tiama Bavara Ministraprezidanto Alfons Goppel al GEA-Kongreso en Würzburg, krome dum Majo, ke 83-jara UEA-Delegito kaj Honora GEA-Membro Hans Tressel ricevis de Munkena ĉefurbestro D-ro Hans Vogel la federacia meritkrucon je rubando de la Federacia Respubliko Germanio pro siaj meritoj sekve de siaj interpopolaj kontaktoj per Esperanto. Grupa informilo 4 varbis por Fondaĵo Varbado Junularon kun trafa sentenco La junularo estas nia nova sango kaj nova sango estas vivo! Informilo 5 de Majo anoncas programon ĝis Junio, i.a. kun raporto de Deubler pri Würzburga GEA-Kongreso (kie cetere oni reelektis lin kiel vicprezidanton). Rondletero de Aŭgusto informis pri programo ĝis Oktobro kaj ke la firmao Beck am Rathauseck post fortaj klopodoj de Weidacher deklaris sin preta pagi la kostojn por ĉi-jara varbfolio en kiom ajn kvanto, kaj ke nun estis la devo disdoni 15000 varbfoliojn ankaŭ pro varbparolado de Michl Ehbauer, la 9an de Oktobro en Blauer Bock. Ni legis en G.E.R. pri preparoj de 7a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo en Munkeno de 17a de Decembro 1963 ĝis 2a de Januaro 1964 (i.a. kun prelegoj de profesoroj Dr. Ivo Lapenna kaj Reto Rosetti), honora protektoro ĉefurbestro d-ro Hans Vogel. En Oktobra informilo 9 raportis Weidacher, kiu jam ek de jara komenco zorgis pri la rondleteroj, ke 75 personoj vizitis varbvesperon de Ehbauer, kaj ke kelkaj grupanoj disdonis eĉ pli ol 1.000 varbfoliojn, kaj konatigis programon ĝis fino de Novembro inkluzive 5 kursojn. En informiloj 10 kaj 11 (Novembro/Decembro) ne nur aperis programo ĝis fino de Januaro 1964, sed ĉefe invito al Zamenhofa Festo je 29a de Decembro en Augustiner-Verda Salonego, kio estis aranĝita kune kun la partoprenintoj de supre menciita 7a Internacia Seminario de GEJ, festparolanto p-ro d-ro Lapenna. Kun ĉirkaŭ 300 partoprenintoj, inter ili GEA-prezidanto d-ro Herrmann kaj TEJO-prezidanto s-ano Bekker, ĝi vere fariĝis la plej impresa Zamenhof-festo en Germanujo!

Ehbauer kaj s-ano Hermann Schmid el Augsburg zorgis post serioza parto por humora kaj gaja fino de festo.

1964 grupo eldonis 13 informilojn, kiuj regule invitis al grupvesperoj kaj kursoj. Sed kelkaj aferoj estu krome raportataj: Dum jara kunveno partoprenis 35 grupanoj (el kiom, restas nekonate), kiuj ne nur elektis la saman estraron kiel antaŭe, sed ankaŭ akceptis kotizan altiĝon de 18.-GM al 24.-GM por jaro. Tre interesa estis ankaŭ la atentigo eble okazigi UEA-kongreson 1966 en Munkeno kaj dum Junio la informo, ke ĉefurbestro Dr. Vogel estus preta inviti ĝin; okazis ankaŭ interna baloto pri konsento de grupanoj por tiu invito, sed la rezulto nenie estas konatigita kaj ankaŭ ne la posta okazaĵo. Eble Munkena estraro rezignis pri propra aspiro post ekscio de aspiro flanke de Budapeŝto, kie fakte tiam la UEA-kongreso okazis? Dum Majo ni aŭdis pri malsaneco de Koch, ties kursojn daŭrigis H.Lukesch. Dum Junio denove mortis fidela kaj honora membro de grupo, kasisto Josef Flatz, 61-jara (kiu estis ankaŭ honorita de GEA per Honora signo) kaj esperantisto de post 1921, kaj dum Decembro grupo perdis 65-jaran Michl Ehbauer, - kiu jam estis notita kiel kunhelponto de la ĉi-jara Zamenhofa Festo: Gravaj perdoj por la grupo (al kiuj sekvis multaj aliaj)! El G.E.R. ni aŭdis pri la Munkena Esperanto-vivo dum ĉi-jaro tre malmulte: Deubler estis denove elektita kiel vicprezidanto de GEA kaj GEA-Delegito je UEA dum Pentekosta kongreso en Soltau; oni informis pri la veterano Hans Tressel kaj la 70a naskiĝtago de Hans

Koch dum novembro, pri SAT-aktiveco dum 1a de Majo kaj disdono de 5.000 flugfolioj de GEJ Sich verständigen- aber wie? (=interkompreniĝi- sed kiel?), aperis alvoko al sonbendkontaktoj de s-ano Conrad kaj rilate la junularo (ĉu ĝi ankaŭ eldonis propran informilon je tiu tempo, mi ne scias, almenaŭ ne ekzistas ekzempleroj en kluba arkivo) ni legas pri granda aktiveco de la tiamaj ge-Munkenanoj H.Lukesch, Stefan Maul kaj Dieter Gernert. La Zamenhofa-Festo okazis denove en Rhaetia-domo kaj s-ano Deubler povis tie saluti ĉirkaŭ 150 partoprenintojn. Estis 2 festprelegoj de s-ano Anton H. Tanner kaj s-ano Michael Zeilinger, Fürth; s-ano Stefan Maul disaŭdigis 2 surbendigitajn humorajn prezentadojn, kiujn Ehbauer faris kelkajn monatojn antaŭ sia morto, kaj fine montris Thalmaier lumbildojn pri sia vojaĝo al Palestino.

1965 alportis drastan ŝanĝon por la grupo: Deubler, kiu fariĝis ĉi-jare 70-jara, rezignis reelekton je grupo (kaj ankaŭ kiel vicprezidanto de GEA, - sekve dum jaroj ne plu ekzistis tiu rekta drato al GEA-estraro), kaj, ĉar ankaŭ Weidacher rezignis, la grupo ricevis je pinto novajn gvidantojn: Tanner fariĝis prezidanto, vicprezidanto Ljubiša Jevtiĉ, ge-sekretarioj Gatter/Winter, kasisto Schottenhammer kun s-ano Rheintaler kiel anstataŭanto, revizoro s-ano Wurm kaj kelkaj kromaj oficoj: por informoj Conrad, junularo H.Lukesch, konsilantoj Hauber kaj Paech, kiu ankaŭ agis por SAT, kaj fine grupo faris Deubler je honora prezidanto. Tiu ŝanĝo kaj la senduba aktiveco de la multaj novuloj bedaŭrinde koincidis kun sufiĉe grava periodo de laceco je multaj grupanoj. Jam je jarkomenco s-anino Rabe urĝe petis viziti kursojn en Riemerschmid-lernejo, por ke grupo ne perdu pro tro malmultaj partoprenintoj la ĝis nun senkoste de urbo ricevatajn ejojn. Dum Aprilo grupo devis pro tro malmultaj partoprenintoj denove ŝanĝi klubejon al iom primitiva gastejo Schützenlust (kaj antaŭa restoracio rifuzis nomi la novan adreson, kiam interesuloj tie demandis), kiu certe ne estis agrabla. Do, malgraŭ bona programo (kun distra vespero kun famkonata aktoro kaj E.-humoristo s-ano Starke, Nürnberg) kaj 13 dum jaro forsenditaj informiloj, ĝenerale nur malmultaj regule vizitis la grup-vesperojn. Aŭtune je komenco de nova lerneja jaro grupo tial denove petis helpon por kursoj, kiujn estris krom s-aninoj Rabe kaj Lukesch nun ankaŭ s-ano Conrad. Antaŭe ankoraŭ kelkajn aferojn: Dum Majo sukcesis trovi en registara konsilisto Dro Michael Vorbeck ĉe Bavara Ministerio por Edukaj kaj Kulturaj Aferoj en Munkeno novan direktoron de Germana E.-Instituto (post la morto de Dr. Hörhammer 3 jarojn antaŭe); okazis en Munkeno de 25a de Junio ĝis 3a de Oktobro Internacia Trafikekspozicio, kie ekzistis dum tiu tempo ankaŭ Esperanto-ĝiĉeto, kaj pro kio urbo eldonis multkoloran esperantlingvan varbprospekton; fine ankaŭ s-ano Koch ricevis per ĉefurbestro Dr. Vogel Federacian Meritkrucon. Aliflanke denove foriris 3 meritplenaj grupanoj: Mortis dum Aŭgusto s-anoj Hauzeneder kaj Schwab, kaj dum Oktobro honora membro Hans Tressel, - grupo donis al lia vidvino Luise honoran membrecon, -sed la maljunuloj forrestis ĉiam pli, kaj gejunuloj malgraŭ aktiveco de H.Lukesch mankis! Por honora prezidanto Deubler, kiu Novembre fariĝis 70-aĝa, certe estis iom malgaje vidi tion, ankaŭ se en Novembra numero de G.E.R. aperis kun granda laŭdo bela fotoĵo, montranta lin kun M.Ehbauer. Dum Oktobro oni jam invitis al Zamenhofa Festo en Rhaetenhaus, fest-parolinto s-ano Dro Vorbeck, kaj post paŭzo sekvis tradicie lumbildparolado de Thalmaier, - ekzistas ankoraŭ bela invita folio, sed detalaĵoj pri la festo mem bedaŭrinde mankas; ofta okazaĵo, ke per informiloj ni scias pri aranĝoj, sed ne ekzistas posta detala informo pri la evento.

Dum Novembro grupo elektis Spirat kiel UEA-delegiton de Munkeno post morto de Tressel, - kaj la nova prezidanto Tanner jam deklaris, ke li venontjare ne plu povos labori kiel prezidanto de la grupo! Cetere dum tuta jaro 1965 kaj poste ĝis 30.06.1966 la esperantistoj en la mondo, kaj nature ankaŭ la grupanoj, kolektis subskribojn por peticio al Unuigitaj Nacioj pro jaro de Internacia Kunlaboro. Lasta jar-informilo de 15.12.65 tiel ne nur enhavis Januaran programon, sed ripetitan peton kolekti tiujn subskribojn (dum Januaro ni povis legi, ke intertempe ankaŭ ĉefministro Goppel kaj ĉefurbestro Dr. H.J. Vogel donis la subskribon!).

1966 situacio de Munkena E.-vivo ne tre ŝanĝiĝis aŭ pliboniĝis, eĉ. kontraŭe: Jam en Januara informilo (kun Februara programo) ni legas pri morto de longjara membro s-ano Dr. Lang, -kaj dum Aprilo mortis per koratako Konrad Deubler! Vera ŝoko por multegaj amikoj kaj nature ankaŭ por Munkena grupo, al kiu nun mankis patra figuro, kiu ĉiam ĉion bone sciis kaj povis helpi per kontaktoj en la tuta mondo!

Intertempe okazis elekto, kaj pro ofta profesia foresto de nova 1a gvidanto Spirat oni krome elektis 4 konsilantojn: Jevtiĉ, Winter, kaj nove Gerald E. Tucker kaj A. Meinart, cetere ne multe ŝanĝiĝis, Tanner restis ankoraŭ reprezentanto. Iom regule aperis la informiloj kun monata programo, sed jam dum Aprilo Spirat plendas, ke momente ne eblus ŝanĝi en pli taŭgan klubojn, ĉar oni ĉiam postulus garantion pri almenaŭ 20 regulaj partoprenintoj, kaj ne eblus doni tiun garantion, ĉar ĝenerale nur venus ĉirkaŭ 17 membroj. Conrad provis varbadon per sonbendoj kaj varb-alumetoj, sed la anaro ne kreskis. Ankaŭ junularo ne plu montris multe da aktiveco, ĉar f-ino Lukesch edziniĝis dum Oktobro (G.E.R. ĉi-jare informis nur 2-foje pri Munkeno, nome je morto de Deubler kaj edziniĝo de Lukesch, nova nomo Elsässer)- kaj nature ŝi nun havis aliajn interesojn ol kursestri. En grupaj informiloj kiel ge-kursestroj aperis nun nur ankoraŭ la nomoj de Rabe, fratino Corinna (Pax Christi;- fakte ŝi ankoraŭ instruis dum tuta tempo ĝis fino de 80-aj jaroj!), kaj nove: Spirat (por sindikataj kursoj). Cetere informis grupo pri planita pli granda ekspozicio en venonta jaro kaj jam ek de Oktobro invitis al ĉi-jara Zamenhofa Festo, denove en Rhaeten-Haus, festparolinto s-ano Ludwig Pickel, Nürnberg. Partoprenis pli ol 100, kiuj poste ankoraŭ aŭdis/vidis lumbildparoladojn de Thalmaier pri Turkujo, kaj Starke pri Hungario.

1967 komencis tre malbone: 4 aktivaj membroj mortis dum Januaro!! s-anoj Bernhard Färber kaj Franz Wunderer, s-anino d-rino Leubner kaj Honora Membro Hans Koch (je tombiĝo parolis Dro Vorbeck por GEI kaj Spirat pro UEA kaj GEA)!! Precipe la 2 lastnomitaj signifis gravan parton de Munkena E.-historio. Tamen ni rajtas konstati: Reĝo mortis, vivu reĝo, kaj la nova prezidanto Spirat nun vere zorgis pri nova aktiveco, ne nur de E.-vivo en Munkeno sed ankaŭ en regiono. Li iomete regule forsendis monatajn leterojn, reaktivigis SOBELOn, kaj kuraĝis proponi la aranĝon de GEA-kongreso 1968! Rilate SOBELo okazis jam dum Aprilo en Büchlberg tre sukcesa kunveno kun 140 gepartoprenintoj, kvazaŭ kongreso (oni elektis Spirat, prezidanton; Starke, vicprezidanton; Rabe, sekretariinon; Tucker por gejunuloj); rilate GEA-kongreso Spirat sukcesis ricevi invit-leteron de Munkena ĉefurbestro Dr. Vogel kaj GEA-kongreso 1967 en Hamburg akceptis la inviton; ĝi krome decidis fondi novan Germanan Esperanto-Instituton, kiu estu sub la kontrolo de GEA, - ĉar en Munkeno ja preskaŭ neniuj plu vivis de ĉi-rilataj aktivuloj, tial oni volonte akceptis tiun decidon kaj fordonis la librojn ktp. al pastoro Burckhardt por GEA). Fine per la humoraj/instigaj rondleteroj de Spirat nun ankaŭ nombro de partoprenintoj je grup-vesperoj kaj aranĝoj efekive pligrandiĝis; tiam Spirat iniciatis novan organizan formon: Munkena aktivuloj fondis je eksterordinara ĉefkunveno, 7an de Junio, novan societon: Esperanto-Klubo Munkeno eV (=enregistrata asocio)-Spirat prezidanto, vic= Tucker), kaj formis statutojn tiel, ke estonte donacoj validus por impostliberigo! Pro tiu aktiveco ne tro ĝenis denova ŝanĝo de kluboj al Postgarten, certe ankaŭ pli bona kvalito ol Schützenlust! Spirat ankaŭ kune preparis por semajnfino 2an/3an de Septembro Bavaran Esperanto-Tagon en Augsburg, kiun partoprenis ĉirkaŭ 150 gesanoj (inter ili gastoj el 7 landoj kaj 20 infanoj) kaj akcepton per la tiea ĉefurbestro, eĉ Bavara Radio informis sed bedaŭrinde ne en ĝusta maniero. En Novembra numero de G.E.R. aperis Unua Bulteno por la venontjara GEA-Kongreso, kiu jam notis Löwenbräu-bierfarejon kiel kongresejon. La Zamenhofa Festo ĉijare okazis unue laŭ permeso de ĉefurbestro Dro Vogel en Granda Sidejo de Nova Urbodomo, kie Spirat salutis la gastojn kaj poste festparoladis UEA-ĉefdelegito Reinhard Haupenthal el Saarbrücken, dum vira kantasocieto Biedersinn helpis plibeligi la solenon; poste la partoprenintoj iris kelkajn 100 metrojn en klubojn, kie okazis kun tombolo ktp. la kutima amikeca kunesto. Bedaŭrinde ankaŭ ĉifoje ne ekzistas raporto, kio kaj kiel nun detale okazis ktp. Kaj nun G.E.R. aperigis en Januara numero la 2an bultenon por la kongreso kun anoncoj pri ekskursoj kaj en Februara numero 3a bulteno donis kromajn informojn; ĝis tiam anoncis sin 142 ges-anoj. En Aprila numero aperis invito al GEA-jarĉefkunveno je 1a de Junio; Maja numero montris fotaĵon de rondo de Munkena klubanoj kaj la programon de la kongreso kun salutvorto de Dr. Vogel. Fine Julia numero donis kun kelkaj fotaĵoj 5-paĝan pozitivan raporton pri kongreso: Estis pli ol 300 partoprenintoj, do iomete pli ol jaron antaŭe. Oni laŭdis ĉefe 2 novaĵojn: Partoprenon de 40 infanoj kun speciala programo sed ankaŭ parte en la kadro de la oficiala kongres-programo kaj precipe podian diskuton inter profesoroj de la Munkena universitato unuflanke kaj aliflanke de Esperanto-movado p-ro d-ro Lapenna (kiu ankaŭ afable anstataŭ p-ro Rotkvic dimanĉe festparoladis), Dro Bormann kaj Dro

Chiussi; urba lerneja konsilisto d-ro Fingerle bonege direktis objektivan kaj harmonian diskuton. Rimarkinda estis sendube la inaŭguro de novkomponita Esperanto-meso de la jugoslava komponisto Janko Jezovšek en la preĝejo St.Bonifaz, kiu trovis fincan subtenon de la ĉefepiskopo de München-Freising (estis GM 1.000.-, dum la Bavara ŝtato bei der gegenwärtigen Haushaltslage (= pro la nuna buĝeta situacio) ne kapablis kongreson subvencii.- Post la kongreso ni nenion plu povis legi dum 1968 en G.E.R. pri Munkena E.-vivo. Sed el denove iom regule forsenditaj rondleteroj (kiuj ankaŭ informis pri monata programo) kaj bavara revuo ni povas ankoraŭ raporti pri kelkaj aferoj. Jaran Kunsidon je 31a de Januaro partoprenis 25 (de entute 83 membroj!), kiuj malŝarĝis prezidanton Spirat, anstataŭanton Gerald Tucker, kasiston Fritz Schottenhammer kaj sekretariinon Caroline Rabe, post kiam gerevizoroj Wurm kaj Kastenmüller deklaris ĉion en bona ordo. Oni akceptis krome kotiz-altiĝon (al ĉirkaŭ 32.--GM jare) kaj la ŝanĝon de kelkaj statutoj laŭ deziro de tribunalo. Dum Aprilo mortis post longa malsaneco nun ankaŭ la longjara SAT-peranto en Munkeno k-do Bitzer. Cetere kelkfoje Spirat postulis kongres-anĝon de multaj Munkenanoj kaj petis kroman fincan helpon. Je 1a de Majo kelkaj s-anoj sur Königsplatz (Reĝa Placo) varbis per Esperanto-bendo. Grave estis, ke Spirat ek de Majo trovis tutcentre loĝejon, kiu nun ankaŭ servis al la Klubo, -kiu estis je 26a de Septembro enregistrita- kaj kie estonte povis ankaŭ okazi E.-kursoj. Dum Novembro grupestraro invitis al Zamenhofa Festo je 7a de Decembro, kiun Klubo aranĝis ĉi-jare iomete senceremonie denove en Rhaetenhaus, kaj la ĝenerala sekretario de GEA, Ludwig Pickel, ĝis nun ofta vizitinto de Munkenaj aranĝoj, iom festparoladis; entute oni prijuĝis la feston kiel bonsukcesan kaj tre harmonian.

1969 - 1977

Dum 1969 ne okazis multaj rakontendaj aferoj. Per diversaj rondleteroj oni petis pagi kotizon kaj pliaktivigi. Je jara kunsido dum Marto (novelekto ne necesis, ĉar lastjara elekto validis 3 jarojn) kasisto donis bilancon, kiu pruvis, ke sen kromaj donacoj kaj enspezoj per tombolo dum Zamenhofa Festo 1968 ekzistus defcito, sed ne estis granda diferenco, do, entute oni estis kontenta. Dum Aprilo SOBELO kaj Klubo (dum Junio ankaŭ G.E.R., kiu poste dum tuta jaro nenion pli sciis pri Munkena E.-vivo) informis pri morto de paĉjo Woldemar von der Ley, -kiu (loĝinte en Dachau) jam depost jardekoj ĉefe instruis kaj kolektis infanojn kiel estontajn esperanistojn kaj ankaŭ ankoraŭ 1968 kompetente zorgis pri la infankongreso dum Munkena GEA-kongreso, certe denove grava perdo por la ĉi-tiea E.-vivo. Dum Majo Spirat informis, ke iama prezidanto de Munkena Esperanto-junularo, Hermann Heiß, nun Oberkirch, kaj nova GEA-estrarano parolos je grupvespero, kaj ke Esperanto-grupo el Verona (unu de la ĝemelurboj de Munkeno) kun 50 personoj vizitos de 31a de Majo ĝis 2a de Junio Munkenon kun oficiala salutletero de la Verona ĉefurbestro al Munkena ĉefurbestro, por kontakti kaj praktiki Esperanton; programo inkluzivis oficialan akcepton flanke de urbo, nature urban rondveturon kaj precipe gajajn kunvenojn kun la Munkenaj ges-a-noj. Fakte ĉio bone sukcesis kaj vicurbestro Bayerle montris multan simpatian. Bedaŭrinde la jam por aŭtuno planita kompensa vizito ne sukcesis, ĉar anonciĝis ne sufiĉe da interesuloj. kaj denove necesis ŝanĝi la klubojn, nun ek de Aŭgusto al Braunauer Hof. Dum Oktobro Spirat forsendis tre kompreneblan plendleteron, ke li kaj la klubaktivuloj estis esperintaj, ke post/per lastjara GEA-kongreso Munkena E.-vivo pliboniĝus, sed fakte kontraŭe ĉiam pli ne plu venos al la grupvesperoj; certe la kluboj ne estis bela aŭ tre agrablaj, sed por trovi alian pli taŭgan restoracion aŭ klubo devus por ĉi-pagi 100.-GM monate aŭ garantii regulan viziton de almenaŭ 25 ĉeestantoj, -ambaŭ alternativoj bedaŭrinde ne eblus. Kaj sekvis la plej malfavora konsekvenco, nome, ke unuan fojon post la 2a Mondmilito Munkeno ne aranĝis propran Zamenhofan Feston, ĉar mankis taŭga salono kaj sufiĉe aktivaj Munkenanoj; klubanoj estis anstataŭe invititaj de Augsburganoj, prezidanto Hermann Schmid, festi kun ili! Kaj fakte tio okazis, certe pli bone ol nenio, tamen plorinda okazaĵo!



Horst Spirat inter edzino kaj filino
(maldekstre malantaŭe Karl Schech, Pfaffenhofen)



Sepp Weidacher

Informadtablo en Neuhauser-strato
je Richard-Strauß-Brunnen
Reinhold Majer, maldekstre
Friedrich Hilpert, dekstre



1970 komenciĝis por aŭtoro de ĉi-verketo iomete stranga epoko, ĉar ne ekzistas ankoraŭ multaj, fine eĉ neniuj rondleteroj! Kaj ankaŭ en G.E.R. ne ofte oni informis pri Munkena E.-vivo, - ekz. 1970 eĉ. nenion; do, mi povas nur malmulte raportis, eĉ pri aliaj estraranoj kaj klubejo mi ne ĉiam trovis notojn. Dum Februaro necesis denove ŝanĝi klubejon, ĉi-foje al Goldener Stern, - sed tie oni ankaŭ rajtis resti ne tre longe. Je 7a de Marto Munkenanoj festis 50an E.-jubileon de k-do Anton Winter, interne patriarko nomita, kiu dum 3a Regno ankaŭ estis estinta viktimo de Gestapo (= sekreta ŝtata polico) kaj en koncentrejo Dachau, kaj kiu post 2a Mondmilito apartenis al la ĉiamaj partoprenintoj de klubkunvenoj, ankaŭ kursestris kaj posedis bonegan poluritan esprimeblecon E.-lingve. Venis ankaŭ multaj gastoj, - sed 1 monaton poste li jam mortis, 74-jarulo, denove grava perdo! Rondletero de Aprilo konatigis programon ĝis Majo kaj en Majo jam publikiĝis la demando, ĉu oni rajtis resti en Goldener Stern pro tro malmultaj partoprenintoj. Pli dankemaj al Spirat estis la s-anoj en Pfaffenhofen, kie li kursestris dum monatoj kaj kie nun fondiĝis Esperanto-Societo Hallertau, -sed nature tiam ankaŭ partoprenis kelkaj Munkenanoj. Same ili helpis en Augsburg, kie okazis SAT-kongreso. En Septembra de rondletero konatiĝis ne nur denove morto de maljuna fidela s-anino Anny Kastenmüller, sed ankaŭ programo ĝis Oktobro inkluzive SOBELO-kunveno laŭ invito de Thalmaier en Landshut. Zamenhof-feston oni festis en hotela salonego vidalvide al stacidomo, partoprenis ĉirkaŭ 50 Munkenanoj kaj gastoj, inter ili ankaŭ iama 2a prezidanto Tucker (kiu post edziĝo nun loĝis en Augsburg), kaj Spirat honorigis s-inon Raabe, Hermann Schmid kaj Georg Knaus, Büchelberg per la Ora Insigno de SOBELO pro ilia diligenta kaj sukcesa laboro por Esperanto; germanlingve oni aŭdis ĉi-foje kiel kvazaŭan festparoladon pri olimpiado kaj Esperanto, kaj tombolo kaj kantoj zorgis pri bonhumoro.

Pri E.-vivo en Munkeno 1971 G.E.R. fakte nur raportis dum Novembro, ke Spirat kun grupo da Munkenanoj vizitis kompanse Verona, - sed pri tiu vizito (kiu okazis dum Junio) informis jam ekzistanta rondletero de Majo kune kun programo ĝis Junio. Junia rondletero atentigis pri venontjaraj olimpikoj kaj ke oni atendus viziton de 800 esperantistoj dum tiu tempo; krome Spirat informis pri invito de membro Alfred Gißibl al Garmisch-Partenkirchen por komuna migrado kaj kunveno pro estonta Ligo-tago en Rosenheim. SOBELO do renkontiĝis je 13a/14a de Novembro en Rosenheim k, kiel Honora Gasto, ankaŭ partoprenis s-ano Ralph Harry, ambasadoro el Aŭstralio en Bonn, kiu poste dum tuta olimpiado 1972 estis en Munkeno. Je 15a de Decembro Klubo invitis al (almenaŭ ek de Septembro, pli precize mi ne povis ĝin ekscii) nova klubejo Europäischer Hof, je ĉefstacidomo, por festi 50-jaran jubileon de esperantistiĝo de k-do Ludwig Gammel kaj Fritz Schottenhammer, kiuj ricevis tiam ankaŭ GEA-honorsignon. Pri aliaj aranĝoj mi nenion trovis, ankaŭ ĉu kaj kie ĉijare okazis Zamenhofa Festo, mi ne povis eltrovi.

Pri 1972 mi ankoraŭ malpli informojn trovis: Ekzistas por la jaro nur 1 sola rondletero de Marto, kiu informis, ke hektografo, kiun ĝis nun pruntedonis s-anino Rabe, ne plu bone funkcias kaj tial nepre estu aĉetota nova aparato, - kaj cetere petis monon por eldoni senkoston E.-broŝuron, kiun laŭ propono de aŭstralia ambasadoro dum olimpiado en Munkeno ricevu la partoprenantaj sportuloj.

Kiel renkontejo dum olimpiado por esperantistoj el la tuta mondo en Munkeno servis Europäischer Hof. Cetere G.E.R. raportis sufiĉe detale pri kunlaboro de esperantistoj dum olimpiado kaj nomas el Munkeno s-anon Conrad, kiu kreis kontaktojn inter la teamanoj (al tio apartenis aŭstralia ambasadoro Ralph Harry, krome ĉefhostino de FIAT-informstando Ursula Grattapaglia el Italujo, Anton Oberndorfer el Aŭstrio, Jo Haazen, Belgio kaj Ludwig Pickel, Nürnberg), disdonis informilojn kaj kreis telefonan interligon inter Munkeno kaj Nurenbergo kun Ludwig Pickel, kiu agis parte el Nurenbergo parte en Munkeno mem. Ankaŭ Bavara Radio kaj multaj gazetoj raportis tiam pri la disdonita supre nomita E.-broŝuro, -sed la Munkena anaro de esperantistoj bedaŭrinde ne pligrandiĝis tial. Cetere G.E.R. apude informis pri Spirat, kiu fariĝis dum GEA-kongreso en Braunschweig novelektita prezidanto de la konsilantaro. Zamenhofa festo okazis je 17a de decembro, verŝajne en Europäischer Hof, - kaj Weidacher opinias, ke temis pri bone vizitita festo, mi mem bedaŭrinde ne povas bone rememori kaj mankas ankaŭ ĉiuj dokumentoj.

Pri 1973 raporto bedaŭrinde devas esti ankoraŭ pli mallonga, ĉar G.E.R. informis eĉ ne unu fojon, kaj aliflanke ekzistas ankaŭ nur 2 rondleteroj: Unu de Novembro konatigis morton de ĉiame aktiva helpantino Caroline Rabe (ankaŭ vere grava perdo) kaj de regulaj renkontiĝoj ĉiam ankoraŭ en Europäischer Hof, kaj cetere postulis sufiĉe pli altan kotizon estonte, kaj la alia de Decembro, kiu invitis al Zamenhofa Festo en Pfaffenhofen.

1974 ne ekzistas iu rondletero kaj same en G.E.R. mankis ĉiu informo pri Munkena E.-vivo; nur en Decembra numero de G.E.R. aperis fotaĵo, kiu ekestis dum Oktobra Fervojista jarkunveno en Bamberg kaj montris grupestron Spirat. Pli multe mi ne scias raporti, ĉar mankas dokumentoj. Sed de Weidacher mi aŭdis, ke dum ĉi-jaro klubanoj renkontiĝis en Landshuter Hof, Arnulfstrato, kie ili ankaŭ bone festis Zamenhofan naskiĝtagon kun granda tombolo, kiun s-ino Ehrhard kaj Weidacher aranĝis. Cetere, ke dum la tuta tempo Weidacher kun Dro Kalckhoff kaj Conrad renkontiĝis kaj ili intense laboris, pripensis kaj kolektis por postaj ekspozicioj.

1975 ankaŭ ekzistas nur 1 rondletero je Pasko, sed ni povas legi tie, ke ek de Januaro kluba kunvenejo estis en Holzkirchner Stacidomo (parto de ĉefstacidomo); tie nun fine eblis ankaŭ helpe de Munkena fervojista E.-grupo ekspozicii, - kaj tio nun ĉiam denove okazis. Tiele trovis vojon al Esperantio i.a. s-anoj Friedrich B. Hilpert kaj d-ro Reinhard Fößmeier, - sed pri tio pli poste. Iom detale ankaŭ Eŭropa Esperanto-Revuo (estonte: E.E.R., temis pri antaŭa G.E.R., kiu ŝanĝis la nomon) informis, ke Munkena E.-grupo kunlabore kun la distrikt-komisiito por Esperanto de la germana fervojo... Josef Weidacher, organizis informkunvenon ...la 20 jan 1975... en stacidomo ekspoziciejo. Je inform-kunveno helpis i.a. Pickel kaj Thalmaier, kaj sukcesis atingi 10 novlernintojn. Pri la ekspozicio komence aktive kunlaboris ankaŭ Fuchs, kiu pro bonaj kontaktoj kun meti-eduka studrondo (cetere kelkaj el ili partoprenis la tutan tempon de ĉi-tiea restado aktive kluban vivon!) peris ampleksan aldonon de infandeseĝnaĵoj, eĉ el Pollando. El E.E.R. ni poste aŭdis, ke intertempe mortis 4 malnovaj fidelaj gemembroj, nome Honora Membrino Luise Tressel, vidvino de longjara UEA-delegito H. Tressel, cetere Wünschel kaj Demuth (ambaŭ pli aĝaj ol 80) kaj d-ro Schmid-Lindner (72-jara). E.E.R. en Septembra numero publikigis salutkarton de landa partia konferenco de SPD en Munkeno al la Nürnberga redakcio kun subskriboj de Dr. Vogel (nun federacia justicministro), federacia kanceliero Helmut Schmidt, Volkmar Gabert, SPD-frakciestro en bavara parlamento k.a. Fine dum Decembro E.E.R. aperigis fotaĵojn kaj tre laŭdajn recenzojn pri Spirat kun itala edzino Antonia Bonomi el Verona kaj pri Weidacher, nomita la teknika animo de la kluba informa kaj ekspozicia laboro, kiun subtenas ...komprenema edzino.!

Ek de 1976 situacio nun normaliĝis, ekzistas jam 7 rondleteroj kaj ankaŭ en E.E.R. ni povis pli ofte legi pri Munkeno. Je jarkomenco informis programo pri Januaro kaj Februaro, inkluzive de tiam bone sukcesa karnevala aranĝo, ĉefkunveno kaj jam notis intencitan vojaĝon al Verona dum Majo. Sekvis programo por Marto/Aprilo, kaj el E.E.R. ni scias pri Germana Esperanto-Ekspozicio en Augsburg, - kiu baziĝis sur ĉi-tieaj supre menciitaj ekspozicioj de Weidacher (kaj aliaj Munkenanoj), kiu ankaŭ en Augsburg multe helpis. Dum ekspozicia tempo ankaŭ fondiĝis kiel kun-fandiĝo de SOBELO kaj NOBELO Bavara Esperanto-Ligo (BELO), kies estro fariĝis Hermann Schmid, Augsburg, Weidacher fariĝis vicprezidanto, Reinhold Maier, Munkeno komisiito pri oficialaj kontaktoj. Je vojaĝo al Verona partoprenis 19 Munkenanoj, kiuj estis tre kontentaj, - E.E.R. informis tre detale pri tiu vizito en numero 7/8, same kiel rondletero, kiu enhavis krome programon por Septembro/Oktobro kun indiko pri ekspozicio ripetita en Holzkirchner stacidomo de 9a- 11a de Oktobro, je 11a kun varba vespero kaj lumbildparolado: Denove estis Weidacher, kiu ĉefe kaŭzis tiun bonan varbadon; ĉirkaŭ 150 interesuloj vizitis ĝin, - tiele R. Maier sukcesis estri novan kurson, ankaŭ E.E.R. informis pri tio. Rondletero de 18a de Oktobro konigis programon ĝis decembro, krome atentigis pri nova kunvenejo Deutsches Eck kaj invitis al jara ĉefkunveno kun nov-elekto de estraro, ĉar Spirat opiniis ne plu trovi necesan tempon, - sed tiam li ankoraŭfoje prokrastis demision. Dum Novembro sekvis invito al Zamenhofa Festo (post komuna manĝado en Deutsches Eck) en Holzkirchner stacidomo, Thalmaier tradicie helpis per lumbildparolado kaj ĉiuj partoprenintoj estis laŭdire tre kontentaj. Je 15a de Decembro oni konigis programon kun kursvesperoj ĝis mezo de Januaro, kaj krome E.-junularo refondiĝis, - do, Munkena E.-vivo vere

reaktiviĝis!

Dum 1977 klubo forsendis ĉirkaŭ 20 informilojn, ke ĉiuj ĉiam sciis aktualan programon, - agitemo de la novaj estraranoj Hilpert, kasisto, kaj Günter Fuchŝ por grupvespera programo montris bonajn fruktojn! Jam karnevala festo dum 12a de Februaro tre sukcesis, kaj studkonsilisto R.Maier zorgis ek de nun regule por kursoj. Cetere oni jam pripensis festadon de 75a klub-jubileo 1979. Dum Majo estis denove planita 5-taga ekskurso al Verona, sed mi ne scias, ĉu ĝi okazis. Dum Junio aperis informo, ke verŝajne je jarfino klubo devus forlasi klubejon en Holzkirchner stacidomo, sed ke gastejestroj de Deutsches Eck, Adolf kaj Erika Kleinschrod akceptus klubon ankaŭ por longa tempo en sufiĉe granda apuda ĉambro, krome ofertus grandan ŝloseblan kelan ĉambron, kie klubo povis stoki materialon kaj la grandan bibliotekon. Posta tempo kelkaj klubanoj, ĉefe ankaŭ junularo oferis multajn horojn/tagojn, por ordigi kaj renovigi kelan ejon, temis pri malnova domo kun subteraĵo ankoraŭ el tempo antaŭ unua mondmilito. Jam programo de Aŭgusto atentigis al denova ekspozicio je Holzkirchner stacidomo dum 15a-17a de Oktobro kaj Zamenhofa Festo je 17a de Decembro. Sekvis aviso de novaj kursoj, - kaj en E.E.R. aperis kun fotaĵo laŭda artikolo pri Fößmeier, tiam ankoraŭ juna informadika studento, kiu post ekscii pri E. jaron antaŭe mem tiom bone lernis Esperanton, ke li nun jam fariĝis el informato informanto; li fariĝis prezidanto de E.-junularo (vicprezidanto kaj kasisto Hilpert, sekretariino Renate Gareis), kun kiu li helpis je ĉi-jara ekspozicio kaj krome kelkfoje je informstando, i.a. dum okazigo de Munkena urba junularoficejo en Olimpiada-Parko, kien venis pli ol 10.000 interesuloj! Cetere, malgraŭ ke dum jaro denove 5 maljunaj fidelaj s-anoj, nome Franz Xaver Erhard kaj Karola Schmalzl (ambaŭ konataj en klubo), Kurt Schneikart, Fritz Thasler kaj Kurt Weil mortis, dank'al varbado nombro de klubanoj pligrandiĝis. Antaŭ ĉi-jara Zamenhofa-Festo, kiu denove komenciĝis en Deutsches Eck per komuna manĝado kaj finiĝis per kunesto kun tombolo en Holzkirchner stacidomo, klubo jam forsendis programon por Januaro 1978 kaj invitis al inaŭguro de "Unua Bavara Esperanto-Gastejo" Deutsches Eck je la 21a de Januaro.

1978 - 1991

Pri 1978 denove ekzistas pli ol 20 informiloj/programoj pri klubvesperoj kun kaj sen programo, kursoj, ekskursoj (i.a. marŝis 11 fortaj klubanoj kun tieaj kaj Aŭstriaĵ s-anoj de Reichenhall 4 horojn al Hochstaufen, 1800m alte, kie ili kunfestis 125-jaran jubileon de pinta kruco montrinte E.-flageton), ekspozicioj, prelegoj kaj nature ankaŭ kelkaj festoj. Sed unue dum Januaro okazis Jara kunsido de E.-junularo, kiam Johann-Andreas Pachter (kiu ankaŭ jam antaŭe tre aktive kunlaboris je informstandoj) estis nomita kiel kunlaboranto por varbado, la aliaj estraranoj restis kaj cetere oni decidis, regule renkontiĝi en kelo, kiun oni plie renovigu. Supre menciita inaŭgura festo (senvualigo de tabulo, kiu prezentis ĝin, aŭtoro parolis kelkajn vortojn) kun senkosta biero ekestis laŭ plano; partoprenis ankaŭ televido kaj gazetaro, -kaj kun bona sukceso:Post 1 semajno venis televida teamo de Bavara III kaj poste Zweites Deutsches Fernsehen (t.e. Dua Germana Televizio) informis pri Munkena E.-vivo! Karnavalan feston bedaŭrinde vizitis ne tro multaj. Jara kunsido rezultigis cezuron: Grupestro Spirat, kiu jam delonge estis malsana, nun fine demisiis, kaj nova grupestro fariĝis Reinhold Maier, dum Weidacher restis Vicprezidanto kaj Hilpert trezoristo, junulara reprezentanto Fößmeier. Dum tiu kunsido oni ankaŭ ŝanĝis iom la statutojn, por ke la junularo fariĝu pli memstara, - kaj tiele poste povis aliĝi al Munkena Junularringo (kaj de ĝi ricevi oficialajn subtenojn!).

Lasta numero de E.E.R. 1/1978 (dum Majo per koratako mortis eldodonisto Ludwig Pickel, Nürnberg, kiu jam delonge estis malsana, sed ĉiam denove estis partopreninta la Munkenajn aranĝojn) montris eĉ. 2 freŝdatajn Munkenajn fotaĵojn:Pri malfermiĝo de Unua Esperanto-Gastejo de Bavario je 21.01.78, kaj pri lastjara Zamenhof-festo kun Weidacher antaŭ librostando de Libroservo Pickel. Ek de tiam mankis bedaŭrinde tiu bona informilo pri eŭropa-, germana-kaj Munkena E.-vivo. Esperanto en F.R.Germanio

(oficiala bulteno de GEA), kiu aperis ĝis fino de 1981, kaj Esperanto en Bavario (Bulteno de Bavara Esperanto-Ligo) konpreneble ne estis samvaloraj anstataŭaĵoj - tial ekzistantaj grupaj rondleteroj estas estonte miaj ĉefaj informiloj. Munkena junularo organizis en Mautner Schloß en Burghausen je semajnfino 15a/16a de Aprilo E.-ekspozicion, kiu bone sukcesis kaj kunhelpis, ke firmao Wacker donacis al klubo uzitan, sed bonan skribmaŝinon! Ekestis ankaŭ kunlaboro kun Eŭropa-Unio, kaj junularo organizis kelkfoje (parte kune kun ĝi) tute en centro de Munkeno informstandojn. Dum Majo kelkaj Munkenanoj partoprenis la GEA-kongreson en Augsburg kaj/aŭ ankaŭ tie tiam okazintan Jaran kunvenon de BELO, kie 3 membroj de Munkena klubo, nome Hilpert, R. Maier kaj August Meier el Dachau apartenis al estraro. Aŭtuna kunveno de BELO estis invitita al Munkeno, 4an/5an de Novembro, al Deutsches Eck. Ties kelaj ĉambroj estis intertempe tiom bone ordigitaj, ke la fina translokiĝo el Holzkirchner stacidomo ek de Julio eblis, - sed tio ankaŭ necesis. Dum certa tempo klubo ankoraŭ rajtis uzi ĉambron en fervojista domo Paul-Heyse-strato 9, 2a etaĝo.

Malgraŭ la tieaj utiloj (ekz. ebleco por mem-mastrumado) ekzistis ankaŭ problemoj (ekz. necesis sonorigi, se pordo estis fermita), kaj fakte klubo ne uzis longe ĉi-solvon. Raportinda estas ankoraŭ dum Aŭgusto tri-kvaron-hora elsendado pri Munkena E.-junularo en pop-muzika-serio Juna Ondo, dum Septembro nova informstando de junularo en Olimpia Parko, partopreno de kelkaj klubestraranoj je oficiala akcepto de bavara ĉefministro en kadro de Europa Unio, kaj dum Novembro oficiala fondiĝo de E.-altlerneja grupo. Zamenhofa festo komencis per komuna manĝado en Deutsches Eck kaj finiĝis en supre menciita kluba libertempejo de fervojista E.-grupo en Paul-Heyse-str.9, -festparoladis R. Fößmeier; kunvenis 80 partoprenintoj.

Malgraŭ ke en lasta cirkulero de Decembro 1978 estis anoncite, ke pro tro multa laboro estonte cirkuleroj nur kvaronjare estos forsendotaj, tamen 1979 klubo forsendis pli ol la duoblon. Riĉa programo (kiel preskaŭ ĉiujare: sukcesa karnavala vespero, kelkaj ekskursoj en la Alpoj kun gvidado de menciita fidela membro el Garmisch-Partenkirchen Ĝiŝibl, diversaj E.-kursoj, interesaj lumbildprelegoj): Dum Marto estis jara-ĉefkunveno, kiun vizitis 22 klubanoj; raportindaj aferoj: Kiel nova sekretariino estis elektita Amelia Garcia kaj Hilpert povis informi, ke post 50 gemembroj 1976 kaj 57 fine de 1977 nun ekzistus 70 klubanoj, certe bona frukto de multa varbado! Aliaj bonaj okazaĵoj: Germana Ondo en Köln sendis je 16a de Marto 6-foje 12-minutan intervjuon kun Munkena E.-junularo eksterlanden. Dum Majo okazis de 5a-20a Europaj Semajnoj, -kaj en tiu kadro kunlaboris kaj helpis Munkenaj esperantistoj per informstando sur Marienplaco, kaj ĉefe per ekspozicio Weltsprache und Europäische Integration (= mondlingvo kaj eŭropa integriĝo) en Völkerkundemuseum (=etnografia muzeo), kiu plilongiĝis ĝis 25a de Majo; tiu ekspozicio estis vere impresa kaj temis pri grandega laboro ĉefe de nia Sepp Weidacher! Sed ĉirkaŭ je sama tempo okazis alia E.-ekspozicio en urbkvartalo Neuperlach en domo de konstruŝpar-asocio Neue Heimat, kiun zorgis R.Meier kun helpo de s-ano Conrad. Dum Junio denove necesis ŝanĝo de klub-statutoj por dokumenti memstarecon de junularo, kiu nun ankaŭ membriĝis je distrikta junular-ringo Munkeno-Urbo. Grave: Urbo Munkeno eldonis novan belkoloran faldprospekton en Esperanto, estis 16.000 ekzempleroj! Zamenhof-Festo denove okazis en Deutsches Eck kaj klubojn, kaj venis pli ol 80 partoprenintoj, kio eĉ kaŭzis spacomankon, -tamen ĉiuj estis tre kontentaj! 1979 mortis 2 fidelaj membrinoj, kiuj antaŭe aktive kunlaboris kaj ofte ankaŭ finance tre helpis al klubo: Barbara Bauer, 80 jare kaj la plej maljuna membro, Maria Mayerhauser 95 jarulino.

1980 la estraro kaj la helpintoj denove treege laboris kaj varbis per lingvaj kursoj, prelegoj, ekskursoj (kelkfoje ankaŭ al Pfaffenhofen, kie ja ekzistis tre vigla grupo, kiu ĉi-jare sukcesis, ankaŭ fine nomigi Zamenhof-straton), informstandoj ktp. Karnavala aranĝo denove funkciis kun bona varba efiko, - kaj je jara kunveno la estraro povis informi pri jam 117 membroj! Tre bone estis, ke nun post la morto de ĉiuj iamaj instruistoj denove Munkeno posedis propran ekzamenkomitaton (Fößmeier, Hilpert kaj R.Maier). Daŭra problemo estis (kaj estas ankoraŭ nuntempe) mankinta ĉambro por kursoj kaj prelegoj, ĉar en Deutsches Eck la apuda ĉambro ne ĉiam kaj garantiite restis libera tutan vesperon. Tial oni pripensis, ĉu eblus iam mem aĉeti ejon, kaj pro tio almenaŭ komencu per konstruŝpar-kontrakto, sed, ĉar oni ankoraŭ ne interkonsentis, prokrastis iun findecidon. Krome mi raportu, ke je UEA-Kongreso en Svedio tiea radio

disaŭdigis intervjuon kun GEA-prezidentino Elsbeth Bormann kaj Hilpert, kiu intertempe fariĝis GEA-kasisto. Je 10a de Novembro okazis eksterordinara kunsido, kiun partoprenis 26 membroj; oni altigis kotizon al 50.-GM jare kaj elektis Rüdiger Becker kiel novan grupkasiston, ĉar Hilpert momente rezignis pro tro multe da alia laboro. Jam de Aŭgusto klubo komencis informi kaj inviti al Zamenhof-festo, kiu pro kreskinta grupanaro okazis en Kolpinghaus, 29an de Novembro; en Esperanto en F.R.Germanio ni legis pozitivan kritikon pri tiu festo, kie denove Thalmaier kun lumbildparolado pri vojaĝo al Japanio kaj klubprezidanto R.Maier kiel magiisto ĝojigis la partoprenintojn. La klubo posedis je jarfino 142 membrojn.

1981 komenciĝis per tradicia karnavala festo, tiam en Hansahauŝ, kaj je 2a de Februaro jam sekvis jara kunveno. Nia Honora Membro Weidacher opiniis tute prave, ke li jam sufiĉe longe preskaŭ tro multe laboris por la grupo, kaj ke nun ankaŭ iam pli junaj s-anoj devus aktive kunlabori; tial li demisiis. Nova 2a prezidanto fariĝis docento de angla lingvo ĉe universitato Colin Capell (sed jam ek de komenco kun anstataŭanto Wolfgang Zimmerling, ĉar oni sciis, ke Capell baldaŭ forlasos Munkenon); cetere restis R.Maier, Becker kaj Garcia estraranoj kaj revizoroj r/estis August Meier kaj G. Fuchs; pro kotizaltiĝo bedaŭrinde kelkaj forlasis klubon, restis momente 121 membroj. Aliflanke la partoprenintoj akceptis, ke la plialtigita kotizo de 50.-GM entenu ankaŭ BELO-kotizon. Kiel regule aranĝis klubo dum jaro riĉan programon kun kursoj kaj prelegoj, por kiuj klubo feliĉe ricevis en Friedrich-List-Schule (=lernejo) proksime je Deutsches Eck ejojn; okazis ekskursoj, informstandoj (interese: je 30a de Aŭgusto bavara radio demandis hazarde je la stando preteririntojn, kion ili sciis pri Esperanto, kaj ricevis preskaŭ ĉiam tre pozitivajn respondojn, kaj tio estis dissendita!) ktp. Cetere kiel kutime dum jaro vizitis klubon multaj s-anoj el tuta mondo, - ĉiam taŭga ebleco praktiki nian lingvon, sed ankaŭ bedaŭrinde ofte la ĉiamaj krokodilintoj donis malbonan impreson! Zamenhofa festo okazis ĉi-jare kun bona sukceso en Hansahauŝ 6an de Decembro. Mortis dum jaro Gustav Ziegler, longjara fidela membro, kaj H.Knöpfle.

1982 komenciĝis malbone pro morto de Friedrich Schottenhammer, Honora Membro, kiu preskaŭ 60 jarojn aktive kaj fidele kunlaboris, ankaŭ multjare kiel kasisto kaj revizoro. Dum tuta jaro okazis kutimaj aranĝoj (por kursoj estis bone, ke klubo nun ricevis 2an ĉambron en Friedrich-List-lernejo) kaj ekskursoj (i.a. denove al Verona). Jarkunsidon partoprenis pli ol 30 membroj kaj Hilpert fariĝis dua prezidanto, Weidacher kaj Schubert kunsidintoj, pri aliaj estraranoj ne okazis ŝanĝo. Je Junularo Föŝmeier kaj Hilpert restis 1a kaj 2a prezidantoj, Stefan Wimmer nun fariĝis kasisto kaj Martin Weichert sekretario; je jarŝanĝo MEJ posedis 47 membrojn! En BELO ni ankaŭ vidis Hilpert kiel vic-prezidanton, cetere kun Fuchs kaj A.Maier kiel revizoroj estis ankoraŭ 2 aliaj klubmembroj en estraro. Karnavalan vesperon en Hansahaus partoprenis pli ol 80 gajaj ges-anoj. Interese, komence de Majo listo de tiam ankoraŭ vivantaj Honoraj Membroj (laŭ alfabeto: Martha Erhard, Maria Gatter, Ludwig Gammel, Dro Gerhard Kalckhoff, Karl-Ernst Paech, Horst Spirat, Max Stubenbaum, Ludwig Thalmaier kaj Josef Weidacher), sed sur listo mankis tre malnovaj Max Hocke kaj Karl Simon. Raportinda ankoraŭ estas vizito kaj restado por 2 jaroj (kaj tial ankaŭ membriĝo) de ĉina esperantisto Prof-ro d-ro Ye el Nanking, kiu poste ankaŭ kelkfoje tre interese prelegis. Dum somero mortis s-ino E.Iffländer kaj ĉefe dolorige Honora Membro stud-direktoro Ludwig Thalmaier. Rilate informstandojn mi menciis kiel precipe varban tiun dum Paca Semajno de distrikta junularo Munkeno-urbo, - estas kaj restas ja grave, ke plej multaj homoj vidu vorton kaj komprenu la signifon de Esperanto. Zamenhofan Feston oni festis ĉi-jare en gastejo Zur Post en Munkeno-Pasing; festparoladis Stefan Maul, ĉefredaktoro de famkonata internacia E.-gazeto MONATO, kaj cetere kun 116 bonhumoraj partoprenintoj estis plej granda Zamenhof-festo en Germanujo (laŭ Esperanto aktuel, la posteulo de Esperanto en F.R.Germanio).

1983 okazis karnavala festo denove en Hansahauŝ, partoprenis tiun feston 66 geverduloj. Sed ankaŭ ĉi-jare cirkulero-1 konigis morton de fidela s-ino, Perenia Ignatius, membro depost 1949, kiu kelkajn jarojn tre aktive kunlaboris. Invito al jara kunsido denove menciis emon de estraro fine konstruŝpari, - kaj fakte tiam oni interkonsentis kontrakton pri 50.000.-GM! Cetere estraro sufiĉe multe ŝanĝiĝis: Hilpert fariĝis 1a prezidanto, vicprezidanto kaj sekretario Karl-Heinz Steiger, trezoristo Rüdiger Becker; Weidacher, R.Maier kaj Karl Breuninger estis estraranoj por certaj aferoj, klubkompetentulo por junularo estis

Weichert, kiu nun ankaŭ je MEJ fariĝis 1a prezidanto (Fößmeier estonte kunlaboris kiel 2a prezidanto kaj kiel sekretariino Irene Thiele, dum Wimmer restis kasisto; laŭ sciigo al junular-ringo MEJ nun posedis 53 membrojn! Esperanto aktuell 2/83 nomis ĝin la plej granda kaj aktiva grupo de Germana Esperanto-Junularo. Krome laŭ instigo de la prezidanto de BELO ili nun ankaŭ ankoraŭ fondis Bavaran E.-junularon). Notinde estas, ke klubo nun fine nomumis August Meier pro sia longjara fidela kaj aktiva kunlaboro ankaŭ kiel daŭra revizoro Honora Membro. Rilate al GEA Hilpert nun estis elektita kiel trezoristo kaj kun Herbert Wieser kiel revizoro kroma Munkenano. En Munkeno mem okazis la kutimaj aranĝoj sed pro la politika baloto ĉi-jare ne estis eble tiom kaj centre varbi per informstandoj kiel dum pasintaj jaroj. Alia problemo estis, ke pro restaŭrado en Friedrich-List-Schule ne eblis, ek de somero uzi tieajn ejojn por kursoj kaj prelegoj; sed klubo ricevis tre proksime en Jugend-Informations-Zentrum (= Junulara Informada Centro) taŭgajn anstataŭajn ĉambrojn. Al Zamenhof-festo en Hansahauŝ klubo invitis jam ek de Septembro, - partoprenis tiam nur 70, sed inter ili unuan fojon reprezentantino de la urbo, urba konsilistino Angelika Geisbauer. Fine notinde estas, ke Munkeno denove eldonis urbomapon/varbfoliojn esperantlingve, 16.000 ekzemplerojn.

Je 17a de Januaro 1984 mortis mallonge antaŭ la 82a naskiĝo Dr. S. Ziegler post longa batalo kontraŭ malsano, kiu katenis lin jam al rulseĝo; Esperanto akuell skribis en la anonco pri lia morto, ke li estis estinta nia plej elstara membro, - kaj ĉi-prijuĝon de GEA ni certe nur povas substreki. Je la tombiĝo en la krematorio de orienta tombejo de Munkeno parolis Hilpert same por GEA, ankaŭ por la prezidanto Klünder persone, same por Munkena E.-klubo kaj metis funebran florkronon. Sed la vivo daŭris, - kaj Munkenaj verduloj renkontiĝis je karnavala festo en Hansahauŝ (27an de Januaro), kaj (22 membroj) je jara kunsido (30.01.), kie Alfred Schubert fariĝis 2a prezidanto, dum Breuninger akceptis la postenon kiel trezoristo. Hilpert, kiu kvankam ne-voleme afable akceptis ankoraŭ resti 1 jaron prezidanto, informis pri 137 membroj, inter ili 55 de la junularo. Cetero klubanoj interkonsentis je eksterordinara kunsido dum Marto diskuti kaj decidi, ĉu klubo aniĝu entute kiel sub-grupo al GEA aŭ ne. Intertempe aperis komence de Marto nova klub-gazeto Esperanto, kiu daŭris 2 jarojn kaj devis servi interne kaj eksteren kiel informilo kaj varbilo; redaktoro estis Karlheinz Steiger. Numero 2 aperis per 1a de Majo, kiam Munkenaj esperantistoj jam kiel kutime varbis per verdslogana rubando. Ni legis, ke membraro je eksterordinara kunsido, kiun partoprenis 23 membroj, kun granda plimulto akceptis grup-aniĝon al GEA. Dum Julio Hilpert edziĝis verde kun Maria Vitoria Travassos el Brazilo, - ambaŭ konatiĝis je UEA-kongreso en Brazilio 1981; en Esperanto n-ro 3 ni povis legi eĉ la esperantlingvan tekston de demandoj kaj respondoj je geedziĝa ceremonio. Krome ĉi-numero nomis kiel novulojn kelkajn s-anojn, kiuj poste fariĝis - kaj ankoraŭ estas-tre gravaj por E.-vivo en Munkeno; temis pri Prof. Dieter Quednau, Monsignore Josef Grabmeier, la gastejestroj de Deutsches Eck, Teresa kaj Clemens Mangold kaj Otto Müller. Esperanto informis krome, ke klubaj kursoj kaj prelegoj denove povus okazi en Friedrich-List-Schule, kaj pri junularo, ke longjara kasisto Wimmer estis irinta al Jerusalemo, kaj Stefan Maukisch (kiu hazarde atingis jubilean matrikulan numeron 10.000 je GEA kaj pro tio ricevis libron kiel donacon) fariĝis posteulo. Sed plej grava estis ankoraŭ anonco pri ekspozicio en sindikata domo de 17a-28a de Septembro, plilongita ĝis 4a de Oktobro, Zur Geschichte der internationalen Arbeiter-Esperanto-Bewegung 1903 - 1983 (= je la historio de internacia laborista Esperanto-movado), kiu komenciĝis per aktuala referato de s-ano Rudolf Brand el Bamberg Sprachbarrieren, ein Kernproblem auf dem Weg nach Europa (= lingvaj bariloj, centra problemo survoje al Eŭropo), kaj pri kiu denove Weidacher plej multe kulpiŝ. Radio Munkeno kaj same Süddeutsche Zeitung (= Sud-germana Gazeto) venis tien kaj informis sufiĉe objektive pri ĉi-aranĝo. Venis ankaŭ aŭtoro de germana lernolibro, - kaj referato kaj diskuto kaŭzis bonan (ankaŭ presitan) artikolon en la posta bavara lernolibro! El Esperanto n-ro 4 mi ankoraŭ menciu, ke Zamenhof-festo okazis ĉi-jare en paroĥestra salono de preĝejo Sankta Maria en Thalkirchen kun pli ol 100 ĉeestintoj, festparoladis, ankaŭ pro 80-jara jubileo de Munkena Esperanto-klubo iama klubprezidanto H. Spirat (kiu nun jam depost kelkaj jaroj vivis en Italio, proksime de Verono). Je tiu festo klubo honoris la multajn laborojn de Weidacher kaj ankaŭ de Johannes Pachter, kiu jam delonge priokupiĝis ordigi la grandan Munkenan bibliotekon.

Komence de 1985 Hilpert konigis, ke li nun vere ne plu povus daŭrigi la klub-prezidantecon kaj petis pripensi posteulon ĝis jara kunsido je 25a de Februaro. Antaŭe klubo aranĝis ankoraŭ tradician karnavalan feston en Thalkirchen, sed tiam venis kriza momento, des pli, ĉar ankaŭ preskaŭ ĉiuj aliaj estraranoj rezignis pro mankinta libera tempo. Feliĉe trovis sin la supre menciitaj novuloj:

Prof. Quednau akceptis la oficon de 1a prezidanto kaj Otto Müller de 2a prezidanto; Breuninger restis trezoristo, Amelia Garcia fariĝis sekretariino, - do, klubo povis aktive daŭrigi laboron. Nature okazis la tradiciaj kursoj, ekskursoj (ankaŭ per s-ano Gissibl), prelegoj, tamen, kelkaj aferoj ŝanĝiĝis. Ankoraŭ nur 1 foje aperis dum Majo Esperanto, sed jam antaŭe kaj ĉiam poste ĝis hodiaŭ klubo revenis al informiloj kun programo pri kelkaj monatoj, kaj nur por specialaj aranĝoj kiel ekz. Zamenhofa Festo oni skribis kaj forsendis kromajn invitojn. Cetere dum tiu jaro de 3a - 10a de Aŭgusto okazis en Aŭgsburgo la 70a UEA-Kongreso (kun Richard von Weizsäcker, prezidento de FR Germanio kiel alta protektanto), kaj nature multaj Munkenanoj kunhelpis same je preparoj same poste je organizo, inkluzive de karavanoj al Munkeno kaj en aliajn sudgermanajn regionojn. Dum la tiam ankaŭ en Aŭgsburg okazinta GEA-kongreso Hilpert denove elektiĝis kiel trezoristo, revizoroj fariĝis Dr. Uli Ender kaj Günter Fuchs, kaj K.-E. Paech arbitraciulo, ĉiuj Munkenanoj. Pro la nova Munkena prezidanto okazis fondiĝo de Esperanto Studenta-Grupo je Munkena universitato kaj krome ekestis nun regulaj kontaktoj kaj renkontiĝoj kun turkoj kaj irananoj, kio ankaŭ helpis al novaj s-anoj. Zamenhofa Festo estis denove en Sankta Maria Thalkirchen, ĉi-jare jam dum Novembro.

Je komenco de jaro 1986 Munkena klubo posedis 93 membrojn kaj krome 60 gejunulojn de MEJ (sed de ili nur parto pagis kotizon), pro kiuj oni certe rajtis rigardi iom optimiste en la estontecon. Fakte junularo montris dum jaro ankaŭ ankoraŭ sufiĉe da aktiveco; ĝi organizis ekz. feriajn kursojn, kaj tiele junular-prezidanto Martin Weichert estis invitita partopreni je 21a de Majo akcepton por la junularo de prezidento de FR Germanio Richard von Weizsäcker, kiu tiam sufiĉe afable prijuĝis Esperanton. Pri la kutima kursprogramo ktp ne estas multe dirinde, nova baloto ĉi-jare ne necesis. Tamen kelkajn punktojn mi notu. UEA festis tiun jaron en Pekino, kaj 7 Munkenaj gemembroj partoprenis tiun okazaĵon. Jam je komenco de jaro venis (kaj prelegis) profesoro Shen el Pekino, -kaj la Munkenanoj renkontiĝis kun li en Pekino; aliflanke poste nature ekestis diversaj prelegoj por la klubanoj pri ĉi-vojaĝo. Pro ofte mizera situacio en Ĉinio, Afriko, sed ankaŭ en Turkio kaj Irano okazis nun kelkaj alvokoj pro helpo per abono de E.-gazetoj ktp., kaj la klubanoj volonte akceptis kaj ankoraŭ nuntempe subtenas ĝin. Föbmeier, kiu antaŭ 2 jarojn doktoriĝis, kursestris je universitato kurson kun 14 partoprenintoj, -sed bedaŭrinde nur 5 restis ĝis kursfino. Cetere s-ano Ahmad Shafii-Sabet el Irano, kiu 1985 aniĝis al klubo kaj nomis sin Mondulo Terano, nun ankaŭ kursestris interesulojn en List-Schule. Mortis 14an de Junio longjara fidela membrino Ruth Painter-Trump, iama teatra aktorino, pli aĝa ol 80 jarojn, kiu tre subtenis sciencajn aktivecojn de UEA. Karnavala kaj Zamenhofa Festoj okazis denove en Sankta Maria Thalkirchen. 2 finrimarkoj: Munkena E.-biblioteko aliĝis per 1.1.1986 al Tutmonda Esperanta Bibliotekista Asocio - Londono, kaj Fuchs eldonis ankoraŭfoje Esperanto-ekzempleron, kostis 900.-GM, - kaj tial oni reiris al la nuraj informiloj!

1987 estis jubilea jaro: 100 jarojn Esperanto en la mondo! Nature okazis grandaj festoj, ĝenerale kun UEA en Varsovio, SAT, kiun la pola Esperanto-Asocio unue invitis al ĉi-jubilea kongreso kaj poste pro ordono de la komunista registaro devis malinviti, festis en Bulonjo ĉe maro, kie 1905 okazis la unua monda E.-kongreso, kiun tiam vizitis d-ro Zamenhof mem. Al ambaŭ kongresoj veturis nature kelkaj klubanoj, - sed ne nur ili, sed ankaŭ aliaj Munkenanoj kiel ekz. la ĥoro de Sankta Maria Thalkirchen, kiu kantis en Varsovio kaj aliaj lokoj de Polio E.-lingve oratorion Gloro kaj paco kaj Esperanto-meson. Fakte tiaj verkoj estis jam prezentitaj (la meso unuan fojon!) Marte en Munkeno en la propra preĝejo; estis tiam vere impresa koncerto, kiun multaj partoprenis! Krome okazis pluraj prelegoj en Munkeno pro ĉi-100-jara jubileo: Komence de jaro parolis K.-E. Paech en la preĝejo Sankta Maria Thalkirchen, dum somero d-ro Föbmeier en la universitato - kaj je Zamenhofa Festo prelegis pro la 100-jara jubileo dum ĉeesto de ĉirkaŭ 90 partoprenintoj, inkluzive de reprezentantoj de urbo Munkeno, klubestro prof-ro Quednau, denove en Sankta Maria Thalkirchen. Sed longe antaŭe dum Januaro ankaŭ karnavala festo tie denove okazis. Nepre

menciinde estis ankoraŭ la denove de Weidacher aranĝita ekspozicio pri la kultura historio de Munkena Laborista Movado antaŭ hitlera tempo ĝis 1933, titolo: Den Arbeitern aller Länder eine Sprache (= Al Laboristoj de ĉiuj landoj 1 lingvon!), kiu ek de 6a de Marto okazis en Malnova Urbadomo kaj montris vere interesajn (ofte ankaŭ malgajajn!) rememoraĵojn. Jarakunvenon partoprenis 31 membroj, - laŭ kasisto klubo posedis momente nur 83 adoltajn kaj 16 junulajn pagantajn membrojn. Cetere okazis dum jaro la kutimaj kursoj, ekskursoj kaj renkontiĝoj.

1988 pro manko de libera tempo ne nur retiriĝis Hilpert kiel GEA-trezoristo, sed ankaŭ prof-ro Quednau. Kemiisto d-ro Ulrich Ender konsentis fariĝi prezidanto, kaj li ankoraŭ nuntempe ofertas liberan tempon por tiu ofico. Cetere li ankaŭ apartenis al la kunvojaĝintoj al Pekino 1986 kaj jam pro tempomanko ne tro ŝatis burokraton: Nur kelkaj, sed kompletaj informiloj devis/devas sufiĉi, por informi la membrojn. Nuna prezidanto pli ŝatas aktive kunhelpi je varbado per informtabloj en Munkena centro. Cetere nature okazis kiel kutime prelegoj, kursoj kaj ekskursoj, kaj ĉi-jare sufiĉe multaj klubanoj partoprenis dum Majo Jaran Kunvenon de BELO en Pfaffenhofen kaj precipe dum Oktobro 100-jaran jubileon de E.-grupo en Nürnberg, la unua E.-grupo en la mondo! Zamenhofa Festo denove estis en Sankta Maria Thalkirchen, oni festis jam dum Novembro. Fine de jaro klubo posedis 102 membrojn, - sed laŭ plendo de trezoristo je jarkunveno 1989 nur 78 el ili pagis kotizon, li tial treege admonis la klubanojn- bedaŭrinde ĝis nun, kvankam la nombro de membraro altiĝis al 107, paga moralo entute ne tiom pliboniĝis. Aliaj menciindaj punktoj de ĉi-jara kunveno estis, ke klubo faris Mondulon Teranon Honora Membro, decidis donaci 500.-GM al GEA por oficejo en Bonn kaj renovigi solidaraĵajn gazet-abonojn por Tria Mondo; krome, ĉar Pachter jam delonge ne plu loĝis en Munkeno, Weichert fariĝis bibliotekisto, li pro aĝlimo ne plu restis junularestro, tion faris Bernd Gruber. Cetere klubo decidis formi kongres-komitaton por GEA-kongreso 1991 en Munkeno. Karnavala kaj Zamenhofa Festoj okazis ĉi-jare en Hansahaus. La informiloj montris dum la jaro la kutimajn prelegojn, kursojn kaj ekskursojn, sed nature mankis ankaŭ ne la kutimaj informtabloj. Krome okazis dum la jaro ankaŭ 2 gravaj aranĝoj en relativa proksimeco, kiujn po kelkaj klubanoj partoprenis: Temis unue dum Aŭgusto pri SAT-kongreso en Illertissen, kie ĉeestis unuan fojon post dua mond-milito ankaŭ kelkaj k-doĵ el Sovetio, kaj poste dum Decembro estis inaŭguro de la Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen. Mortis dum jaro denove 2 fidelaj membroj, je 12a de Aŭgusto Honora Membro Karl Simon, preskaŭ 93 jara kaj esperantisto jam antaŭ la 2a mondmilito, kaj 21an de Novembro Johannes Donat, 64-jarulo.

1990 necesis novelekto de kasisto, ĉar Breŭninger deziris pro hejmaj taskoj fini la laboron en klubo, - sed, ĉar posteulo post duona jaro eksiĝis, Breŭninger tiam denove estis preta akcepti trezoristan oficon. Pri la jara kunveno estu ankoraŭ menciite, ke denove klubo akceptis financan subtenon de GEA-oficejo en Bonn kaj donacajn abonojn por la Tria Mondo, malgraŭ ke paga moralo de membroj ne pliboniĝis kaj same la membraro ne plialtiĝis. Krome oni elektis Hilpert kiel LKK-prezidanton por venontjara GEA-kongreso kaj disdonis prilaborendajn taskojn. Ankaŭ se elstaraj okazaĵoj fakte ne okazis dum la jaro restas tamen menciinde, unue, ke je GEA-kongreso en Freiburg la Munkena Honora Membro Dro Gerhard Kalckhoff nun ricevis ankaŭ Zamenhof-Honoran Medalon de GEA, kaj due, ke en preĝejo Sankta Maria Thalkirchen eksonis unan fojon esperantlingve Te Deum, komponita de Fridolin Limbacher, kiu ankaŭ estis la komponisto de la 1987 aŭdita granda meso. Tre malgaja okazaĵo estis morto de Honora Membro Ludwig Gammel je 30a de Julio 1990; la mortinto estis pli ol 50 jarojn aktiva esperantisto kaj subtenis kluban laboron kun multmilaj donacoj! Cetere dum jaro okazis la kutimaj prelegoj, kursoj, ekskursoj kaj festoj: Karnavala kaj Zamenhofa festoj klubo aranĝis en Hansahaŭs. 1991 ĉiuj nun atendas la GEA-kongreson, kaj LKK (vidu Esperanto aktuel 8/1990 paĝo 6), ĉefe LKK-prezidanto, tre aktive laboris por preparo. Laŭ kasisto membraro iomete pligrandiĝis, -tamen je jara kunveno estis malfacile/neeble, trovi (novajn) prezidanton kaj kasiston. Afable Dro Ender kaj Breuninger deklaris sin pretaj ankoraŭ resti 1 jaron, - kaj ni esperu, ke klubo ĝis tiam trovos aliajn aktivulojn. Momente ja oni devas konstati, ke kvarono de membraro sentas sin nur kiel simpatiantoj, kiuj estas pretaj pagi kotizon, sed ne volas aŭ kapablas aktive kunlabori; inter ili estas ankaŭ kelkaj de iamaj aktivuloj, kiuj opinias nuntempe esti tro maljunaj. Kvarono apartenas al (preskaŭ) ĉiamaj komencantoj,

kiuj rigardas la klubaranĝojn nur aŭ almenaŭ ĉefe kiel gajajn renkontiĝojn kaj tial ofte ankaŭ tre aktive kunhelpis, - sed bedaŭrinde tute ne intencas vere studi aŭ praktiki Esperanton. Ke ili per ĉiama krokodilado eĉ malhelpas novulojn, novinteresulojn, kiuj venis por praktiki Esperanton, plibonigi ilian spertecon, - ili eble ne komprenas. Por alia kvarono mankas aŭ la tempo aŭ la forto, kaj parte ankaŭ la intereso por regulaj aranĝoj (sed ilin oni vidas ĝenerale je Zamenhofa Festo), kaj nur lasta kvarono iomete pli regule partoprenas kaj eble eĉ kunlaboras. Verŝajne plej granda problemo estas mankinta propra ejo, kiu helpus neĝenate renkontiĝi, kursestri, prelegi, festi ktp. Cetere depost kelka tempo ankaŭ iomete ĝenas, ke junularo malofte nur partoprenas klubajn aranĝojn kaj ĝenerale restis/restas preskaŭ inter si, - kio en universitata urbo Munkeno estas precipe bedaŭrinda, ĉar multaj de la gejunuloj estas studentoj, kiuj post certa tempo forlasas Munkenon. Tiel fakte nur vere malmultaj el ili poste membriĝis. Tamen ni esperu, ke ankaŭ jubilea kongreso atingu novajn gesamideanojn, kiuj kiel freŝa sango fortigu nunan fidelan anaron de 100-jara Esperanto-movado en Munkeno!

Postparolo

Vi legis nun la rezulton de nia multhora laboro okaze de 100 jaroj Esperanto en Munkeno.

Antaŭe ankoraŭ kelkajn rimarkojn pri la aŭtoro de tiu broŝuro:

Karl-Ernst Paech, profesie bankjuristo kaj advokato, honora membro de la klubo, venis 1947 varbita de Go-amiko Hertlein al Munkena Esperanto-movado kiel membro (kie li post Hermann Heiŝ kelkajn jarojn ankaŭ estis prezidanto de la junulara grupo) kaj same membriĝis je SAT, kiu tiam multe pli favoris germanajn k-dojn ol UEA.

Li naskiĝis 1922 en Hannover kaj estas engaĝita jam antaŭ Esperanto je Go (kie li estas Honora prezidanto de Eŭropa Go-Federacio, Germana kaj Bavara Go-Asocioj kaj vic-prezidanto de Esperanto Go-Ligo Internacia = EGLI) kaj ankaŭ depost jardekoj kiel estrarano je Germana-Japana Asocio. Jam delonge mi havis la ideon eldoni broŝuron aŭ libron pri historio de la Munkena E.-movado. Sed mankis ĉiam la tempo. ***La jubilea dato 100 jarojn Esperanto-movado en Munkeno*** kuraĝigis min,

denove surtabligi tiun projekton. La materialon antaŭe H.Spirat kaj poste mi dum jaroj konservis en la privata kelo. Grandan parton zorge ordigis kaj protektis per plasta materialo J.Pachter. Gi kuŝis kelkajn jarojn en Sigmaringen, kie ankoraŭ hodiaŭ kuŝas parto de nia granda kaj valora biblioteko, entute pli ol 2000 libroj!

K.-E.Paech transprenis la taskon trastudi kaj kunmeti la amasan materialan materialon. Dum multaj horoj li ordigis la materialon laŭ tempo kaj graveco. Tiel ni povis fermi kelkajn truojn de nia historio, sed restas ankoraŭ sufiĉe. Multe da materialo de la unuaj 40 jaroj malaperis aŭ estis detruita.

Nun vi tenas la rezulton de tiu laboro en viaj manoj. Kaj eble tiuj, kiuj kunvivis parton de la Esperanto-historio eble memoras sin je detaloj kaj nomoj, kiuj ne aperas en nia broŝuro; eble vi eĉ ankoraŭ posedas fotoĵojn kaj aliajn dokumentojn?! Bonvolu tiam mencii tion al la estraro de la Esperanto-klubo.

Surpaperigu tiujn memorojn tuj, por ke vi ilin ne forgesu, dankon! En la venontaj jaroj ni volas eldoni pli ampleksan broŝuron, ĉar ni posedas ankoraŭ pli da dokumentoj, fotoĵoj kaj detalaĵoj. Mi nur povas konzili al ĉiuj, kiuj okupas sin pri administro de asocioj, ke ili zorge kolektu kaj dokumentu la unuopajn aranĝojn kaj erojn de asocia vivo. Notu la nomojn sur la fotojn, por ke le retrospektivo poste estu kompleta!

Fine mi esperas, ke la broŝuro instigu la leganton pli forte agadi: La Esperanto-movado nur havos grandan estontecon, kiam denove ekestos homoj tiel idealisme kaj lerte, kiel ili estas priskribitaj en tiu broŝuro.

nome de Munkena Esperanto-Klubo

Fritz Hilpert